

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO INSTITUTO

Nr. 106, aprilo 2013

Nia proverbo:

Ne edukita homo similas al ne ellaborita ligno (Sudo)

Adreso de redakcio: p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016 Albanio
(00355682580758; bselimi@gmail.com)

Kunlaborantoj: Shaban Hasani (00355682080677, shabanhasani@gmail.com); gjergji_gusho@yahoo.com) Agim Peraj (355694472430, agimperaj@yahoo.it); Sajmir Beqiraj (00355684030613, s_beqiraj@yahoo.com); Nehat Sokoli (++355682587699, nehatsokoli@yahoo.com); Engjell Gusho (00355692350111, engjellgusho@yahoo.com), Rita Permeti (0035542363 360; 00355686857800 ritapermeti@yahoo.com); luanjaupi@hotmail.com (tel 00355682165870)

La enhavo

Nia propagando

La peticio Avaaz por Esperanto, kiel lingvo de EU, internaciigis.
Lingvotaga mesaĝo 2013 - Probal Dasgupta

Esperanto en Mazara del Vallo

Gratulon, kara Samideano Bharat K Ghimire!

El la leteroj

Danksalutojn el Hiroŝima

El Sudkoreio

El Svedio

El Brazilo

Interna vivo de Instituto kaj Asocio

Elspezoj kaj kotizoj

Ni kaj ILEI, UEA, AIS

46a ILEI-konferenco 12-18 julio 2013 en Herzberg am Harz / Sieber -
Retpaĝo por la albanaj esperantistoj

Kampanjo por starigi kontaktojn de AIS kun niaj ŝtataj universitatoj

Nova estraro de la Albana ILEI-sekcio

Aktivecoj dum la jaro 2012-12-20

Konciza historio de la Albana Esperanto- Asocio

La renovigo de la jura leĝeco de nia Asocio

Ni kondolencas

Ni dankas

Bjalistokajn esperantistojn

Triestan E- Asocion

S-ron Otto el Aalen

UEA- komisionon

S-ino Adri Pasztor

S-inon Julia Sigmond

Anoncoj kaj Informaĵoj

AEPA en Bulgario

Itala Kongreso

Aktivecoj en Gresillion

Junuloj pri filmado

Interlingvistiko kaj esperantologio daŭre ĉeestas en la paletro de UAM

Artikoloj

Sanije Gashi: Teruraj historioj

Kvinjara sendependa Kosovo

Reagoj : Interŝanĝo de opinioj kun Johan Derks

Paiva Netto: Milito pro akvo

Novajbulteo de Ian Fantom

Dudich: Neebla Lando- historio de Hungario

Beletraĵoj

Poeziaĵoj de Shefik Ollomani

Noveleto: Adoniso de Ylljet Alickaj

Fragmento el la romano „La generalo de la mortinta armeo“ de Ismail Kadare

Nia propagando

La peticio Avaaz por Esperanto kiel lingvo de EU internaciigas.

La iniciatinto de la peticio, Johannes de Divonne, estas nun kontaktebla ĉe Facebook.

Ĉar nun vekigas Eŭropo, aperis poste subskriboj el la koncernita kontinento :

Ĉeĥio, Germanio, Hungario, Francio kaj poste jenaj : du el Francio, unu el Rusio kaj unu el Malto...

Nun estas 1224 subskriboj, kaj la nova atingota celo estas 10 000 subskriboj. Ni rapidu por celi poste 100.000, unu milionon, unu miliardon, ktp ;-)

Jam pretas pluraj lingvaj versioj, i.a. anglalingva, kiun provizis Ferdinand Cesarano el Novjorko :

Esperanto, oficiala lingvo de Eŭropa Unio, nun !

Sub tiu titolo aperas freŝdata peticio sur la retejo de la neregistara organizaĵo [AVAAZ](http://www.avaaz.org/fr/petition/Esperanto_langue_officielle_de_IUE/?tjwlab), ĉe kiu estas registritaj preskaŭ 20 milionoj da membroj tra la tuta mondo :

http://www.avaaz.org/fr/petition/Esperanto_langue_officielle_de_IUE/?tjwlab

Jen traduko de la teksto de la peticio "destinita al la eŭropaj politikaj respondeculoj" :

Ni, civitanoj de Eŭropo kaj de la mondo, ni vokas vin fari el Esperanto la 24an lingvon de Eŭropa Unio, por Eŭropo pli demokrata kaj pli justa rilate al ĉiu lingvo kaj kulturo de la kontinento. Elekti Esperanton prefere al la angla, tio estas plia paŝo en la eŭropa konstruado. Mankas debato je la eŭropa nivelo, Eŭropo ne devas esti nur ekonomia, ĝi devas esti ankaŭ Eŭropo de la popoloj.

Ne qytetarët e Evropës dhe të botës, bëjmë thirrje për ta bërë Esperanton gjuhën e 24-t të Bashkimit Evropian, për një Evropë më demokratike dhe më të drejtë ndaj secilës gjuhë dhe kulturë të kontinentit. Zgjedhja e Esperantos me parapëlqim ndaj anglishtes, është hapi i mëtutjeshëm në ndërtimin e Evropës. Mungon një debat në nivel evropian, Evropa nuk duhet të jetë vetëm një bashkim ekonomik por edhe një bashkim për popujt e saj.

Sen granda eĥo ĝis nun, ĝi atingis 328 subskribojn el multe da landoj, ankaŭ ekstereŭropaj (ekz. Mongolio !). Por ebligi subskribon ne nur al franc- kaj Esperant-lingvanoj, estus utile diskonigi ĝin ankaŭ en laŭeble plej multaj lingvoj, almenaŭ tiuj de Eŭropa Unio, sed ankaŭ en la plej parolataj ekster EU. Do, bonvenaj estos tradukoj de la ĉi supra teksto kaj de la titolo.

Necesas nun urĝe :

1. aldoni al ĉiu diskonigo de la peticio version en ĉiu alia lingvo, kiun oni regas, ĉar homoj ne emas subskribi peticion, kies celon ili ne komprenas;
2. samokaze aldoni ligilon al la prezento de Esperanto sur Wikipedia (ekzistas nun 169 versioj pri Esperanto) — Esperanto-versio : <http://eo.wikipedia.org/>
3. revizii, korekti, poluri, aktualigi la artikolojn de ĉiuj lingvaj versioj de Wikipedia pri Esperanto;
4. same pri artikoloj pri ties propedeŭtika valoro aŭ pri aldono de novaj alilingvaj versioj : http://eo.wikipedia.org/wiki/Propedeŭtika_valor_de_Esperanto
5. informi pri "Esperanto 2013" — Justa komunikado" : <http://www.linguistic-rights.org/uea/>
6. diskonigi la emblemon "Esperanto 2013" kun nacilingvaj tradukoj : <http://www.linguistic-rights.org/bildoj/Esperanto-2013-Justa-komunikado.jpg>
7. gravas ankaŭ forta ekstereŭropa subteno por montri, ke la deziro pri justa lingva komunikado kun Eŭropa Unio ricevas vastan aprobon kaj fortan subtenon el la tuta mondo. Mi strebos laŭeble plej frue revizii mian franclingvan artikolserion "L'espéranto, au présent"

(Esperanto nuntempe), kiun mi ne reaktualigis jam de tro longa tempo. Ne hezitu ĉerpi ideojn kaj faktojn el ĝi kaj atentigi min pri ne plu funkciaj ligiloj aŭ ne plu ĝustaj informoj aŭ aldonindaj faktoj — <http://www.ipernity.com/blog/32119/211524>
Principe kaj finfine, post ne tro fora tempo, aperos la DVD de la plurlingva dokumentara profesinivela filmo "Esperanto" de Dominique Gautier en la 6 lingvoj de UN. Tio estos plia atuto por popularigi la ideon pri Justa komunikado en 2013.

Malgraŭ niaj humidaj revoj...

Leginte la komentojn de Seán Oriain (rigardu supre) mi konsentas ke kelkaj esperantistoj agas malsaĝe kaj tiel kompromitas nian lingvon.

Nepreparite prezenti Esperanton al internaciaj organizaĵoj aŭ politikaj rondoj malhelpas nian movadon kaj vundas ĝian reputacion. Ni unue kreskigu la nombron de bone preparitaj esperantistoj. Jen grava tasko por la Universala Esperanto-Asocio (UEA), la Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI), la Tutmonda Esperanto-Junulara-Organizo (TEJO), universitatoj, lernejoj, landaj movadoj kaj lokaj kluboj.

Krome necesas pli da lingva disciplino kaj unueco inter esperanto-parolantoj. Se ne nia lingvo disiĝos pro manko de "universala sintakso". Esperantistoj parolu pli korekte, pli elokvente kaj pli flue anstataŭ eterne balbuti, laŭvorte tradukante frazojn el siaj gepatraj lingvoj. Ili uzu pli da simplaj, plej klarajn kaj logikajn frazojn, strebante al unueca, universala frazeologio.

Multe da homoj (ankaŭ ne-esperantistoj) ankoraŭ ne sufiĉe konscias pri la valoro de universala sintakso kiu naskiĝas el racia menso kaj logika penskapablo. Jen ofte forgesata aspekto de tutmonda lingvo, bonintence kreita por unuigi la homaron.

Manko de atento pri universala sintakso fuŝas Esperanton kaj kompromitas ĝian socian rolon. Tiel ni ne konvinkos skeptikajn lingvistojn-sciencistojn (konsilantoj de politikaj decidantoj) pri la valoro de Esperanto kiel solvo de komunikaj problemoj.

Ni do pli profunde studu la lingvan logikon, la gramatikon kaj la nepre necesan universalan sintakson de Esperanto por efektiviĝi plej altnivelan lingvan unuecon inter ĝiaj parolantoj. Se ne la Zamenhofa celo montriĝos nur humida revo de persistemaj, naivaj utopiuloj.

Jo Haazen~

Lingvotaga mesaĝo 2013 - Probal Dasgupta

Saluton, karaj kunesperantistoj. Diference de aliaj komunumoj, ni estas sentemaj pri la lingva maljusteco. Sed ni ofte permesas al la sentoj superforti nian emon pensi. Bonvolu pensi kun mi – okaze de la 21a de februaro (kvankam mi afiŝas kelkajn tagojn pli frue por ke eventualaj tradukemuloj havu iom da tempo por agi) – pri iuj vojoj sekvindaj por ŝanĝi la situacion.

Ni vivas en tempo de eksploda konsciigo pri multaj specoj de malfeliĉo kaj maljusto. La konsciemo konsiderinde antaŭkuras nian kapablon ion fari por plibonigi la vivon. Pri diverskialaj malriĉuloj la konscienco de la homaro sentemiĝis jam en la deknaŭa jarcento. Sed la ekzisto estas aparte – kaj nun ĉiam pli konsciante – malfacila por virinoj, infanoj, pliaĝuloj, handikapitoj, etnaj/lingvaj kaj seksaj malplimultoj, indiĝenaj popoloj (se iujn kategoriojn mi preterlasis, bonvolu reagordi la tezon laŭ viaj prioritatoj). La pluekzisto estas malfacila ankaŭ por multaj flaŭraj kaj faŭnaj vivniĉoj, kies integrecon longe gardis kun ama zorgo tiuj teramaj indiĝenaj popoloj. Konstruante strategion por atingi siajn ĝeneralajn celojn, neniu lingva movado povas permesi al si ignori la specifajn urĝojn de ĉi tiuj ĉiam pli prikonsciante suferantaj loĝantoj sur minacata planedo.

Pro tiu ĉi ekkonscio, la tegmenta asocio de nia movado, kaj iugrade ankaŭ aliaj, komencis adopti ekologieman aliron al siaj kutimaj tagorderoj. En antaŭaj jardekoj, iuj inter ni emis paroli pri iu unika monda lingvo-problemo. Sekvis de tiu rezonado la eblo prezenti Esperanton kiel solvon al tiu problemo egale unikan. Nuntempe ni pli ofte pensas pri ne bone fartanta lingva ekologio. De tio sekvas pensoj pri la fortigo de Esperanto kiel ingredienco, kiu, ĝuste aplikate, povas modifi tiun ekologion kaj plibonigi ĝian cirkuladon.

Kion tiu ekologiema vidpunkto alportas al la pensoj, kiujn ni foje foliumas en la internacia tago de la gepatra lingvo? Ĉu ian specife mediisman aliron?

En la deknaŭa jarcento, la ekkonscio pri la malriĉeco spronis la floradon de pluraj inter si sufiĉe malsamaj maldekstroj. Hodiaŭ, la planedo gastigas plurajn inter si sufiĉe malsamajn mediismojn. En la nomo de la medio, ekzemple, pluraj voĉoj en nordaj landoj predikas al specifaj oreloj el difinitaj sudaj landoj, “Vi tro rapide kaj tro polucieme evoluas, kaj tio devas ĉesi. Ni faris la eraron fariĝi tro avidaj kaj materiamaj. Ni renversos tion. Ankaŭ vi lernu de la asketismaj prauloj de viaj admirindaj civilizoj en Ĉinujo, Barato, kaj tiel plu. Bridu vin. Vi produktas pli da haladzo ol ni. Kaj viaj riĉuloj estas riĉegaj. Fi, vi havas tiel koruptan stilon de registado! Ni estas puraj, morale altnivelaj socioj, kaj prave donas al ni medalojn pro tiu ĉi nia nivelalto. Vi, konataj koruptuloj denunciataj de via propra gazetaro, bonvolu ŝimi en via nuna malalta industrieco, kaj lasi al ni la konsumadon, kiu ĉe ni observas tre altajn normojn de medikongrueco.” Ankaŭ tio nomiĝas mediismo kaj estas akompanata de mezurbendoj, per kiuj la bendestroj pruvigas, ke la plej grandaj poluciantoj estas (ekzemple) Barato kaj Ĉinujo, kaj ke do devas ili, kaj ne la malprave akuzataj okcidentaj socioj, savi la planedon.

Ne necesas okupiĝi pri detaloj de la substanco de tiaj pensoj; vi tuj vidas, ke de ili sekvas nenio pri la lingva justeco. Ankaŭ aliaj variantoj de la mediismo, kiel ilin priskribas admirindaj

raportoj kaj verkoj, restas sur sufiĉe ignorema, senkonsidera nivelo rilate la lingvojustecajn demandojn. Ni en la Esperanto-movado per longa empatiado kun prilingvaj viktimoj lernis agnoski ilin kiel gravajn. La mediistojn movas alia kompreno pri la veraj urĝejoj. Ili ne vidas, ke tagordo bazita ekskluzive sur iliaj nunaj perceptoj minacas tute forferi la prilingvan justecon sur la altaro de aliaj ekvilibroj kaj justecoj vidataj kiel absolute prioritataj.

Parolante pri la ekologia aliro al lingvaj demandoj, ni tamen pensas ne nur al la flaŭra, faŭna, huma medio, en kiu ni vivas. Ni pensas ankaŭ al la ekologiaj principoj, kiujn ni volas apliki al la lingvaj fenomenoj mem en nia repensado pri la problemoj kaj solvoj aparte esperantismaj. *(Atentu, mi diris 'ankaŭ'; la mediismo mem gravas al ni; ni devas strebi estigi fortikan kaj plenkomprenan aliancon inter la esperantismo kaj justaj formoj de mediismo; sed tio ne estas sur mia hodiaŭa tagordo. Mi tamen kursivigas, por malfaciligi forgeson pri la graveco de tiu temo.)*

Eĉ en pure unulingva komunumo, infanoj kaj plenkreskuloj havas malsamampleksajn vortprovizojn. La pli kleraj plenkreskuloj uzas pli da vortoj ol la malpli kleraj. Ĉiuj homoj, en siaj plej ripozaj, distraj, amuzaj momentoj, malpli emas uzi malfacilajn, teknikajn, laborigajn esprimojn, ol dum la horoj de serioza, faka laborado. Eĉ ene de unu lingvo, la tagnokto aŭ la jaro havas do lingve diversajn ciklojn aŭ fazojn. Se la lingva ciklo estas rekonebla eĉ interne de unu lingvo, ni certe komprenas, ke en plurlingva socio tiu ciklo prenas nete videblajn konturojn kaj ligas iujn 'superajn' lingvojn al pli 'laboraj' funkcioj, lasante la 'subajn'lingvojn por pli 'liberecaj'.

Ni foje uzas la retorikon de politiko kaj de strebado aplikigi homajn rajtojn, kiam ni aliras ĉi tian repertuaron de fenomenoj. Sed tia retoriko havas nur partan utilon ĉi tie. Ĉu vi, volante plibonigi vian dormon aŭ pligliatigi vian ripozon, serioze petskribas al iu komisiito pri homaj rajtoj, ekzemple? Kial la ripozo funkciu malsame ol la dormo?

Mi elstarigas la fakton, ke niaj diversaj idiomoj estas interligitaj kun niaj spertaj cikloj – tagaj cikloj kaj jaraj cikloj – de laboro kaj mallaboro, de libero kaj mallibero. En tiuj cikloj situas ankaŭ la sociaj rilatoj, per kiuj kunagas viroj kun virinoj, plenkapabluloj kun handikapitoj, nordanoj kun sudanoj. La kategorioj, kontraŭkiuj plue diskriminacias niaj kadukmodelaj ŝtatoj kaj institucioj, tamen dinamike kunvivas kun la pli 'potencaj' kategorioj. Ene de la ciklado kaj pulsado de ĉies kunagaj vivoj, ili iom post iom forŝlifas la potencon de la opresaj faktoroj. La publikaj streboj havas la celon akceli tiun reagordan procezon; ili ne anstataŭas ĝin. (Kaj mi esperegas, ke iuj inter vi rimarkis la vorton 'procezo' prenitane el mia pli frua prediko; se ne, amase petskribu, por ke mi ekspastriĝu.)

Eĉ en Bangladeŝo, kies suferoj ebligis la instituciigon de la 21a de februaro kiel internacia lingvotago, floras pli da lingvoj ol nur la bengala. La angla havas firman lokon, ekzemple, en la natursciencoj kaj la industrioj. La araba estas kultivata pro la forta ĉeesto de la islama pieco en tiu lando. Mi ne parolas pri la minoritataj lingvoj, sed devas mencii, ke lastatempe eĉ Esperanto, nia minoritata lingvo, en tiu lando flaŭras kaj faŭnas. (Jes, mi klaŭnas, kiel

kutime, por subtrahi iom da amara emocio de niaj pritraktendaĵoj, kaj mi ne nur ploros, sed kun tropikĉiela abundo milsitele plaŭros, se vi ne ridos pro la vortludo ‘flaŭras kaj faŭnas’.)Necesas pensi pri intertraktaj agordoj por ke esperantistoj dinamike partoprenu la ŝlosilajn procezojn, kiuj disvolviĝas en tiu malriĉa lando, dotita per kulture evolueginta lingvo.

Pri enlandaj agordoj pleje pensos bangladeŝanoj mem, sendube. Al vi, eksteraj esperantistoj, mi direktas ĉefe la pledon, ke en ĉiu jaro vi aranĝu ĉirkaŭ la tempo de la lingvotago – eble unu semajnon ekde la lingvotago, eble pli da tempo depende de persona tempohavo –ke vi legos ion klerigan pri iu difinita lando aŭ etno aŭ lingvo aŭ kulturo, kiun vi elektis por la jaro, kaj pri kiu vi nesufiĉe kleriĝis pli frue.

Detaloj: Ne nepre necesas legi ĝuste en Esperanto. Sed, por ke via agado estu esperantista, estus tamen bone, ke vian rikolton vi ie deponu en Esperanto. Ĉu private, en via blogo? Ĉu publike, surbaze de la afiŝemoj de via landa asocio? Tion aranĝu vi kaj viaj samlandanoj. (Se vi malbone verkas en Esperanto kaj timas, ke viaj tekstoj estos kondamnataj, tamen sentime raportu la rezultojn de viaj ekzercoj, mi petas. La lingva kvalito estas nur plia preteksto misuzata de la plendistoj. Ignoru ilin.)

Mian ideon reagordu laŭ viaj lokaj urĝoj. Ekzemple, se vi estas afrikano – aŭ alikontinentano jam kelkajn jarojn helpanta afrikanojn – tiam vi eble ĉiujare elektu plian afrikan landon por post kelkaj jaroj ĉi-rimede atingi pli da tutafrica interkonscio.

Kiel kutime, bonvolu plendi pri la longeco de miaj mesaĝoj kaj la manko de resumo (ĉu vi ne volas ankaŭlumbildaron en la formato Powerpoint?). Mi admiras la diversĝenrecon de viaj plendoj, kaj vi sendube suspektas, ke mi intence longigas la mesaĝojn por provoki plendantojn. Se vi volas truke malinstigi longaĵojn de mi, eble vi povus eĉplendostriki! Atenton, mi skribis ‘truke’, mi tre bedaŭras aŭdi ke vi mislegis tion kiel ‘turke’, mi ja ne havas ion ajn kontraŭ turkoj ĉu esperantistaj ĉu neesperantistaj, mian plej ĵusan bengallingvan libron mi eĉ dediĉis al difinita neesperantista turko, ho ve, mi komencas reklami la proprajn varojn, vere venis la momento halti.

Amike salutas vin,

Probal

<http://probaleo.blogspot.in/2013/02/lingvotaga-mesago-2013.html>

Esperanto en Mazara Del Vallo

M.Arnaud

Mi ricevis subvencion de Eùropa Unio tra Grundtvig projekto

En Mazara del Vallo loĝas pli ol 50 000 homoj el tre diversaj etnoj. Homoj kutimas paroli plurajn lingvojn. La urbestro, Sinjoro Nicola Cristaldi kunlabore kun F.E.I. decidis, ke laŭeble ĉiu lerneano de la urbo lernu esperanton kaj tio efektiviĝis por multaj el ili danke al la laboro de pluraj volontuloj. Dum la jaro 2012 instruis homoj el diversaj landoj : Szabi Szilva el Hungarujo, Konstantin Tiĥomirov el Rusujo, Márta Kovács el Hungarujo, Svetlana Smetanina el Rusujo, ili instruis en la urbo de januaro ĝis la somera ferio.

Mi alvenis en Mazara del Vallo la 3an de novembro 2012. Mi malkovris la urbon, la lokon de la diversaj lernejoj. Mi instruis en Lernejo Grassa sed ĝi havas 2 diversajn konstruaĵojn do mi instruis kaj en lernejo Via Vaccara kaj en alia lernejo Via Gualteiro, la alia lernejo nomiĝas Pirandello- Piazza Marcello. Kimie Markarian, fakulino pri Sorobano sin anoncis por prezenti la japanan kalkulilon dum 2 semajnoj kaj petis mian helpon. Tiel en klasoj mi unue instruis la numeralojn, mi tuj uzis la libreton « Poŝamiko ». Mi kunportis la bezonatan kvanton laŭ la nombroj de lernantoj kaj metis ilin en sekuran ŝrankon. Ili estas lernolibroj uzablaj dum pluraj jaroj. Mi uzis kelkajn paĝojn de la libro de Elisabett Silvics Formaggio « Ludu kun ni » kaj la filmon « Mazi en Gondolando ». En unu klaso la instruistino ĉeestis kaj partoprenis en la kurso, en alia klaso la instruistino ĉeestis sed ne interesiĝis, ŝi ĉefe zorgis pri kelkaj infanoj kiuj suferas pro gravaj mensproblemoj.

Trairante la urbon Kimie mi malkovris interesan lokon « Casa della Comunità Speranza ». La domo staras en la araba kvartalo. Ni estis bone akceptitaj de monahino Paola. Tie renkontiĝas multaj infanoj kiuj venas ĉi-tien vespere por fari sian hejmtaskon en kvietaloko kaj povas ricevi helpon de pluraj plenkreskuloj. Poste ili sidas en salono, kie ili povas ludi kaj babili aŭ ludas ekstere. Tuj Kimie pensis pri Origamio, kaj ni vizitis tiun lokon plurfoje ĉiam tre sukcese. Mi komencis paroli pri Esperanto kaj disdonis kelkajn kalendaretojn aŭ franclingvaj aŭ itallingvaj. La vizitantoj estas ĉefe Tunizianoj kaj pluraj parolas france. Iliaj lernejoj ne elektis proponi kursojn de esperanto sed kelkaj infanoj vere interesiĝas pri tiu lingvo kaj rapide lernas ! sed eblas nur proponi iniciaton al Esperanto. Ne ĉiam la samaj infanoj ĉeestas kaj ne regule mi povas viziti ilin. Nuntempe ni ludas pere de la ludo de Rolande Cleizergues – iu Bingo kun fruktoj kaj legomoj. Unue ni kalkulas kiom ĵetonojn ni bezonas- 13- kaj je la fino de la ludo ĉiu ludinto kalkulas kiom li redonas ... interese ili kalkulas

esperante, france, arabe, sed ne ofte en la itala lingvo ! Kelkaj tre rapide lernas la diversajn nomojn kaj bone ripetas diversajn frazojn.

Rilate plenkreskulojn, mi ĉefe informis ilin pri la ekzisto de internacia lingvo kaj de la kreado de C.E.I. Centro por Esperanto kaj Interkulturo en ilia urbo.

Mi kunlaboris kun du aliaj volontuloj, Nina Pietuchowska kaj Przemek Wierzbowski el Pollando kiuj instruis en aliaj lernejoj. Jean-Pierre Boulet venis el Francio por helpi al ni. Ambaŭ el ni aperigis artikolon kun foto en niaj lokaj gazetoj – Le Dauphiné Libéré kaj La Montagne. En 2013 instruos tie

Pierre Wegnez el Belgujo, Suso Moinhos el Hispanujo kaj daŭre Przemek Wierzbowski. Mi

opinias ke tiu urbo estas fekunda loko por instruado de la universala lingvo kaj kuraĝigas volontulojn kandidatiĝi por instrui tie.

Gratulon, kara Samideano Bharat K Ghimire!

Ni ne forgesu mencii, kiam ni parolas pri Esperanto, ke en Indonezio proksimume 200.000.000 da homoj parolas la planlingvon Bahasa Indonesia. Oni povas nomi tiun ĉi lingvon "Esperanto de la Indonezia Arĥipelago"...

Amike

Ludoviko kaj Julinjo

De: Bharat Ghimire (estrarano de ILEI) <nespa_bharat@hotmail.com>

Okazis interesa prezentado en internacia seminario organizita de Asocio de Nepalaj Instruistoj de la Angla Lingvo (NELTA), en kiu reprezentanoj el pli ol 30 landoj kunvenis. En la 18a de februaro 2013, Maya Rai kaj mi prelegis pri kiel Esperanto helpas lerni eŭropajn lingvojn. Ankaŭ la prezidantino de NEspA Indu Devi Thapaliya kaj membro Biswa Gautam ĉeestis en la programo.

Ni diskutis pri la alfabeto, vortformado, vortordo kaj gramatiko de Esperanto, komparante ĝin kun la angla kaj penis konvinki la ĉeestantojn ke se oni lernas Esperanton ankaŭ tio certe helpas pli rapide lerni la anglan aŭ iun alian eŭropan lingvon. La fakto estas tio, ke por azianoj ambaŭ lingvoj estas fremdaj, kaj malfacileco kaj mallogiko de la angla malordigas la intereson lerni la anglan kaj ofte oni lernas ĝin nur devigite. Mi donis ekzemplon helpe de du aziaj esperantistinoj, Natura el Koreio (mi ne scias ŝian korean nomon) kaj Indu. Ili ne povis komuniki per la angla kvankam ili lernis ĝin multjare. Malsukcesinte lerni la anglan, Natura penis lerni Esperanton kaj sufiĉe bone sukcesis. Esperanto ludas rolon de pontlingvo. Homoj sentas kontenton ĉar post malmulte da tempo oni povas facile komuniki kun fremdlandanoj. Por azianoj la alfabetoj de ambaŭ lingvoj estas fremdaj. Esperantaj vortoj foje similas al anglaj, ekzemple rivero, tablo kaj birdo. Se oni lernas la anglan post Esperanto oni tuj komprenas multajn vortojn. Mi eklernis la francan antaŭ 20 jaroj, post Esperanto, kaj mi komprenis multajn vortojn tuj post kiam la instruistino elparolis ilin. Mi pli facile trapasis la unuan nivelon kompare kun miaj samklasanoj. Nuntempe oni povas komuniki per Interreto, ekzemple en Fejsbuko kaj ricevi helpon pri la lernado de Esperanto. Ĉar esperantistoj estas tre helpemaj kaj kuraĝigemaj. Se iu esperantisto volas lerni nepalan kun mi, mi estas preta helpi lin aŭ ŝin. Se iu francalingvano petus la saman helpon, mi ne farus tion. Alia grava afero estas ke Esperanto estas logika - preskaŭ ne ekzistas gramatikaj esceptoj - oni dum lernando eĉ povas per logiko krei novajn vortojn. Ekzemple, por krei vorton kiu indikas virinseksan estaĵon, ni uzas la "in" sufikson: kato - katino, viro - virino sed oni foje eldonas "ess" por krei viringenran vorton en la angla - ekzemple, host- hostess,

lione- lioness sed tiu ĉi regulo ne ĉiam funkcias, ekzemple oni ne povas krei bullness, heroess. Se iu lernas la anglan post Esperanto, oni tuj povas trovi vortojn kiujn oni povas logike krei, ĉar oni jam lernas fari tion surbaze de la Esperanto-regularo.

Ni instruis kiel krei vortojn kaj ankaŭ diskutis simplajn gramatikaĵojn de Esperanto. Ĉeestantoj post la prelego starigis demandojn kaj ni laŭkapableco respondis. Multaj el ili ne sciis pri Esperanto antaŭe kaj nun planas lerni ĝin. Ni esperu ke kelkaj el ili lernos nian lingvon. Esperanto ne staras kontraŭ iu ajn lingvo inkluzive la anglan. Fakte oni povas ĝin por pli bone lerni eŭropajn lingvojn. Oni ne devas pensi ke la lingvo nepre kreos belan mondon, sed ĝi certre taŭgas kiel pontlingvo por lerni aliajn lingvojn. La prezentado daŭris 50 minutojn.

Povas esti ke por Esperantistoj nia prelego ne entenis novajn informojn, sed por personoj kiuj ne sciis pri la ekzisto de tiaj pontlingvoj kiaj Esperanto ĝi saĝe estis efika, kaj ni estas feliĉaj ke ni alparolis pli ol 40 ĉeestantoj el diversaj landoj, Nia estonta celloko sendube estos Bangladeŝo por fari similan prezentadon kaj samtempe instrui Esperanton.

Bharat K Ghimire

Ps. Ekde hodiaŭ komenciĝos 10a Himalaja Renkontiĝo en kiu 43 enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj piedvojaĝos al la montaro orienta parto de Nepalo. kaj pli ol tio partoprenos parte.

El niaj leteroj

•

Ni, Hiroŝima Esperanto-Centro kore dankas vin ĉiujn pro viaj kunlaboroj por interŝanĝo de mesaĝoj de la Internacia Virina Tago Hiroŝimo 2013. La interŝanĝo bele sukcesis nur per la punta lingvo Esperanto.

Dank' al vi sume 210 mesaĝoj el 57 landoj kaj teritorioj venis al ni ĝis la limdato, kaj en du lingvoj la japana kaj Esperanto publikiĝos post tagoj ĝis la tago sinsekve ĉe tri urbaj kunvenejoj. Jen, la mesaĝoj el :

Azio : 21 el 10 landoj kaj teritorioj

Ĉinio 3 / Irano 2 / Israelo 3 / Koreio 4 / Malajzio 1 / Nepalo 2 / Pakistano 2 / Tajvano 1 / Uzbekio 1 / Vjetnamio 2.

Afriko : 8 el 6 landoj

Benino 1 / Burundo 1 / Ebur-Bordo 1 / D.R. Kongo 1 / Malio 2 / Tanzanio 2.

Oceanio : 5 el 2 landoj

Aŭstralio 4 / Nov-Zelando 1.

Norda Ameriko : 5 el du landoj

Kanado 2/ Usono 3.

Latinameriko :10 el 6 landoj

Argentino 1 / Brazilo 5 / Kolombio 1 / Kubo 1 / Meksiko 1 / Peruo 1.

Eŭropo : 161 el 31 landoj

Albanio 1 / Armenio 2 / Aŭstrio 4 / Belgio 17 / Britio 3 / Bulgario 6 / Ĉeĥio 6 / Danio 1 / Estonio 1 / Finnlando 1 / Francio 45 / Germanio 9 / Grekio 2 / Hispanio 2 / Hungario 6 / Irlando 1 / Islando 2 / Italio 14 / Kroatio 4 / Litovio 1 / Luksemburgio 2 / Nederlando 4 / Pollando 1 / Portugalio 2 / Rumanio 3 / Rusio 2 / Serbio 6 / Slovenio 3 / Svislando 4 / Svedio 5 / Ukrainio 1.

s-ino OSIOKA Taeko

osioka@mua.biglobe.ne.jp

Hiroŝima Esperanto-Centro

komisiite de la Plenuma Komitato de

la Internacia Virina Tago Hiroŝima 2013

- Saluton el Brazilo!

Bonorde ni ricevis vian tre riĉenhavan Bultenon. Kun ĝojo mi vidis, ke Vi aperigis la artikolon de la verkisto Paiva Netto *La mondo naskiĝis kun muziko*. Nome de la aŭtoro mi tutkore dankas Vin!

Kiel danko ni dediĉas al via koro ĉi tiun eldiraĵon de la edukanto Paiva Netto:

"Kio skulptas nian Animon, tio estas niaj agoj. Ni estas tio, kion ni pensas, parolas kaj faras".

Dezirante sukceson por via nobla laboro,

el la centra sidejo de Legio de Bona Volo (LBV) en la urbo San-Paŭlo,

Maria Aparecida da Silva

www.bonavolo.com

www.tbv.com.br/esperanto

<http://www.paivanetto.com.br/index.php/esp>

- Kara amiko,

Mi bonorde ricevis legajhojn el vi. Koran dankon.

Mi ghojas ke vi civitis la antaŭparolon de n-ro 43 Informilo de Ghemelaj Urboj en via bulteno. Mi raportos pri tio en nia venonta numero.

Amike Wu Guojiang

--- 13年2月3日, 周日, Bardhyl Selimi <bselimi@gmail.com> 写道 :

Noto

La membroj estas petataj pagi la jaran kotizon el 500 lekoj ĉe sinjoro Sajmir Beqiraj, la kasisto.

Sekretariejo

Ni kaj ILEI, UEA, AIS

46a ILEI-konferenco 12-18 julio 2013 en Herzberg am Harz / Sieber -

Programoj allogaj por ĉiuj generacioj! Favoraj partoprenkotizoj (fino de la unua aliĝperiodo: 31.03.2013), malmultekostaj tranoktebloj, kulturaj programeroj, ekskursoj al Hannover, Göttingen kaj al la plej belaj lokoj de la Harz-montaro.

Rabatoj: 50% por la kvindeka kaj 100% por la centa aliĝintoj, subvencio por gejunuloj!

Temoj: Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj, internaciaj projektoj, subvenciebloj, ekzamenoj, literaturo, movada organizado, ktp.

Speciala oferto: Metodika seminario kun Katalin Kovats (edukado.net)

Intensa 24-hora seminario lige al la kongresa programo kaj kun observeblaj lingvokursoj.

La seminarion gvidos Katalin Kovats kaj organizas ĝin ILEI kaj edukado.net kun aktiva helpo de la Interkultura Centro de Herzberg. La seminario estas parto de la ILEI-konferenco, sekve la partopreno ne estas aparte pagenda.

La programo okazos en 6 blokoj - entute 20 + 4 horoj.

Oni laboros ĉefe posttagmeze aŭ vespere por ke la partoprenantoj povu ĉeesti la konferencajn prelegojn kaj programojn matene. Dum la tuttaga ekskurso ne okzos seminario.

La formo de la seminario estos: prelegoj ene de la seminario kaj ekster ĝi en la konferenco, aktivaĵoj, observo de kursoj.

La detalan programon kaj la eblon aliĝi vi trovas en la paĝaro de la aranĝo:

<http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de/page.php?pid=44865573>

Bonvenon al ĉiuj interesiĝantoj al tiu grava, interesa, internacia renkonto!

En la nomo de LKK:

Zsafia Korody

vicprezidanto de ILEI

prezidanto de AGEI

(Interkultura Centro Herzberg

DE-37412 Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo

Grubenhagenstr. 6

Tel: 0049-(0)5521-5983

<http://esperanto-urbo.de>

Retpaĝo por la albanaj esperantistoj

Prof. Renato Corsetti lanĉis la ideon de stariĝo de tia retpaĝo.

Renato:

Bone, mi interkonsilighos kun Aurora pri la serĉo de la helpo.

Nu, tio estas problemo por Albanio, Makedonio, sed ankaŭ por Rumanio.

Ni, ĉi tie, havis promeson pri helpo flanke de distriktaj instancoj, kie estis direktoro pri financoj ekskolego mia, sed pro politikaj shanghoj, la afero fiaskis.

Estus vere utila tia pagho...Eble, por shpari la fortojn kaj eventualan monon, taugus komuna pagho por la tri landoj.

Aurora Bute

Kampanjo por starigi kontaktojn de AIS kun niaj ŝtataj universitatoj

Mi renkontiĝis kun la rektoro de la politeknika universitato en Tirana, starigis antaŭ li la ideon de iu interkonsento inter AIS kaj tiu universitato por kunlaboro. Mi provizos lin per informajoj pri AIS kaj nia ĝisnuna kunlaboro kun AIS. Mi klarigis al s-ro Jorgaq Kacani, akademiano, rektoro envorte, ke la profito deflanke de nia universitato estus sufiĉe granda pro kelkaj kialoj:

- nian universitaton vizitus per prelegoj elstaraj profesoroj el la prestiĝaj eŭropaj kaj neeŭropaj universitatoj, interalie probable ankaŭ la nobelisto Selten

- Niaj studentoj povus ĝui je relative malaltaj prezoj la tutoradon kaj gvidadon de fremdaj profesoroj por magistriĝo kaj doktoriĝo en siaj fakoj

- La diplomoj (bakalaŭreco, magistrecio, doktoreco) de niaj studentoj akirotaj ĉe AIS estus tuj agnoskataj de nia ministerio pri edukado ĉar ilin anticippe estus agnoskotaj de la universitato mem.

(ĝis nun ĉirkaŭ 30 niaj eksdiplomiĝintaj studentoj ĉe ISTK-AIS ne povas uzi siajn diplomojn enlande, ĉar ilin ankoraŭ ne agnoskis nia ministerio pri edukado)

- La profesoroj de AIS estas tre kleraj personecoj, tamen modestaj, kiuj ne postulas tro da komforto kaj elspezoj dum iliaj vizitoj ĉe ni.

La rektoro komisiis sian vicrektoron, prof Frederik Premti, (cetere mia konato), por ricevi ĉian informajon pri AIS kaj poste akceptu la oficialan proponon por interkonsento far de AIS senato.

Paralele mi agos similmaniere ankaŭ ĉe Socia Universitato de Tirana, kies rektoro estas prof. Dhori Kule, (tion jam faris) Medicinista Universitato kaj Agrikultura Universitato (farite) (ĉiuj ŝtataj).

Estus bonvenaj informajoj pri la ĝisnuna sperto kaj praktiko de kunlaboro de AIS kun universitatoj en Rusio, Rumanio, Slovakio ka.

Eble aŭtune ni aranĝos, kunlabore kun ĉi tiea Akademio de Sciencoj kaj universitatoj supre menciitaj internacian simpozion pri Esperanto, albanologio, turismo en Albanio aŭ defioj de Albanio antaŭ ol eniri EU, aŭ io alia ĉeftemo.

Mi opinias ke, per tia entrepreno, ni povus ankoraŭfoje tenti eniri en la universitatoj niaj kaj samtempe varbi tie novajn potencialajn esperantistojn (la studentoj kiuj akceptos tutoradon far profesoroj de AIS certe unue ellernus Esperanton..)

Bardhyl Selimi

Reago de prof. Quednau

2013/3/14 H.-D. Quednau <quednau@mytum.de>

Mi elkore gratulas al vi pro viaj ĝisnunaj sukcesoj en via laboro por Esperanto kaj AIS. Eble helpas al vi, se vi prezentus al viaj partneroj la retan instrutekon de AIS, troveblan sub <http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/stru/>

La kursoj estas libere uzeblaj de iu ajn studemulo, kaj kontaktante la aŭtoron oni povas per ili ricevi studunuojn (kreditpoentojn) de AIS. Eble ankaŭ albanaj altlernejoj estas pretaj agnoski tiujn studunuojn.

Ankoraŭ la enhavo de la instruteko ne estas tre granda, sed se de iu mondparto venus signalo, ke estas bezono pri specifa temo, tiam verŝajne troviĝos specialisto, kiu povus tion prizorgi.

Elkore salutas

Dieter Quednau

Prof. Dr. H.D.Quednau

Forstwissenschaften

Hans-Carl-von-Carlowitz-Platz 2

DE-85354 Freising

Dankon

Oh kara, dankon por via reago kaj sugestoj. Mi fakte intencis alskribi vin rekte pri tiu afero. Mi komprenas ke pli efika maniero por allogi studentojn al Esperanto estas interesigi ilin pri la studado ankaŭ per Esperanto, tra AIS kursoj eĉ interretaj. Pro tio mi kontaktis jam du rektorojn de la plej grandaj ŝtataj universitatoj en Tirana, tiu Socia kaj tiu Politeknika. Mi sciigis ilin pri la valoroj de AIS profesoroj, pri ilia ĝisnuna sperto en pluraj orienteŭropaj landoj, pri la profito kiun niaj universitatoj ekhavas danke al la kunlaboro kun AIS. Mi estas atendente pozitivan reagon de tiuj rektoroj. Tiam mi petos vin trovi eblecon por alveni ĉi tie kaj kontrakti kun la koncernaj universitatoj por kunlaboro. Eble unue estus konsilinda venigi ĉi tie mem la prezidanton Maitzen por lekci pri astronomio en fakultato de natursciencoj, vin mem pri kibernetiko en fakultato de informadiko, s-ron Selten pri ekonomiko ktp. Ni vidu.

Mi dankas ankoraŭfoje por via intereso kaj helpemo. Ni restos en kontakto, amike via Bardhyl

Ni kaj ILEI, UEA, AIS

Nova estraro de la Albana ILEI-sekcio

Al ILEI- estraro

Mi volas sciigi vin ke la Albana Esperanto Asocio jam renovigis sian leĝecon ĉe la juĝejo de Tirana. Branĉo de tiu asocio estas nia ILEI sekcio, je la nomo Albana Esperanta Instituto, kaj siglo kaj stampo samnome.

Ni okazigis la elekton de la nova estraro por la periodo 2013- 2016. Jen ĝi:

Prezidanto:

Bardhyl Adem Selimi,

68 jara, eksa instruisto de matematiko, hejmadreso: rr. Fortuzi nr 9 shk 1 ap 3 Tirana 1016 Albania, tel hejma 0035542238558, telefono portebla 00355682580758, email: bselimi@gmail.com, bardhylaselimi@yahoo.com

Sekretario kaj kasisto:

Gjergji Tasi Gusho

70 jara, eksa instruisto de la rusa kaj itala, hejmadreso: Rr Deshmoret e Pojskes, pallatet e reja, Pogradec 7300, Albania, hejma telefono 0035583222326, portebla tel 00355682703259, email: gjergji_gusho:[yahoo.com](mailto:gjergji_gusho@yahoo.com),

Vicprezidanto:

Nehat Mexhit Sokoli

45 jara, instruisto de biologio, hejmadreso: Lagjia 4 Pall 4shk.3 ap 6, Kukes 8500 Albania, hejma telefono 0035524222755, portebla 00355682587699, email: nehatsokoli@gmail.com

Nik Ukcama

La aktivecoj dum la jaro 2012

(Raporto de Albana Esperanto- Asocio, laŭ peto de s-ino Aurora Bute)

Kvankam oni ne estis renoviginta la juran staton de Albana Esperanto- Ligo ekde la jaro 2001, la aktivecoj de esperantistoj neniam ĉesis.

Por la jaro 2012 mi povas mencii interalie:

- Kampanjon por enkonduki la Esperanto instruadon en la ŝtataj universitatoj, precipe en ĉefurbo Tirana.

Tiucele ni kontaktis persone la respondeculojn ĉe Fakultato de Filologio, Fakultato de Fremdlingvoj, Fakultato de Natursciencoj. Ni sendis leteroj ankaŭ al respondeculoj de universitato de la urbo Shkoder, kaj pli vaste en la urboj Prishtina (Kosovo) kaj Tetovo (Makedonio).

Por apogi nian demandon ni prezentis al tiuj respondeculoj pli ol 15 mesaĝojn dulingvaj senditaj aparte de profesoroj esperantistaj el diversaj fakultatoj en la universitatoj el Eŭropo, Amerikoj, Azio. (Menciindas profesoroj Renato Corsetti, Probal Dasgupta, ka)

Krome ni provizis ilin per certaj argumentoj lingvaj, sociaj, edukaj.

Bedaŭrinde, finfine, la lernokursoj ne malfermiĝis. La dekanato de fakultato de Fremdlingvoj, s-ino Klodeta Dibra pravigis tion per la fakto ke la lingva politiko de la registaro ne favoras aliajn lingvojn krom la angla. Tiel draste reduktiĝis laŭ ŝi ankaŭ la programoj por la franca, itala, germana, hispana kaj aliaj naciaj lingvoj.

- Okaze de 125 jariĝo de Esperanto enmondo kaj 105 jariĝo de tio en Albanio ni proponis al la albana poŝtoservo emisii poŝtmarko(j)n je temo Esperanto kie oni povus mencii la unuajn esperantistojn albanaj, nian kreinton Zamenhov ks. La poŝtoservo aprobis ĝin sed poste la ministrejo pri teknologio kaj novacio neglektis.

- Ni skribis al la ministro pri konstruado kie tradicie ekde la jaro 1950 funkcis esperantista klubo radiantanta en la tuta lando kie sin distingis ing. Ĉefo Fico, Vasil Pistoli, Gafur Muĉo ka ke oni revigligu la klubon, helpe de esperantistoj ekster ĝi. Sed novaj gvidantoj simple ignoris tion.
- Ni skribis la la urbestro de Tirana, s-ro Lulzim Basha ke oni enkonduku lernokurson tie cele por ĝemeligu nian urbon kun aliaj urboj enmonde konforme la la programo de ĝemeligaj urboj. Same petis helpon por konferencejoj, kursejoj, sidejo. Ĝis nun nenia pozitiva reago.
- Propagando per skribita kaj elektronia medio. Januare kaj aprile 2012 estis aranĝitaj specialaj intervjuoj en la ĵurnaloj kaj televizioj pri la valoro de Esperanto en aspektoj de komunikado kaj instruado de fremdlingvoj en la lernejoj.
- Tradukado de certaj verkoj el la albana al esperanto kunlaborante kun polaj samideanoj. Tiel aperis la romano HUNDA HAŬTO de la renoma albana verkisto Fatos Kongoli, poemaro de Luljeta Lleshanaku, ka. Tia laboro daŭras sukcese kaj havis efikon en la sentemigo de la publika opinio. Ĉikadre ni enkomputiligis la unuan libron esperantistan albanan, biografion de nia nacia heroo Skanderbeg, verkite originale de esperantisto Cuk Simoni kaj eldonite en la jaro 1929. Ni proponis al la ministerio pri kulturo ke oni reeldonu tiun libro ankaŭ enkadre de solenaĵoj okaze dse 100 jariĝo de sendependeco de Albanio. Sekvis indiferenteco fare de direktorejo pri la libroj en tiu ministrejo. Ankaŭ certaj esperantistaj eldonejoj (FEL, UEA, ka) ne entreprenis la eldonadon.
- Eldonado de la reta dumonata Bulteno de la Albana Esperanto- Instituto kie krom la diskuto de problemoj asociaj aperis multaj esperantaĵoj.
- Kompilado de la bazaj juraj dokumentoj por renovigi la leĝecon de la asocio ĉe la juĝejo. Grupo de ĉirkaŭ 20 esperantistoj kunvenis decembrofine en Tirana por aprobi ĉi tiujn dokumentojn kaj starigi komisionon kiu prizorgos la revigligon de la asocio. Provizore oni elektis novan prezidanton ing Shaban Hasani, sekretarion s-ron Mgr. Bardhyl Selimi kaj kasiston sinjoron dr. Sajmir Beqiraj. Post la morto de la prezidanto de la albana sekcio de ILEI, s-ro docento Vasil Pistoli, ties oficon entreprenis Bardhyl Selimi, interkonsentite kun s-ro Stefan McGill. Substrekindas ke nia sekcio pagis regule ĉiujare la kotizon ĉe ILEI, Espereble ene de februaro la juĝejo aprobos la novan albanan esperantistan asocion, post kiam ni kuraĝos alfronti kian ajn defion rilate la enkondukon de Esperanto en la eduka sistemo, la propagandon, eldonadon ktp.
- Individue pluraj membroj varbis novajn kursanojn de Esperanto, ĉar la edukaj instancoj ankoraŭ bremsas kiun ajn iniciaton por enkonduki la instruadon en la lernejoj, kiel tion ni faris senprobleme en la unuaj jaroj post 1990.
- Aktuale ni spertas financajn problemojn, ekzemple por pagi la juran proceson, registriĝon ĉe impostaj organoj, eldonadon de flugfolioj, luadon de konferencejoj, kursejoj ktp.

Nehat Sokoli

Konciza historio de Albana Esperanto- Asocio

(Okaze de 22 jariĝo)

La historio de Esperanto en Albanio komenciĝas ekde la jaro 1907 kiam Lazer Shantoja, pastro katolika kaj poeto iniciis la disvastigadon de IL ankaŭ en nia lando.

Lin sekvis aliaj intelektuloj renomaj kiel Mark kakariqi, Mikel kaj Vilhelm Koliqi, Cuk Simoni, Janko Pali, Ĉefo Fico, Hamdi Sulĉebe. Cuk Simoni verkis originale en Esperanto la historian libron pri la nacia heroo albana Gjergj Kastrioti- Skanderbeg kiun li eldonis en la jaro 1929. Ĉefo Fico eldonis la ŝlosilon por albanoj.

Post la dua mondmilito aperis aliaj disciploj kiel Zef Mjeda, Vasil Pistoli kaj Astrit Leka. (Hodiaŭ vivas nur ĉi tiu lasta, 88 jara). Ĉefo Fico starigis ne oficialan lernokurson kaj klubeton en ministrejo pri konstruado kie li deĵoris. Tiam sin distingis ankaŭ Gafur Muĉo, kiu fondus en la jaro 1991 neregistaran organizaĵon Albana Esperanto- Ligo, el la unuaj albanaj neregistaraj organizaĵoj enlande. Sed la komunisma reĝimo ne permesis la agadon de neregistaraj organizaĵoj kvankam ne malhelpis la starigon de lernokursoj en la tiamaj kulturdomoj de la dekretitaj sindikatoj. En tiuj lernokursoj eklernis pluraj studentoj kaj ordinaraj civitanoj, inter ili ankaŭ Shaban Hasani, Bardhyl Selimi, Gjergji Gusho, Agim Peraj, Bahri Peraj, Luan Jaupi, Tonin Cobani, Klarita Agasi, Rita Permeti ka. Pro cenzuro severa ankaŭ tiuj kiuj lernis Esperanton timis korespondi kun eksterlandaj samideanoj kaj ricevi revuojn eldonataj tie.

En la jaro 1967 aperis dokumentara filmo pri la urbo de Gjirokster kie aŭdiĝis en Esperanto ciceronado de Vasil Pistoli.

Printempe 1991 la registaro aprobis la fondiĝon de AEL kie adheris tuj la eksaj esperantistoj. Ĝi ekpublikigis paperan bultenon kaj klopodis interrilatiĝi kun alilandaj esperantistoj kaj organizaĵoj. Zef Mjeda kompilis lernolibron akompanata de vortareto, same faris Vasil Pistoli, kies vortareto estis kvinlingva. En la jaro 1993 fondiĝis la instruista filio de AEL kiun tuj agnoskis ILEI. Ĉi sekcio tuj komencis starigi kaj gvidi lernokursojn en Tirana, Durres, Lezhe, Pogradec. Ene de kelkaj jaroj en tiuj lernokursoj eniris centoj da studentoj ekde elementa lernejo ĝis universitataj fakultatoj. ILEI sekcio (alinome Albana Esperanto Instituto) liveris diplomojn por la elementa scinivelo al almenaŭ 450 gestudentoj. Inter tiuj menciinda Zamir Gjurgji, Sajmir Beqiraj, Enkela Xhamaj ka. Kunlaborante kun Internacia studumo en Bydgoszcz diplomiĝis almenaŭ 30 niaj studentoj pri turismo kaj kulturo internacia. Inter tiuj mencinda Ariel Myrazi, Ereid Dhimitri, Matilda Sokoli, Fioralba Ceno (Sadiku), Egli Brati ka. Ankaŭ en la lernokursa kvarmonata en Karlskoga (Svedio) diplomiĝis Piro Karajani kaj Mimoza Bunjaku.

Dume aperis la lernolibro de Bardhyl Selimi kaj alia lernolibro de Agim Peraj. La lernolibro de Gjergji Gusho ankoraŭ ne eldoniĝis. Sekvis la tradukoj diversaj de la Albana al Esperanto kaj inverse. (Nova Realismo de Fogelman, La faŝismo de Zhelev ka).

Albanaj esperantistoj partoprenis en kelkaj UK kaj aliaj kunvenoj kaj konferencoj regionaj kaj eŭropaj. Ili propagandis per artikoloj kaj intervjuoj en ĵurnaloj kaj TV.

En la jaro 2001 la registaro ordonis ke ĉiuj neregistaraj organizaĵoj registriĝu ĉe juĝejoj. Sed ni neglektis tion longajn jarojn.

Ankaŭ la edukinstancoj ignoris ĉiujn niajn klopodojn por daŭre starigi lernokursojn en la lernejoj. Tiel ni komprenis la gravecon de la leĝigo de nia organizaĵo. Dume entreprenis fortan kampanjon por enkonduki Esperanton en universitato, sed sensukcese pro anglema lingva politiko de la registaro. Sed alia tento sekvis: la traduko de la elstaraj verkoj de la albana literaturo en Esperanton. La traduko de la romano Hunda Haŭto de Fatos Kongoli, aŭ “dua K” (la unua K estas la renoma internacie jam Ismail Kadare) ĝuis grandan eĥon en la gazetaro lastan jaron. Tio kuraĝigis nin por plutraduki kunlabore kun polaj esperantistoj gvidite de Tomasz Chmielik aliajn verkojn, ekz. La romanon Palaco de la Songoj de Ismail Kadare, novelojn de Ylljet Alicka, poemarojn de albanaj poetoj el Albanio, Kosovo kaj Makedonio.

Februare 2013 ni sukcesis finfine leĝigi nia asocion, espereble ke post tiu evento nia movado antaŭeniras pli certa enlande.

Agim Peraj

La renovigo de la jura leĝeco de la albana esperanto asocio

Al estraro de UEA

Estimataj, antaŭ nelonge refondiĝis la esperanto- asocio de Albanio. Ni kunsendas la kopion de la juĝeja decido tiucele.

La asocio elektis novan estraron kiel jene:

Prezidanto: Shaban Hasani, magistro, inĝeniero, 68 jara, adreso: Rr Hajredin Shtino nr 30, shk 1 ap 30 Tirane, Albania

Sekretario: Bardhyl Selimi, imagistro, instruisto 68 jara, adreso Rr Fortuzi, 9/1/3 Tirane 1016 Albania

Kasisto: Sajmir Beqiraj, biologo universitata instruisto, adreso: Rr Don Bosko 1/38 Tirane Albania

Ni kunsendos nomliston de nia membraro, la statuton kaj koncizan historion de nia agado.

Ni akceptas la statuton de UEA.

Espereble UEA akceptos ankaŭ nian asocion kiel ties membro.

Atendante vian respondon, ni esprimas nian altan konsideron por ĉiuj vi.

Prezidanto

Gjergji Gusho

Tirane , la 19-an de februaro 2013

Ni kondolencas

Laŭ la anonco de s-ro Radojica Petrović <radojica.petrovic.rs@gmail.com>

Boriša Milićević, diplomita filologo kaj multjara direktoro de Esperanto-Instituto de Serbia Esperanto-Ligo, naskiĝis la 14-an de oktobro 1931, esperantistiĝis en la jaro 1953 kiel studento en Beogrado, kaj forpasis la 2-an de februaro 2013. Ĝis antaŭ nur kelkaj tagoj li komunikis kun aliaj E-institutanoj pri aktualaj aktivaĵoj kaj novaj planoj.

Boriša estis kunfondinto de Studenta Esperanto-Klubo en Beograd kaj li plenumadis diversajn funkciojn en pluraj Esperanto-societoj kaj en Vojvodina, Serbia kaj Jugoslavia Esperanto-Ligoj. Li estis ĝenerala sekretario de Tejo (1955-56), A-komitatano de UEA el JEL (1977-1979, 1983-1986, 1992) kaj UEA-delegito en Novi Sad. Lia E-agado lasis profundajn spurojn sur la kampoj de E-instruado, E-ekzamenoj, tradukado el kaj al Esperanto, E-bibliografio kaj ĵurnalismo, kun multaj verkoj publikigitaj libroforme, en Esperantaj kaj nacilingvaj revuoj, aŭ kiel konferencaj prelegoj. Lia forpaso signifas grandan perdon por la serbia kaj internacia Esperanto-movado.

Noto: je la nomo de la albana ILEI- sekcio mi kondolencas la serbajn samideanojn. Borisa estis ege interesata ankaŭ pri nia kulturo kaj deziris kunlabori kun ni. Li estas tradukinta en Esperanto kelkajn poziaĵojn de Miloš Gjergj Nikoll (alie Migjeni) kiujn ni aperigis en nia Bulteno.

Matilda Sokoli

Ni dankas

Antaŭ nelonge, s-rino Adrienne Foldi Pasztor, el Hungario, donacis sian libron “Danco de Feinoj”. La libro entenas en siaj 176 paĝoj rememoraĵoj, eseoj, teatraĵoj. Ni dankas ŝin elkore



Same, s-ino Julia Sigmund donacis sian libron DIALOGO, kie entenatas ankaŭ la albana traduko. Vidu. Ni dankas ŝin elkore



Rita Permeti

Ankaŭ Eŭropo bezonas vian helpon

Eŭropo estas multspeca. Ekzistas riĉa Eŭropo kaj ekzistas malriĉa Eŭropo. La eŭropa komisiono de UEA interesiĝas pri ĉiuj Eŭropoj, por ke Esperanto vivu ĉie en nia kontinento. Tute aparte ĉi-jare ni klopodas revivigi kaj reorganizi la movadon en Albanujo. En aliaj mesaĝoj ni parolos al vi pri aliaj esperantisme malfortaj landoj.

En la kadro de nia 'Projekto Albanujo' ni bezonas helpi albanajn esperantistojn registri sian landan asocion laŭ la nunaj albanaj leĝoj kaj produkti iom da komencaj informiloj en la albana.

La eŭropa komisiono mem apartenas al la 'malriĉa Eŭropo'. Ni havas en la konto 'europo' ĉe UEA nur la reston de donaco de 100 eŭroj, kiujn ni estas elspesantaj en Kipro, kie finfine ekestis Esperanto-kurso.

Sed ni fidus je la solidareco de esperantistoj. Ni ne bezonas multon, sed certe iom da centoj da eŭroj. Bonvolu helpi nin helpi la albanajn esperantistoj kaj poste ankaŭ aliajn. Sendu vian kontribuon (malgrandaj helpoj estas aparte ŝatataj) al la konto 'europo' ĉe UEA laŭ via kutima pagmaniero al UEA [jarlibre: paĝo 35-a aŭ rete:

http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html]

Vi povas helpi ankaŭ alimaniere. Aĉetu ĉe Bardhyl Selimi, bselimi@gmail.com>

<http://us.mc1206.mail.yahoo.com/mc/compose?to=bselimi@gmail.com>>, la

romanon "Hunda haŭto" de la albana renoma verkisto Fatos Kongoli, en

Esperanto, (15 eŭroj inkluzive de sendokostoj) aŭ la dulingvan Esperanta-polan libreton "La polino" de la albana verkisto Bajram Karabolli (8 eŭroj inkluzive de sendokostoj).

Antaŭdankojn pro via helpo!

Aurora Bute

flanke de la Europa Komisiono

Noto:

Ĉikadre la Triesta Esperanto-Asocio aĉetis tri ekzemplerojn de la Hunda Haŭto pagante 40 eŭroj. Same s-ro Otto el Aalen aĉetis 1 ekz. de Hunda aŭto kaj 2 ekz. de La Polino sed deponis donace al UEA komisiono 100 eŭroj je konto de projekto Albanujo.

Ni dankas ambaŭ elkore.

Saimir Beqiraj

Kara Amiko nome de Bjalistoka E-Societo mi sendis al UEA disponon transdoni vian konton 50 eŭrojn Prosperon!

Amike Ela



Albanaj esperantistoj Mimoza Bunjaku (Blomberg), Bardhyl Selimi, Gjergji Gusho, Shaban Hasani fotiĝis en la Akademio de Sciencoj aprile 1012 kune kun kelkaj polaj (Ela maldekstre) kaj litvaj esperantistoj

| mi emas subteni la helpon al Albanujo. Bedaŭrinde la libron de Fatos Kongoli ni jam havas en la Germana E-Biblioteko, sed eble estus bone, ankaŭ havi duan ekzempleron. La alian libreton ni ankoraŭ ne posedas (Bajram Karabolli).

Do mi proponas: se vi zorgas, ke "oni" sendu al la adreso de nia afergvidanto

Karl Heinz Schaeffer

Schulstr. 17

DE-73432 Aalen

1 ekzempleron de la libro "Hunda haŭto" kaj 2 ekzemplerojn de la libro "La polino" mi tuj rekompence (aŭ eĉ: antaŭ ol la alveno - sufiĉas, se vi promesas la sendadon) ĝiros 100 Eŭrojn al UEA kun indiko "por la konto 'Eŭropo'/Renato Corsetti, uzante la konton jenan: Germanio (Köln): 3182 91 509 BLZ 370 100 50; IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09; BIC: PBNKDEFF

Noto: Karaj, mi jam zorgis, ke la promesita mono estas en la konto de UEA, almenaŭ jam en ĝia Germana banko.

Kiel foruzi la sumon, tion certe bone scias Renato.

[kompreneble la mono ne venas el la biblioteko, sed esta mia privata subteno]

Shaban Hasani

Artikoloj




Sanije Gashi

(okaze de datreveno de ekbombardado de Serbio far NATO je 24-an de marto 1999)

Teruraj historioj 1998-1999

Fragmento



La kovriloj de la libro

...Vilaĝo Celin el 300 domoj kaj 3500 loĝantoj.

Selman Zeqiri, gastlaboristo en Germanio nun havas nur filon, Valon-on. La edzino, Sebahat, kun du aliaj filoj, ne plu vivas; nek la frato, Bajram, kvinope, kun la edzino kaj tri gefiloj, nek la patrino kaj kvar filoj de la onklo, unu el ili kun la edzino kaj gefiloj..

Valon rakontas:



Valon hodiaŭ

La 25-an kaj 26-an de marto 1999 la serbaj fortoj okupis la vilaĝon. Oni ekpafadis ekde la 5-a de mateno en la malantaŭa parto de Celin. En la loko nomata Pisjak, ariĝas krom la vilaĝanoj ankaŭ homamasoj el Hoqa e Vogel, Bellacerka, Nagavci, entute ĉirkaŭ 7-8 miloj.

Miftar Zeqiri, la familia kapo, petas virojn ke ankaŭ ili iru, mem restas hejme por zorgi la virinojn kaj la infanojn. Dume la serbaj fortoj eniras la hejmon, forprenas la dommastron, la virinojn kaj la infanojn, venigas ilin malantaŭen de la domo, en la apuda deklivaĵo kaj ekzekutas ĉiujn: Miftar-on (63 jara), ties edzinon Sanije (60 jara), la novelzinojn, Sebahat-on kun filoj Altin (10 jara) kaj Bledar ((8 jara), Myrvet-on (33 jara) kun gefiloj Alma (2 jara), Alban (5 jara) kaj Albulena-n (10 jara), Myrvete-n (42 jara) kun Besart (10 jara), Burbuqe (13), Elbasane (19 jara), Suzana (21 jara), Nazlije (26 jara)..



La popolo salutas la soldatojn de NATO-o

La etulino Alma, kiun estis portante Myrvete, dum iradis en la morta vojo, pafita per kugloj, ekfalas apud la patrino, same sangumita. Ambaŭ patrino kaj filino porĉiame fermis la okulojn.

Bajram Zeqiri, kun Valon manenmane kaj kvin aliaj viroj, post kelkaj horoj revenas hejmen por vidi ĉu okazis io al siaj gefamilanoj. Sed la serbaj fortoj plurestis en ilia hejmo atendante. Ĝus ili eniris, la serboj kaptis kaj ordonis ke ili kuŝu surtere ĉe deklivaĵo kun la manoj malantaŭe. Same agas ankaŭ la 12 jara Valon.



La soldatoj de NATO-o estas bonvenaj en Kosovo

Tiumomente, iu serbo ordonas Valon-on ekstari kaj rigardu la scenon de iu ŝtono apude.

Sekvis batado de familianoj. Oni tiradis ilin per hararo, kunfrapigis la kapojn al la deklivaĵo, sangumigis, returnigis, frapis per fusilo en diversaj sentemaj korpopartoj, precipe en genitaloj, poste insultadis, kriegis, denove frapis al la sangumitaj kapoj...Estis ĉirkaŭ dek policistoj turmentantaj...

Post fizikaj turmentaĵoj kaj humiligoj, venigis ilin kelkajn metrojn pli fore kaj ekzekutis ĉiujn: onklon Bajram, Naim-on, Brahim-on, Hamet-on, Gezim-on..Tio okazis ĉirkaŭ la 3-a posttagmeze de la 25-a marto 1999.

Krushe e Vogel kaj Krushe e Madhe

En la vilaĝo Krushe e Vogel, kiam eniris la serbaj hordoj, la homoj ankoraŭ dormis. Ili bruligis la domojn, persekvante samtempe ĉiujn.

Ĉekape de la vilaĝo vivas la familio Berisha. En la jaro 2001 tie loĝas nur tri personoj, la bopatrino, novedzino kaj nepo: Hanemshane Batusha, 70 jara kun la juna novedzino, Shemsie, 29 jara, kaj ties filo, nun 4 jara. La 26-an de marto 1999 oni mortigis kaj bruligis 8 ties familianojn: tri filojn- Zaim-on (47 jara), Ahmet-on (43 jara) kaj Milaim-on (32 jara) kun ties filojn- Fehmi-on, Mergim-on, Behar-on, Burim-on kaj Lirim-on 14 jara! La murdistoj alvenis kun tranĉiloj enmane.



La tomboj en Krushe e Vogel

La matenon de 26-a de marto 1999 la vilaĝo sieĝiĝis de tankoj.. Komenciĝis la bruligo de domoj unu post la alia.. La vilaĝanoj hastis ariĝi ĉerande apud la domo de Batusha. Eniris mian hejmon la lokaj serboj maskite, la ceteraj senmaskite. La samaj serboj kun kiuj niaj filoj kunlaboris en la kantinoj de brando, restintaj, manĝintaj kaj drinkintaj kune. La maskitaj serboj ordonis albane ke la viroj disiĝu disde la virinoj kaj infanoj. Mia filo portis surbruste ties filon dujaran, kiu ne volis disiĝi kriante. Oni forprenis ankaŭ knabojn 13-14 jarajn.

Entute 120 masklojn oni elirigis en la straton kun manoj surnuke. Dume du serboj lokaj, Culi kaj Rade diris al virinoj: Nun iru kaj dronu en la riveron Drin aŭ foriru al Albanio! Ĉar vi mem volis tion, volis NATO-on! La virojn oni enirigis en la ĉambron po duope kaj pafmortigis. Poste ties kadavrojn portis kaj ĵetis en la riveron. La novedzino atestas ke ŝi trovis ĉe la riverbordo virajn vestoj, botojn. En la alia vilaĝo, Krushe e Madhe, oni mortigis ĉirkaŭ 250 homojn.

Jetmir Duraku rakontas:

tri unuajn tagojn post la NATO bombardoj, la serboj mortigis lian patron, Xhemal kaj onklojn Ibish, Malush, Jakup kaj Xhevat. Tio estas la kvin filojn de Muharrem Duraku. En Krushe e Madhe serboj estas uzintaj krematorion. Entute estis ekzekutitaj 241 homoj. Oni trovis poste du amastombejojn, 2 krematoriojn kaj multajn individuajn tombojn. Estas ĉirkaŭ 800 bruligitaj domoj kaj la moskeo. Pluraj homoj estas ekzekutitaj per kuglo enbuŝe!. Estas junaj novedzinoj kaj etaj knabinoj murditaj kaj bruligitaj! Restis 139 vidvinoj kaj 500 orfoj!

Esalto el la morta kamiono de la virinoj - "kadavroj"

Tagmezon de 26-a de marto 1999 la specialaj unuoj de la polico serba entreprenis tiel nomatan "teritorian kombadon" en la triangulo Suhareke- Rahovec- Prizren.

Rakontas Vjollca Berisha:



Vjollca Berisha

Shyhrete Berisha perdus la edzon, Nexhat, 46 jara kaj kvar siajn gefilojn: Majlinda- 16 jara, Herolinda- 14 jara, Altin-on 11 jara kaj Redon-on 2 jara. Ekde la 5-a horo de 25-a de marto en nian hejmon eniris perforte policistoj kaj metante sur niajn brustojn siajn aŭtomatikojn kriegis: kie estas la usonanoj, kial ili ne venas savi vin!? Poste ili postulis de ni monon. Ni estis devigitaj doni ĉiujn niajn ŝparaĵojn, kelkmilojn da germanaj markoj.

Inter la policistoj estis ankaŭ Milorad Niŝaviĉ- Miŝko, ĉefo de urba UDBA. Ili revenis la morgaŭon. Ni estis ariĝinta en la hejmo de la onklo Vesel, entute 25 homoj. Malantaŭ la domo estis du tankoj. Loka serba policisto, Zoran, gvidis taĉmenton de 30 policistoj. Zoran vokis albane Bujar-on, filon de onklo Vesel ke li eliru en la korton. Ekis paniko enhejme. Ĵus Bujar eliris, oni pafis sur lin, faligante mortan. La frato de Bujar eliris por demandi pri la kialo de mortigo. Sed ankaŭ lin faligis mortan surtere.



La albanoj marŝas piede je la direkto de la landlimo por savi siajn vivojn


Poste forprenis la bofraton Nexhmedin-on, 36 jara, inĝeniero, Faton-on 29 -jara, kaj pafmortigis ĉe la muro. Mortigis ankaŭ Lirije-n, virino 27 jara, instruistino, naŭ monata graveda, kiu hastis savi la edzon. Restis nur virinoj aliaj. Oni ordonis ke ni ariĝu en la picejo "Kalabria" en la komerca centro kien oni irigis ankaŭ alian homamason,



Knabino perfortita kaj poste murdita de la serbaj soldatoj kaj policistoj

Tie daŭris la pafado fare de policistoj sur ĉiujn civilulojn, entute 60. Vjollca Berisha troviĝis tie kune kun siaj gefiloj Gramoz 10 jara, Drilon 14 jara kaj Dafina 16 jara. Oni ne kompatis eĉ la infanojn. La unua falis la filino de Shyhrete, Herolinda, poste mia filino Dafina. Oh Dio, mi vidis la sangon elverŝante el ŝi kaj ne povis helpi.

Oni daŭrigis per bombojetoj. Al Redono 2 jara tio kaŭzis la kranofendon! Ankaŭ mi, trafita de mangrenadoj, svenis. Rekonsciĝinte mi vidis la knabon Gramoz kiun oni estis pafinta per kuglo surkape.



Difektita vizaĝopro torturoj kaj masakroj far serboj

Shyhrete rakontas ke la filo Altin vokis ŝin post kiam vidis la mortan Herolinda-n. Sed la saman sorton havis ankaŭ li mem tuj poste. Estis mortkuŝante Sebahatja kun siaj gefiloj, Ismet 3 jara, Erion 1 jara, Shirinja 17 jara kaj Florian 16 jara. Oni estis lasinta nin mortajn longe, poste venis kaj ŝarĝis en

kamiono. Dumvoje, preterpasante la vilaĝon Lutoglava, mi rekonsciiginte, same ankaŭ Shyrete, pensis pri la eskapo. Kaj tiel agis.

Ni tuj elsaltis kaj falis sur asfaltan duonvivajn. Vilaĝanoj aliaj helpis nin akceptante en iliaj hejmoj.



Patro ŝokita pro perdo de siaj gefiloj

Teruraĵoj en Gjakove

Tiun nokton, en la urbo de Gjakove, Naser Rudi kaj Agron Nagavci vidis multajn policistojn drinkante kaj sieĝante la domojn de la kvartalo, rompante ilin kaj enirante. Unue ili eniris en la hejmo de Fehmi Lleshi kaj tuj ekzekutis lin kaj ties edzinon.




Avino klopodas trankviligi sian nepon kiu perdis la gepatrojn

Poste pasis ĉe la familio Deda, ekzekutis unue la filinon, Aferdita, kaj ties filon 7 jara kaj la gepatrojn. Poste eniris en nian hejmon kie rifuĝis multaj homoj. La edzino de la komandanto Pituliq, s-ino Lila, loĝanta apude, estis renkontinta Tringa-n, nian novedzinon. Tringa estis plendinta al ŝi pri la raprezalioj.- Ne zorgu Tringa, estis respondinta Lila,- ni estas ja najbaroj, nenio okazos al vi. Kaj estis petinta ŝin kiom da homoj estas en la ties domo. Tiel, post la noktomezo, la policistoj rompis la kortan pordon. Tri maskloj de la domo tuj eskapis malantaŭ de la domo. 7-8 policistoj eniris en la subĉambro kie ariĝis virinoj kaj infanoj.

-Nu, eliru, eliru, ĉar mem demandis NATO-n kaj UÇK- (Naciliberigan armeon)!

Dren Caka, knabo 9 jara antaŭe, rakontas:



Dren Caka post kelkaj jaroj en Kanadio

Unue oni ekzekutis Flaka-n, la fratinnon de Tringa, ankoraŭ 16 jara. Kiam ŝi petis glason da akvo oni pafis al ties kapo per kuglo. Poste mortigis ŝian patrinon, Shahinder kaj la aliajn. Elirinte en la korton, pafis sur la onklo Hysen kiu estis preterpasante per ĉaro. Mi vundigxis surbrake. Mi vidis la malgrandan fratinnon, Rita-n, kiu sin kaŝis en la ŝranko kiun kovris jam la flamoj... Mi eskapis de la flamoj, transsaltis la muron dumetran de la korto kaj, de domo al domo alvenis en la hejmo de miaj geavoj. La morgaŭon, ili kondukis min al la hospitalo kie ankoraŭ deĵoris kelkaj albanaj kuracistoj. Ĉi tiuj kondukis min al la landlimo kie min prenis italoj per helikoptero kaj venigis en Tirana-n.



Malesperigitaj virinoj

En la ruinaĵoj de la domo restis mortaj kaj bruligitaj 20 homoj: patrino Fetije Vejsa (60 jara) , Tringa Vejsa (30 jara), infanoj: Dorina (11 jara), Marigona (9 jara), Sihana (7 jara), Arlind (5 jara), Rita (20 monata); Valbona Vejsa Haxhiavdia (38 jara) kun tri gefiloj: Doruntina (8 jara), Egzon (5 jara), Rina (3 jara); Valbona Caka (34 jara) kun tri gefiloj: Dalina (13 jara), Delvina (8 jara), Diona (2 jara); Shahindere Hoxha (60 jara) kun la filino Flaka (16 jara); Shirine Nuçi (72 jara) kun filino Mandush (52 jara) kaj onklo Hysen (52 jara).



Masakrita infano

Shqipe , filino de la legendecca komandanto Adem Jashari, el la vilaĝo Prekaz, rakontas:



Masakro en Peja

Nia domo estas sieĝita kelkfoje. Ĝi rezistis al sieĝo de 30-a de decembro 1991 kaj sieĝo de 22-a de januaro 1998.

La tria sieĝo okazus je 5-an, 6-an kaj 7-an de marto 1998.

Post heroeca rezistado, falis 20 personoj el la familio Jashari, inter ili 12 inoj: 4 virinoj (Zahideja, Zarifja, Feridja, adilja), kaj 8 knabinoj (Blerina 7 jara, Fatimja 9 jara, Igballja 11 jara, Liria 14 jara, Valdetja 15 jara, Afetja 17 jara, Hidajetja 18 jara kaj Selvetja 20 jara). Dum el la tuta larĝa familio Jashari falis 57 personoj, konsistigantaj vilaĝan kvartalon. Saviĝis nur la knabino Besarta 11 jara kaj alia knabo Bashkim.

Masakro de Reĉak

La 15-an de januaro 1999 okazis masakro kiu influis notinde en la ŝanĝo de la internacia opinio rilate la sorton de Kosovo.



La tomboj de la masakritoj en Rečak

Serbaj krimuloj, inter ili ankaŭ najbaroj el Shtime, alvenis en Rečak kaj mortigis 42 homojn, kelkajn el ili oni eĉ senkapigis, ĵetante en grandan kanalon ĉerande de la vilaĝo. Morgaŭon, alvenis ĵurnalistoj ĉekape la reprezentanton de OSCE observa misio William Walker. Tuj la tuta monda gazetaro kaj medio raportis pri la makabra evento.



William Walker revenas Kosovon ofte

La ekzekuto de advokato Bajram Kelmendi kaj ties du filoj

Nekibe Kelmendi, eksa ministrino pri justeco kaj vicprezidantino de la Demokratia Ligo rakontas:



Nekibe Kelmendi

Estis la unuaj horoj de 25-a de marto 1999. La policistoj forprenis perforte mian edzon kaj du filojn kaj venigis ilin de Prishtina al Fushe Kosove. Junulo preterpasanta tien post finiĝo de sia deĵorperiodo, rigardis la tutan krimscenon.



Ĉirkaŭ 1 miliono da albanoj estis devigitaj forlasi siajn hejmojn kaj terojn

Respondeculoj de la Ŝtata Sekureco, Miško Lakoviĉ, David Gajiĉ kaj tri aliaj ekzekutistoj eligis la kaptitojn el la veturilo kaj ordonas Kastriot-on, pliaĝan filon 25 jaran ke li pafu al la patro Bajram. Li maljesis. La samon faras la alia filo, 17 jara, Kushtrim. Ankaŭ Bajram mem ne plenumis la ordonon por pafi kontraŭ siajn filojn.

Tiam la ekzekutistoj pafis al Kastriot, poste al Kushtrim kaj fine al mem Bajram. Sekvis pafado kontraŭ tri korpoj kiuj ricevis de po 18 ĝis 32 kugloj.



Oni portas avinon en fera ĉareto je direkto de la landlimo

Bedaŭrinde neniam oni invitis Nekibe-n en la Juĝejo de Hago. La eksa ĝenerala prokuratorino, Carla del Ponto, prokrastigis ĉiam la kunfrontiĝon de Nekibe Kelmendi al Miloŝeviĉo.



La trajno Prishtine- Skopje plenplena de rifuĝintoj

- Kial vi ne akuzas ĉi lastan pri genocido kontraŭ albanan popolon?- kelkfoje demandis ŝin Nekibe.

-Ne ekzistas pruvoj- respondis del Ponte...

(Enesperantigis **Bardhyl Selimi**, kun la permeso de autorino)

Kvinjara sendependa Kosovo

La 17-a de februaro 2008 estis por albanoj de Kosovo sankta tago, atendata de jarcentoj. Post 500 jaroj “milet-o” (turke: popolo), 100 jaroj “narod” (serbe: popolo), kaj dek jaroj “people” (angle: popolo), finfine malfermiĝis la verda lumo de sendependeco!



Infanoj el Kosovo kun la blazono de sia lando survizaĝe

Ĉi jare oni festis la kvinjaran datrevenon ĝoje kaj feliĉe ne nur en Kosovo, sed ankaŭ en Albanio, Makedonio, Montenegro, Serbio, kie vivas en siaj propraj teroj albanoj.

Aparte tragika estis la vivo de kosovanoj dum 100 lastaj jaroj sub la serba jugo.

La jaro 1912, kiam Kosovo aneksiĝis de Serbio notis ankaŭ grandajn masakrojn kaj veran dezertigon de la lando far la serba armeo. Inter tiuj kiuj raportis pri tiaĵoj estis ankaŭ la fama Leon Trocky, rus-hebrea komunisto- gvidanto, kiu deĵoris kiel militkorespondanto de la ĵurnalo “Kievskaja Misl”. Jen kion skribis li la 23-an de decembro 1912:

“La teruraĵoj ekevidebliĝis ĵus ni transpasis la landlimon. Je kvina horo posttagmeze, alproksimiĝante al Kumanovo, la suno ekmaleviĝis kaj la mallumo komenciĝis. Ju pli multe melheliĝis, des pli multe ekbrilis la fajroflamoj, suprenirantaj al la ĉielo. Ĉio ĉirkaŭ ni bruliĝis. Ĉiuj albanaj vilaĝoj enflamiĝis..” Pli poste la aŭtoro rakontas ke tiaj vidaĵoj sekvis lin dum la tuta vojaĝo de Kumanovo al Skopje. En la stacidomo de la dezertigita Skopje, ebriita soldato serba, ĉetniko, kun la brando-botelo en unu mano kaj la longa tranĉilo en la alia, ludis kun albanoj forkaptitaj kiel la kato kun la muso: “Ekstaru!”, “Eksidu!” kaj devigante ilin drinki brandon. Alia soldato, neebriita, diras al la vojaĝanto pri la homoj kun kiuj mokadis lia kamarado: “ Ĉi tiuj estas arnaŭtoj. (albanoj) Nun ni buĉos kaj dispecigos ilin”.

Aliaj amasaj masakroj okazis ankaŭ en la jaroj 1944-1945 kiam en Kosovon reeniris la armeo serbo-komunista.

La 2-an de julio 1990 la tiama parlamento de Kosovo, antaŭ la pordoj de la Kunvenejo, proklamis la Deklaracion de Sendependeco enkadre de Jugoslavia Federacio, kiun la reĝimo serba ne agnoskis. La 7-an de septembro, samjare, oni aprobis en Kaĉanik la Konstitucion sed la registaro ekzilis

eksterlande. En la jaro 1991 okazis tutpopola referendumo kiu proklamis oficiale Kosovon sendependan ŝtaton kaj elektis kiel prezidanton dr. Ibrahim Rugovo-n.

Tiu lasta organizis la pacan rezistadon kontraŭ la sovaĝa serba reĝimo. Dume plifortiĝis la solidareco ene de la popolo. Prof Anton Ĉeta entreprenis agadon por rekonsciliĝo, pardonado de sangovenĝoj.

Milošević ordonis maldungadon de ĉiuj publikaj oficistoj, ĉirkaŭ 110 000 personoj. La edukado paraliziĝis, la Akademio de Sciencoj, informadaj rimedoj (radio, ĵurnaloj), sanigadaj institucioj, fermiĝis, same la universitato de Prishtina kaj ĉiuj albanlingvaj lernejoj.

Je signo de solidareco, albanoj malfermis siajn domojn por lernejoj kaj klinikoj.

Multaj intelektuloj estis malbontraktitaj, enprizonigitaj, murditaj kaj pereintaj. Centoj kaj miloj personoj forlasis siajn hejmojn kaj fuĝis eksterlanden. En la ekzilo albanoj fondis humanitarajn asociojn por kolekti monon, je 3 % de iliaj enspezoj, por vive teni la staton kaj peziĝintan ĥaoson reginta enlande. Oni sekvis sloganon "familio helpas familion" kaj la helpaĵoj venadis de ĉiuj albanaj teritorioj, el Valo de Preŝeva, Okcidenta Makedonio (Ilirida) kaj diasporo. Oni memorganiziĝis por liberigi Kosovon, akumulis financajn rimedojn por armado. Fondiĝis Naciliberiga Armeo UĈK, subtenite ankaŭ de registaro de Albanio, kie ĝi trejniĝis de militistaj spertuloj en ties teritorio kaj komenciĝis ankaŭ la unuaj militagoj. Falis ankaŭ centoj da martiroj.



Kosovo festas

UĈK aperis oficiale la 28-an de novembro 1997. La masakro de Reĉak je 15-an de januaro 1999 atestita ankaŭ de fremdaj observantoj de OSCE kaj la armita rezistado de familio de Jasharo-j en Prekaz kie falis 53 ties membroj, notis alian atestaĵon de genocido serba kontraŭ albanoj. La amasa forpelo de albanoj (ĉirkaŭ 1 000 000) al Albanio, Okcidenta Makedonio, Montenegro kaj aliaj eŭropaj landoj, murdado, bruligado kaj dezertigado de iliaj teroj, incitis NATO-n interveni per aera bombardado de militistaj bazoj de Serbio.

Dum la NATO-a kampanjo Milošević malfermis la pordojn de la prizonoj el kiuj eliris krimuloj por masakri albanojn kune kun antaŭmilitistaj taĉmentoj kaj mercenaroj rusaj kaj rumanaj. Pli ol 15 000 personoj mortiĝis, 5000 malaperis, 20000 knabinoj perfortiĝis.

Post 73 tagoj da bombardado, la reĝimo de Milošević cedis, akceptis la interkonsenton de Kumanovo laŭ kiu 40 000 soldatoj serboj, policistoj ka forlasis Kosovon. Anstataŭe eniris trupoj de NATO-o.

Kosovon ekadministris UNO tra miloj da oficistoj, policistoj kaj soldatoj.

Kosovo praktike fariĝis libera ekde junio 1999 kaj la homoj turniĝis al la rekonstruado kaj demokratiigo. La 17-an de februaro 2008 ĝi proklamis sian sendependecon limigitan kaj fine de la jaro 2012 plenan sendependecon. Tamen la trupoj de NATO kaj EULEX plue restas tie ĝis la interrilatoj kun Serbio pliboniĝos kaj ĉi lasta agnosku la novan ŝtaton. Tiucele, ekde du jaroj okazas regule en Bruselo kontaktoj inter reprezentantoj de Kosovo kaj Serbio.

Aktuale Kosovon agnoskis pli ol 98 membro- ŝtatoj de UNO. Bedaŭrinde ĝin ankoraŭ ne agnoskis 5 membroŝtatoj de EU (Slovakio, Grekio, Kipro, Rumanio, Hispanio) la EU parlamento antaŭ nelonge alvokis ke ankaŭ tiuj ŝtatoj agnosku Kosovon kiu aspiras eniri estonte en EU.

Restas problemoj seriozaj surkampe de politika integriteco de la lando, (ekzisto de paralelaj strukturoj norde), ekonomio, senlaboreco, izoliteco. Lastatempe la ĉefministro Haŝim Taĉi kritikis respondeculojn de Bruselo rilate la prokrastiĝon de liberalizo de vizoj por civitanoj de Kosovo. Siaflanke, en la decembro 2012 dum Konferenco pri Sekureco en Munkeno la ĉefministro de Albanio, Sali Beriša, atentigis eŭropajn politikistojn ke albanoj loĝantaj en kvin balkanaj ŝtatoj neniel povas konsiderati diversaj nacioj. Estas nur unu nacio, tio albana aspiranta integriĝi enkadre de EU.

Kompilis Ilir Pistoli

Reagoj

(Antaŭ ne longe, aperis libro de s-ino Sanie Gashi el Prishtina je titolo "Teruraj historioj el la milito en Kosovo 1998-1999". Fragmentojn el tiu libro mi diskonigis en Esperantujo. Vidu ĉi tie supre ankaŭ. S-ro Johan Derks el Belgio- Serbio, edzigita al serbino, reagis negative. Jen interŝanĝo de opinioj kun li tra la retpaĝo de Sudorientaj Eŭropaj esperantistoj):

Johan Derks: johan.derks@gmail.com:

Vi havas tiun tipan balkanan pensmanieron, kie homo estas jughata lau sia deveno, sia geedzeco.

Mi estas nek advokato de Serboj, nek de kiu ajn popolo, kvankam tio estus tre faciliga por vi por povi meti etiketon sur via denuncanto.

Vi senhene alproprigas al vi la rajton kolekti malamonvekajn dokumentojn. Sen iu certigo de ajna objektiveco au senpartieco, vi kulpigas tutan Serbion

NUN unue vi komencas retirighi kaj mencii ke temas pri serbaj *krimuloj*, same kiel albanaj *krimuloj*, dum la tempo de komunismo kaj chiamtempe.

Chiu kiu studas la okazajhojn, ne nur de la milito pri Kosovo, sed de post 1878 ghis nun, la daurajn konfliktojn en Balkanio konstatas ke multegaj krimoj okazis, sed de ambau flankoj. Ne decas al vi, kiel esperantisto kondukti kiel naciisto kaj malprudente dissendi partiecajn informojn, akompanatajn de sugestoj pri (nurkulpa) Serbujo. Al kio tio servas?

Mi tre bedaŭras, ke samideano Bardhyl Selimi jam dum jaroj en chiaj publikigajhoj propagandas la heroajhojn en Kosovo kaj la fiajhojn de serboj,

dum de la alia flanko okazis ankau teruraj kruelajhoj.

Mi pensis, ke Esperanto estas lingvo de pacigo, sed se unu homo daure tamburas kontrau alia popolo, li eliru el niaj vicoj.

Mi, kiel nederlandano, alproprigas la rajton skribi tion, char oni ne povas akuzi min pro rankoro au io simila au politika antaŭjugho.

Bardhyl: bselimi@gmail.com :

Kara Johan, advokato de serboj, lasu serbojn reagi mem, vi eĉ ne apartenas al sudorienta grupo de esperantistoj..

Oni ankoraŭ skribas pri la krimoj de nazioj kontraŭ homaron, ĉu tio ne estas prava?

Esperanton rajtas uzi por kiu ajn celo, ĝi estas lingvo.

Cetere mi ne insultis la serban popolon, mi akuzis la serbajn krimulojn, same kiel mi povas akuzi ankaŭ albanajn krimulojn dum la tempo de komunismo kaj ĉiamtempe.

Bv legi trankvile la skribaĵon, tio estas nur rememoraĵo por ke ne ripetiĝu la tragedio plej granda de albanoj. Albanio kaj Kosovo estas la sama nacio. En Kosovo 90 % de la loĝantaro estas albanaj etnuloj.

Ĉu vi ne lernis tion en la historiaj libroj? Bonvenu en Albanion kaj en Kosovon kaj komprenos ĉion!

Johan Derks:

Sinjoro Selimi, mi ne nur *lernis* en historiaj libroj, mi mem organizis en 2004 seminarion en Teslic, Serbujo, kie Balkanioj de chiuj eks-Jugoslavaj landoj partoprenis.

Se homoj volas lerni ion pri Serbujo, ne de iu ties naciisto au krimulo, sed de usonana serbo, li/shi legu tre informrichan libron "Serbia, the history of an idea" (Stevan K. Pavlowitch, 2002).

Miĉo Vrhovac, reagis sur Monato:

S-ro Johano vi pravas, s-ro Bardhyl Selimi tre ofte propagandas heroaĵojn en Kosovo kaj la fiaĵojn de serboj. Dum la milito la teruraj kruelaĵoj okazis de la ambaŭ flankoj. Tamen Esperanto estas la lingvo de paco kaj estas malbona afero publikigi la librojn pri milito en tiu lingvo. Al nia regiono necesas la amikeco kaj toleremo.

Tio ne kontrauas, ke Kosovanoj povas festi pro sia kvinjara sendependeco. Neniu sagha serbo au europano ghenighos pro tio.

Bardhyl Selimi ankaŭ estus pli kredinda, se li limigus sin skribi pri sia propra lando.

Johan Derks

Mi bedaŭras, sinjoro Bardhyl, ke mi ne disponas pri materialoj el tiu tempo. La seminario estis por junuloj kaj ne estis prelegoj pri "faktoj", pli pri reciprokaj sentoj kaj bildoj, konatigo, amikigo kaj Esperanto.

Plue mi volas menciigi, ke la Serba ŝtato, kio ne estas identa kun la serba popolo, en la kvin jaroj post la sendependigo de Kosovo akceptis - laŭ mia impresoj - pli kaj pli realisman bildon, dum inverse estis multe da violento de albanaj kosovanoj kontraŭ serboj. Mi esperas ke la Kosova ŝtato prenos pli da protektaj paŝoj kaj akceptos gradon da autonomio por la serboj kiuj sentas sin ne sekuraj, dum inverse ili paŝon post paŝo integriĝos en la novan respublikon.

Mia opinio: pli ol disinformi pri kruelajhoj de unu flanko valoras informi pri la renkontigo de Tomislav Nikolic kaj Atifeta Jahjaga, la du prezidentoj de la landoj.

Paiva Netto

Milito pro akvo

(Artikolo aperinta en centoj da gazetoj, revuoj kaj retejoj en Brazilo kaj en la mondo, je marto 2010.)



José de Paiva Netto, ĵurnalisto, radiokronikisto kaj verkisto. Li estas direktoro-prezidanto de LBV.*

Je la 22-a de marto 1992, Unuiĝintaj Nacioj ekdisvastigis "Universalan Deklaracion pri Rajtoj de Akvo". La intenco de tiu teksto estis interesigi kaj ekologie konsciigi loĝantarojn kaj ties registarojn, precipe koncerne la gravecon de akvo por homa postvivado. En la sekvinta jaro, je tiu sama dato, la Ĝenerala Asembleo de U.N. deklaris, ke la 22-a de marto estas Monda Tago de Akvo.

De tiu tempo, popoloj pli kaj pli maltrankviliĝadas pro manko de akvorimedo. Iuj analizistoj antaŭvidas en ne tre fora estonteco militkonfliktojn, surbaze de konkurado por tiu altvalora likvaĵo. Artikolo verkita de usona profesoro pri Ekonomiko Jeffrey D. Sachs, kiun oni publikigis en la ĵurnalo Valor Econômico, en aprilo 2009, estas unu plia konfirmo, ke bedaŭrinde tiu antaŭvidaĵo jam realiĝas: "Multajn konfliktojn kaŭzas aŭ bruligas manko de akvo. Konfliktoj – de Ĉado al Darfuro, en Sudano, de la dezerto Ogaden, en Etiopujo, al Somalio kaj tieaj piratoj, same kiel en Jemeno, Irako, Pakistano kaj Afganujo – okazadas sur granda regiono de sekaj landoj, kie manko de akvo kaŭzadas kolapson de rikoltoj, morton de brutaroj, ekstreman malriĉecon kaj malesperon."

Kaj la artikolisto raportas: "Unesko, organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, publikigis antaŭ nelonge Raporton pri Akvoprizorgado en 2009; la Monda Banko disvastigis profundan studon pri Hindujo (Hinda Akvoekonomio: preparado por tumulto estonteco) kaj pri Pakistano (Pakistana Akvoekonomio: pligravigo de malsekeco); kaj Asia Society disvastigis ĝeneralan analizon pri aziaj akvokrizoj (La plej proksima azia defio: garantii akvoestontecon en tiu regiono)".

Vidu la situacion, al kiu ni alvenis. Urĝas haltigi tion. Sachs asertas, ke "tiuj raportoj enhavas similajn historiojn. La liverado de akvo estas ĉiam pli nesufiĉa en vastaj regionoj de la mondo, precipe en ĝiaj sekaj regionoj. La rapida pligravigo de akvomanko respegulas kreskadon de la loĝantaro, elĉerpiĝon de subtera akvo, malŝparadon, malpurigadon kaj grandegajn, pli kaj pli katastrofajn rezultojn je klimatsanĝoj pro homa agado. La sekvoj estas doloraj: sekeco kaj malsato, forperdo de kondiĉoj por postvivado, disvastiĝado de malsanoj transdonataj per akvo, deviga migrado kaj eĉ militaj konfliktoj".

Kion fari antaŭ tia apokalipsa scenaro? La profesoro mem finas: "Praktikaj solvoj inkluzivas multajn elementojn, interalie pli bonan administradon de akvorimedo, teknologiojn pli evoluintajn por pligrandigi la efikecon en uzado de akvo kaj novajn investojn kune entreprenatajn fare de registaroj, fare de sektoro de entreprenistoj kaj fare de civilaj organismoj".

SENKONTROLAJ SENTOJ

Sed laŭ la sinsekvo de tagoj, tia problemo nepre kreskos, se oni ne starigos vere efikajn decidojn, kiujn oni ofte prokrastas. Eĉ en lokoj, kie tiu altvalora likvaĵo estas malabunda, homoj malrespektas tiun naturan elementon, sen kiu oni ne povas postvivi. Kiam homo havas senkontrolajn sentojn, tiam ĉio ĉirkaŭe kontagiĝas.

ALIREBLECO AL TRINKEBLA AKVO

Raporto de Luana Lourenço, el Agentejo Brasil, publikigita dum 2010j, informas al ni, ke "la mondo devos atingi la Celon de la Jarmilo redukti je duono la nombron da homoj sen alirebleco al trinkebla akvo. Kvin jarojn antaŭ la tempolimo por tiu celo, kiu estas 2015, 87 procentoj el la monda loĝantaro disponas pri fontoj por liverado de trinkebla akvo, laŭ raporto hodiaŭ disdonita [je la 15-a de marto 2010], fare de Monda San-Organizo (MSO) kaj de Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por la Infanaro (Unicef). Malgraŭ la progreso rilate la alireblecon al trinkebla akvo, ciferoj pri salubrigo ankoraŭ estas malbonaj. Pli ol 2,6 miliardoj da homoj – 39 procentoj el la tutmonda loĝantaro – plu restas sen tia servo. Laŭ tiu dokumento, tiu problemo ankoraŭ mortigas ĉiujare po 1,5 miliono da infanoj malpli ol 5-jaraĝaj. Infanoj kaj virinoj, laŭ MSO kaj Unicef, estas la plej ofte atingataj de malfacila alirebleco al akvo kaj de manko de salubrigo."

Ni intencas timegigi neniun. Ni nur emas elstarigi informojn, kiuj postulas tujan sintenon de la surteraj loĝantaroj, nome por respekto al nia kolektiva loĝejo. Jen ni lasas la atentigojn. Ne manku do, flanke de registaroj kaj de la socio, nemalhaveblaj, realĝustigaj decidoj, dum ankoraŭ estas tempo. Se la afero estas malfacila, do ni komencu tuj!

Kiel ĉiam, la Paroloj de Jesuo ŝajnas aktualaj. Kiam oni demandis Lin pri tio, kiel kondukos homoj kiam alproksimiĝos tempo de granda afliktiĝo, sciigitaj ekde la Malnova Testamento de la Sankta Biblio, tiam Li respondis, ke same kiel en la tempo de Noa kaj Lot, neglekto estos pli granda ol zorgoj postulataj de la seriozeco de la faktoj (Evangelio de Luko, 17:26 ĝis 30). Ne necesas kredi pri "tiaj aferoj religiecaj" por percepti, ke fortkolora bildo desegniĝas.

**José de Paiva Netto, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵanejro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).*

Novajletero de la Veromovado de Berkshire, Britio,

(por februaro-marto 2013)

Ian Fantom

Berkshire 9/11 Truth

<http://www.berkshire911truth.org.uk> (retestro: David Bowman)

<http://berkshire911truth.blogspot.com/> (novaĵleteroj: Ian Fantom)

- § Sekretaj kortumoj: Britio sur la sojlo de tiraneco
- § Malmaskantoj mutigitaj – kaj la afero malboniĝos
- § Defio al la permes-pago al BBC, sed ... daŭrigu la paroladon
- § La enigmo 'Charles Seven'
- § Klimato de ŝanĝo
- § Pluaj malkaŝoj, pluaj mortoj
- § Kial gravas daŭrigi la paroladon

Britio estas sur la sojlo de tiraneco. La leĝpropono 'Justeco kaj Sekureco', se ĝi fariĝos la leĝo, ebligos sekretan okazigon de juraj procesoj, kaj eĉ fariĝos kontraŭleĝe diri al iu ajn pri ili. La leĝpropono jam trairis ĉiujn stadiojn en la malsupra ĉambro, kaj nun iros al la supra ĉambro por konsidero. Alivorte, ĝi preskaŭ alvenis (<http://services.parliament.uk/bills/2012-13/justiceandsecurity.html>).

La sponsoro de la leĝpropono en la Ĉambro de Komunumoj estas Justec-Ministro Kenneth Clarke, kiun oni ĝenerale kredas esti en la gvida komitato de la ege sekretemaj Bilderberg-kunvenoj. En antaŭparolo al iu konsultada dokumento, li klarigas, ke la celo de la leĝpropono estas ebligi al la registaro sin defendi kontraŭ civitanajn rajto-asertojn, en kiuj asertantoj tipe petas signifajn kvantojn da mono kiel kompenson. (<http://consultation.cabinetoffice.gov.uk/justiceandsecurity/>).

Sed ŝajne tiu estas nur la beligo. Richard Cottrell, en sia libro 'Gladio: NATO's Dagger at the Heart of Europe' [Gladio: la ponardo de NATO ĉe la koro de Eŭropo] (<http://progressivepress.com/book-listing/gladio-natos-dagger-heart-europe>) multe skribis pri tiu leĝpropono. Tiutempe ĝi estis malakceptita, sed li prave prognozis, ke ĝi revenos. Li skribis al mi: "La Leĝpropono Justeco kaj Sekureco estis kun ni dum iom da jaroj, de post 7-7, apenaŭ pro hazardo. Ĝi proponas, ke sekretaj kortumoj traktu pri iuj ajn aferoj kiuj rilatas al individuoj aŭ eventoj tiujn la instancoj deziras teni sekretaj. Tio validos en la kazo de ankoraŭ neplenumitaj mortenketoj pri tiuj kulpigitaj pro 7-7".

"Ĝi estis intencita ankaŭ por validi por vivantaj akuzitoj, kiuj estos senigitaj sub tiu orvela malneto de la rajto sindefendi aŭ reprezentiĝi pere de la propraj juristoj. Nek ili rajtos scii pri kio ili estas akuzitaj. En Sovetunio tio estis tute normala afero. Anstataŭ juran reprezentiĝon, la ŝtato enoficigos Specialajn Advokatojn, kiuj estos sub nenia respondeci reprezenti la akuziton, aŭ klarigi al la persono pri kio li estas akuzita, nek ili estos sub respondeco proponi defendon.

"La leĝproponon dismordis la Lordoj, sed ĝi revenis al la Komunumoj kun ĉiuj amendoj de la Lordoj elstrekita. Samtage kiel la voĉdono pri gej-ediĝoj ĝi traglitis la voĉdonadon en la speciala komitato, per voĉdono de unu fora nordirlandano haste alportita lastmomente. (Samtempe kun la voĉdonigo, la parlamentanoj estis en la parlamentaj voĉdon-ĉambroj por voĉdoni pri la leĝpropono por gej-ediĝoj) ... Tiu leĝo, kiam ĝi akceptiĝos, kiel oni vidos, povos esti aplikita al iu ajn kontraŭleĝa ago, eĉ tiom humilan kian trafik-misfaro. Al akuzitoj oni neniam diros pri kio ili estas akuzitaj, kaj kompreneble estas tre malverŝajne, ke ili estus iam ajn trovitaj senkulpaj".

La brita gazetaro estas nur tre kvietaj pri tio, kvankam Daily Mail publikigis artikolon la dekan de februaro titolitan 'Last week MPs revived the corpse of the 'Secret Justice' Bill. Here we spell out the full terrifying implications of life in... Secret Britain' [Pasintsemajne parlamentanoj revivigis la kadavron de la leĝpropono 'Sekreta Justeco'. Jen ni detaligas la plenajn hororigajn implicojn de vivo en Sekreta Britio'] (<http://www.dailymail.co.uk/debate/article-2276327/Last-week-MPs-revived-corpse-Secret-Justice-Bill--debating-gay-marriage-time-noticed-Here-spell-terrifying-implications-life--Secret-Britain.html>). Interese estas, ke ilia gefrata gazeto, The Mail on Sunday, estas ĵus alironta la kortumojn por malsekretigi sekretan juĝon faritan en kazo pri asertita torturo de afgano antaŭ du jaroj, kiu estis rezulto de pli frua kortuma sesio, nun konsiderata kontraŭleĝa de la Supera Kortumo (<http://www.leighday.co.uk/News/2013/January-2013/Secret-evidence-challenge-by-Mail-on-Sunday>). Plue, politika kampanjanto Chris Mullin, avertis pri tio en la retejo de The Guardian la 28an de januaro, sub titolo 'Justice and security bill: last chance to back away from secret justice' [Leĝpropono Justeco kaj Sekureco: lasta ŝanco forturni sin de la sekreta justeco] (<http://www.guardian.co.uk/law/2013/jan/28/justice-security-last-chance-secret-evidence>).

Kaj nun Big Brother Watch [Gardo kontraŭ Granda Frato] lanĉis kampanjon, petante al homoj skribi al siaj parlamentanoj (<http://www.bigbrotherwatch.org.uk/home/2013/03/write-to-your-mp-about-the-justice-and-security-bill-today.html>). Iu demandis: "kian utilon tio havus?". Do bone, tiukaze skribu al via loka gazeto.

* Malmaskantoj mutigitaj – kaj la afero malboniĝos

Plua leĝaĵo kiu povus malfaciligi al homoj malkaŝi eventualajn ŝtatajn krimojn estas proponata amendo al la '1984 Police and Criminal Evidence Act' [Akto de Polica kaj Krima Pruvado 1984], proponitan de la Enketo Leveson pri telefon-enŝtelado. Tiu faciligus al policanoj ekpreni konfidencan materialon de ĵurnalistoj, kaj ĝi malfortigus protekton por malmaskantoj (<http://www.guardian.co.uk/uk/2013/feb/13/whistleblowers-press-new-police-powers>). Gvidanta

kortum-advokato avertis pri eventuala rompo de eŭropa homrajta juro. Sed nun la registaro intencas forigi la eŭropan homrajtan juron

(<http://www.guardian.co.uk/commentisfree/2013/mar/04/theresa-may-human-rights-stunt>).

Ŝajnas, ke la demando de brita membreco en EU estas uzata kiel kovro por tiu afero.

Redaktora komentario en The Guardian kvar tagojn poste atentigis pri la ĝenerala risko al malmaskantoj, kiel en la kazo de iu antaŭa ĉefulo en la Nacia San-Servo, Gary Walker, kiu estis informita, ke li devos repagi ajnan kompensopagon donitan pro sia maldungiĝo se li elparolos (<http://www.guardian.co.uk/commentisfree/2013/feb/17/journalistic-sources-law-editorial>). Sed la problemo estis pli granda ol tio. Nacia San-Servo eslpezas £15M (same kiel por la salajroj de 750 flegistoj) por mutigi 600 malmaskantoj, anoncis Daily Mail

(<http://www.dailymail.co.uk/news/article-2282600/NHS-spends-15million-750-nurses-salaries-gagging-600-whistleblowers.html>), dirante, ke tio kostis la vivojn de 1 200 pacienoj. La nova leĝaĵo eĉ pli malfaciligos malmaskadon, eĉ kiam estas je risko multaj vivoj.

"Demokratio ne povas funkcii kiam sekreteco preteras siajn decajn limojn", asertas la redaktora komentario en The Guardian, aldonante, ke hospitaloj, bankoj, korporacioj, viando-produktistoj kaj polic-organizaĵoj ĉiuj devas esti malfermaj al inspektado. Mi aldonus al tiu listo eĉ humilajn membro-asociojn; pri tio ni ĉiuj povas ion fari. Kiam nin trafas indigno kiam ni faras tiom bazajn demandojn kiajn: "Ĉu tiuj kontoj estas kontrolitaj?", "Kio estas la bazo de via propono?", aŭ "Kiom da mono ni havas?", aŭ eĉ kiam ni provas levi tute laŭrajtan demandon, ni staru firmaj kontraŭ tiaj negativaj reagoj. Tiel vi staras firma ne nur por la celo de via asocio, sed ankaŭ por la celo de demokratio.

* Defio al la permes-pago al BBC, sed ... daŭrigu la paroladon

Estis iom da ekscito en la Veromovad 9-11 pri defio de Tony Rooke al BBC per rifuzo pripagi sian ĉiujaran televidpermesilon al BBC, kio estas sub brita juro deviga por ĉiu hejmokupanto kiu havas televidpermesilon. Lia argumento estis, ke BBC estas terorisma organizaĵo, kaj ke sub Sekcio 15 de la Terorisma Akto 2000, li rompus la leĝon se li finance subtenus ĝin. Li havis kelkajn kernajn atestantojn por subteni sian demandadon pri la oficiala rakonto de 9-11, kiel esploristojn Richard Gage kaj Niels Harrit, kaj eksa polica analisto de strategiaj informoj Tony Farrell. La kazon detaligis antaŭ la kortuma sesio Global Research (<http://www.globalresearch.ca/the-911-truth-movement-goes-to-court-in-the-uk/5323188>), kaj Leak Source

(<http://leaksource.wordpress.com/2013/02/15/historic-court-case-against-the-bbcs-cover-up-of-911-evidence-02252013/>), kaj tiu inkluzivas du videojn produktitajn de Tony Rooke.

La kortuma sesio okazis la 25an de februaro antaŭ loka juĝisto en Horsham. La loka juĝisto asertis: "Tiu ĉi ne estas publika enketo pri la eventoj de 9-11; tiu ĉi estas proceso sub Sekcio 363 de la Komunikada Akto". La fakaj atestantoj ne estis vokitaj. Li trovis Tony Rooke kulpa, kaj trudis sesmonatan kondiĉan liberigon [alivorte, oni ne sekvas la aferon se li ne intertempe agos kontraŭleĝe] kun pago de £200 da juraj kostoj. La eventon raportis West Sussex County Times (<http://www.wscountytimes.co.uk/news/local/9-11-controversy-in-horsham-court-1-4829773>), kaj The Daily Mail (<http://www.dailymail.co.uk/news/article-2284337/TV-licence-evader-refused-pay-BBC-covered-facts-9-11.html>), kvankam la artikolo en Mail ja maltrafis la esencon de la afero pri Konstruaĵo 7, asertante: "Rooke diris, ke BBC asertis, ke Konstruaĵo 7 de la Monda Komerca Centro falis 20 minutojn antaŭ ol ĝi faris".

Mi devas diri, ke mi havas kelkajn dubojn pri la valoro de tiu ĉi projekto. En la bonega forumo de Tony Gosling pri 911-vero, iu fish5133 asertis: "Ne pensu, ke li venkos en tiu afero, ĉar la ligo inter la neraportado de pruvajtoj fare de BBC kaj 'teroristoj' estas tro subtila. Kaj mi ne povas vidi, kiel juĝisto povus dekreti, ke mono por televid-permesilo povus helpi kaj subteni eventojn el la pasinteco.

Tamen la pruvaĵo prezentita estu bona"

(<http://www.911forum.org.uk/board/viewtopic.php?t=21758>). Iu respondis, "Dio mia! Bone ke vi ne estas la juĝisto!". Tamen mi estus supozinta, ke ĝuste tian konsilon estus provizinta la jura teamo de Tony Rooke. Evidentiĝis, ke li pravis.

Per fokusado al la anonco de BBC pri la kolapso de Konstruaĵo 7 de la Monda Komerca Centro dudek minutojn antaŭ ol ĝi okazis, la teamo de Tony Rooke certe provizis tre fortan pruvaĵon de antaŭscio, kaj tio, kune kun la pruvaĵo pri regata malkonstruo, estus ŝlosila pruvaĵo se la afero temus pri 9-11. Sed ĝi ne. En la rifuzo pripagi sian televidan permesilon, Tony Rooke asertis koluzion fare de BBC rilate al 9-11. Mi havas nenian kialon supozi, ke BBC-raportisto Jane Standley faris ion ajn malhonestan kiam ŝi diris, ke ili ricevis raportojn pri la kolapso de Konstruaĵo 7 (<http://www.youtube.com/watch?v=6mxFRigYD3s>). Laŭ mia kompreno, BBC ricevis tiun informon de Reuters, kaj estas ĝenerala supozo, ke iu estus tro frue elsendinta gazetaran bultenon. Aliflanke, la afero de Konstruaĵo 7 estis garantiita krei la plej grandan entuziasmon inter la veromovado komunumo de 9-11.

Kiam ni unue aŭdis pri Tony Rooke, kaj liaj intencoj ne pagi sian lokan imposton, ni pripensis inviti lin por paroladi al nia grupo '9/11 Keep Talking'. Necesis unue, ke mi sciu iomete pli pri la afero. Kiam mi renkontis lin ĉe la labor-tribunalo de Tony Farrell en Londono, mi invitis lin membriĝi en nia retroŝta grupo por Keep Talking. La grupon 'Keep Talking' ni starigis kun limigitaj celoj, ĉar ni sciis, ke la VeroMovado 9-11 estis intense enfiltrita, kaj ke ni devos tion pritrakti. Kolektiva agado ĉiam estis malfacila, kvankam kuraĝigi personajn kontaktojn kaj interŝanĝojn de informoj ebligis al individuoj labori en sociaj retoj, kaj tio subtenus iliajn individuajn aktivecojn. Iuj el niaj kontribuoj estis iom influhavaj.

Estis sugestita la nomo 'Keep Talking', laŭ mia adiaŭa frapfrazo en tiuj ĉi novaĵleteroj. Mia tezo estas, ke por kontraŭi la konstantan propagandon de la Establaĵo, necesas paroligi ordinarulojn. Se ni aliros la instancojn pri aferoj kiaj 9-11, ili malverŝajne estos reagemaj, krom se estas videble publika subteno. Mi dum la jaroj pensis longe kaj profunde pri miaj propraj personaj strategioj, kaj mi atendas, ke aliaj almenaŭ tion respektu. Tony Rooke vidis la aferon malsame, dirante: "Se ni opinias, ke PAROLADO savos la tagon kaj forigos ĉion kio esence estas nazia reĝimo kaj ĉi tie kaj en Usono, ni atingos absolute NENION sen ŝanĝi la opiniojn de LA ORDINARULOJ DE LA POLICO kaj LA ARMITAJ FORTOJ, MALPLI ALTRANGAJ OFICIROJ. ... Sed ke la polico kaj armeo SCIU tiujn aferojn, KREDANTE tiujn aferojn, tiukaze NENIO okazos". Nu, multaj el ili ja scias tiujn aferojn kaj okazas nenio.

Li skribis: "Se PAGI al ĝuste la monstroj kiujn vi trovas tiom abomenindaj kongruas kun via konscienco, aŭ de iu ajn alia ĉi tie, do (je risko soni memkontenta) ĉu mi rajtas sugesti, ke vi ekzameni vian konsciencon? Ne nur male efikas por la tuta Vero-Movado, sed estas ankaŭ damne malkuraĝe. Vi ne estas petata iri en malliberejon; vi estas petata stari firma kaj esti rimarkita". Nu, la malliberejo estas ĝuste tio al kio liaj postuloj finfine kondukus. La tono daŭre fariĝis pli insulta, ĝis fine mi metis lin sub moderigon. Tiam li forlasis la grupon. Tio, pri kio li akuzadis nin, egale validus kontraŭ iun ajn kiu konsciis pri ŝtata korupteco, inkluzive, ĝis tiam, de li mem. Por eviti pagi ion ajn al korupta ŝtato oni devus esti ermito aŭ malliberulo. Kial li elektis nin por insultado? Evoluis disputo inter du pli-sankta-ol-ci-kristanoj, kaj unu observanto skribis, "en tiuj ĉi tagoj de ruzema sintrudo, unu aŭ ambaŭ ja povus esti sindediĉita al devojigo/disrompado. La spuroj de tio ŜAJNAS esti nekontestebaj. Aŭ eble estas nur homa manko, tiom ĝenerala en tiu ĉi Epoko de Perverseco".

Mi ne povis ne pensi pri la afero de Mark Kennedy, pri kiu mi raportis en miaj antaŭaj novaĵleteroj. Li estis la kaŝa policano, kiu incitis membrojn de mediprotekta grupo rompi la leĝon, kaj preskaŭ igis la

tutan aron esti enkarcerigita, dum formalaj akuzoj kontraŭ li estis mistere flankenmetitaj. Plua raporto pri kaŝa policado aperis la 1an de marto de la parlamenta Komitato pri Enlandaj Aferoj (<http://www.publications.parliament.uk/pa/cm201213/cmselect/cmhaff/837/83702.htm>). Tio provizas hororan legaĵon. BBC resumis ĝin, uzante terminojn kiajn 'goulish' [makabra; de kadavromanĝo demono], 'shocked' [ŝokita] kaj 'devastated' [traŭmatigita] (<http://www.bbc.co.uk/news/uk-21619324>). Polica porparolanto asertis, ke kaŝaj policanoj ludas esencan rolon en la kolektado de pruvaĵoj kaj strategiaj informoj por protekti komunumojn de danĝero. Tio maltrafas la esencon de la afero: kaŝaj policanoj estis uzataj por celoj neligitaj al la protektado de komunumoj de danĝero, kiel en la verda movado, kiu ne estas suspektita de terorismo, kiel cetere, ne estas la Vermovado 9-11. La pensokomisiono Demos, kiam ni renkontiĝis kun ili, diris al ni, ke ili estas proksimaj al MI5, kaj ke ili havas kaŝajn agentojn en tio kion ili nomas 'konspir-teoriaj grupoj'. Do ĉu ankaŭ la polico? Tiu misuzo de polica potenco devus esti inkluzivita en iu ajn estonta revuo de la leĝaro kiu regas kaŝan policadon, inkluzive de la parlamenta akto 'Regulation of Investigative Powers Act 2000' [Akto pri reguligo de priesploraĵ povoj 2000]. La tagon antaŭ la kortuma sesio, 'Reinvestigate 9/11' dismetis deklaron de Tony Rooke, asertante: "Iu ajn individuo kiu okupiĝas en konversacio kun demonstreble falsiga tradicia amaskomunikilo en Horsham NE parolas por mi mem aŭ por la defendo-teamo, kaj ni distancigas nin de tiuj kiuj ne povas rezisti tiajn nesincerajn alirojn". Tio ne estas peto; estas mutiga ordono. Mi ne supozas, ke iu ajn pensus ke ili parolas por la defendo-teamo krom se ili estus parto de la defendo-teamo, kaj la ĵurnalistaro tion scius. Reciproke, li ne parolas por la Vermovado 9-11. Laŭ raporto en Sovereign Independent, "organizantoj intencas fizike obstakli intervjuojn kun tradiciaj amaskomunikiloj ekstere de la kortumo se necesas" (<http://www.sovereignindependentuk.co.uk/2013/02/24/911-court-case-in-horsham-tomorrow-tonys-plea-to-activists/>). Mi ne scias de venas tio, sed se ĝi veras, ĝi implicas timigminacon kun perforto.

La deklaro de Tony Rooke asertas ankaŭ: "La tempo por 'esplorado' jam preterpasis. La evidentaj suspektatoj, komplikaj en la orkestrumado kaj la maskado de 9-11, nun devas esti pridemanditaj de nekoruptitaj policantoj. Tion oni NE atingos sindante antaŭ via surtabla komputilo". Do kiu aŭdos pri tiu afero, alie ol tiuj kiuj sidas antaŭ siaj surtablaj komputiloj? La raporto de Daily Mail ŝajne ne aperis la postan tagon en la surpapera eldono. La tuta afero volviĝas ĉirkaŭ la rajto sidi antaŭ ekrano, spektante televid-programojn, sen pagi al BBC. La tuta afero eksplodis ĵus post la surekranigo de programero 'Conspiracy Road Trip' [Konspira Strat-Veturo] de BBC, kiam ni havis oran eblecon fokusi pri la propagandaj ruzoj uzataj de BBC, kun malmaskanto kiu volemis elparoli kaj ĉion malkaŝi. Kio ajn estis la intenco, tiu tuta afero estis grandioza forlogilo.

* La enigmo 'Charles Seven'

Plua kurioza afero kiu antaŭ nelonge leviĝis estis tiu de Charles Seven – ŝia vera nomo estas nekonata – kiu nomas iujn individuojn kiel komplikajn en la terorista ŝokaĵo de 7-7. Mi malmulton scias pri tiu afero, kaj tion mi trovas surpriza, konsiderante la kvanton de tempo kiun mi eluzis pri ĝi. Deklaro datumita la 21an de novembro 2010, kiu aperis sub ŝia nomo, komenciĝas: "7-7 estis en la vero amaskomunikila mafia rita satanisma sorĉistin-ĉasa venĝo por psikologie torturi, terorigi kaj paralizi min por ke mi ne alportu al la kortumo mian pruvaĵon malkaŝantan konspiron fraŭdi kaj murdi implikante vastan ŝakradon de triilionoj uzante ŝtelitan intelektan proprajn kaj aliajn ege fiajn aktivecojn ekde 2003 kaj plue". Ŝi plue asertis: "Mi havas ĉiujn nomojn de la kulpuloj respondecaj, ĉar mi procesis kontraŭ ilin kaj venkis en 2006".

Ŝi aperis sekve de iu kunveno de Keep Talking, kaj parolis iom longe pri sia afero. Mi ne sukcesis ellabori la asertitan rilaton inter amasmurdo en Londono kaj ŝia kopirajta aserto por 'multimedia

platformo'. En posta okazo, Mark Windows intervjuis ŝin dum kvin horoj antaŭ kamerao, sed li sentis, ke li ne povos publikigi la videon pro la evidenta risko de misfamigo. Li tute ne konvinkiĝis, ke ŝi efektive venkis en la proceso de 2006. Kiam li aŭdis, ke Tony Farrell intencas ŝin intervui en la interreta televidkanalo de UK Column de Brian Gerrish, li diris kaj al Tony Farrell kaj al Brian Gerrish pri siaj zorgoj. Tamen la elsendo antaŭeniris (<http://www.ukcolumn.org/video/uk-column-live-31st-january-2013>). Estiĝis nova furoro, kiel videblas en la korespondaĵo en la paĝo de YouTube (<https://www.youtube.com/watch?v=bjdIM3p0gvE>).

La zorgo de Mark Windows estis, ke tiu povus esti forlogo en kaptilon. Li rimarkis, ke unu el la homoj kiujn Charles Seven akuzis efektive estas juristo pri misfamigo. Sendepende de tio, ĉu li pravis, mi estas kontenta, ke la zorgo de Mark estis vera, kaj ke jura konsilo devus esti prenita antaŭ ol antaŭeniri kun tiu intervjuo. Li ĵus verkis priskribon en sia retejo Land of the Free [Lando de La Liberuloj] (<http://www.landofthefree.co.uk/site/component/content/article/1-latest-news/147-entrapment-or-insanity-where-fools-rush-in-and-the-qcharles-sevenq-story>).

* Klimato de ŝanĝo

Kredindecon de politikistoj plue erodas la afero de Klimata Ŝanĝo, dum esploroj ĵetas pli da dubo sur tion kion oni diras al ni. "Klimat-ŝokilo: Daŭrigu same ĝis 2050, planedo estos EN ORDO", anoncis The Register la 25an de januaro

(http://www.theregister.co.uk/2013/01/25/norwegian_co2_warming_shocker/). Esplorado ĉe la Universitato de Oslo indikas, ke "la karbon-ellasajoj produktas multe malpli da tuttera varmigo ol oni antaŭe pensis, ĝis tia grado, ke estas nenia danĝero produkti varmigon preter la supra IPCC-limo de sekureco de 2°C dum multaj jardekoj". "La meza temperaturo de la tero subite altiĝis dum la 1990aj jaroj. Tio eble igis nin tro alte taksii la klimatan sentemon", klarigis Profesoro Terje Berntsen. Mi ja scivolis, ĉar konstantaj raportoj en BBC pri degelado de la glacio en Gronlando ne ŝajnis esti kongruaj kun raportoj, ke la tut-tera temperaturo ne plialtiĝis de post 1998; degelado de glacio dependas de la hodiaŭa temperaturo, ne de la longdaŭraj trajtoj. La tagon antaŭ ol aperis tiu ĉi raporto, The Register portis raporton titolitan: "Gronlanda glacio SIMPLE NE DEGELIS en varmego de +8°C en epoko antaŭ 120k jaroj" (http://www.theregister.co.uk/2013/01/24/greenland_ice_sheet_simply/). Kaj la 4an de februaro The Register raportis, 'Sub CO2-kvociencioj, flugado pli verdas ol iri aŭtobuse'

(http://www.theregister.co.uk/2013/02/04/ets_cap_and_trade_makes_flying_greener/). Iama financministro Nigel Lawson aŭtoris libron 'An Appeal to Reason: A Cool Look at Global Warming' [Apelacio al la racio: malvarma rigardo al tuttera varmiĝo] (<https://www.amazon.co.uk/An-Appeal-Reason-Global-Warming/dp/0715638416>) kaj kunfondis 'The Global Warming Policy Foundation' [La Fondaĵo pri Tuttera-Varmiga Strategio]

(<http://www.thegwpf.org>). Min impresis en liaj pli fruaj intervjuoj, ke li malmaskis la selektitan subvenciadon de klimat-esplorado fare de Margaret Thatcher dum li estis en la Kabineto. Kvankam mi plenkore malkonsentis kun lia ekonomia politiko, mi povas akcepti, ke ekzistas politikisoj honestaj. La hodiaŭaj financministroj plenumas similajn strategiojn de ekonomia limigo, kaj ankaŭ pri tio estas multe da publika skeptikeco. Sed kio estas la alternativo? Laŭ mi la alternativo estas, ke la registaro transprenu regon de la monprovizo. Sed kio estus la konsekvencoj se oni tion proponus? La historio havas por ni ankaŭ pri tio lecionon: eksigo per murdo.

* Pluaj malkaŝoj, pluaj mortoj

La afero de d-ro David Kelly ne solviĝas. Li estis la registara inspektisto kaj specialisto pri amasdetruaj armiloj antaŭ la invado fare de NATO de Irako en 2003, kiu elparolis kaj estis poste trovita morta, supozata de multaj esti murdita. Kolego lia, d-ro Brian Jones, kiu specialiĝis pri amasdetruaj armiloj, demisiis de MI6 pro la Dubinda Dosiero. La 2an de marto, BBC Radio 4 disradiis dramon version de

tio kio okazadis malantaŭ la kulisoj en la preparo de la dosiero 'Iraq's Weapons of Mass Destruction' [Irakaj amasdetruaj armiloj], kiu kondukis al la invado de Irako en 2003 (<http://www.bbc.co.uk/programmes/b01qzk13>). Ĝi enhavis novan materialon, eltiritan ĉefe de intervjuoj kun Brian Jones. Fine de la elsendo oni anoncis, ke d-ro Jones mortis en 2012. Mi trovis artikolon en la retejo de The Guardian, verkitan de la aŭtoro, David Morley, kiu priskribas siajn renkontiĝojn kun Brian Jones.

"La lasta okazo en kiu mi parolis kun Jones li estis diagnozita de zostero, sed li pensis, ke ĝi povus esti pli serioza. Li mortis tri monatojn poste", skribis David Morley, "En tiu sama telefonvoko mi levis la strangajn eventojn de proksimume semajno post la publikigo de la dosiero. En sia libro 'Failing Intelligence' [Fuŝa Spionado / Mankantaj strategiaj informoj], Jones detaligas pri renkontiĝo en la kabinetaj oficejoj frue en oktobro 2002, en kiu la spionservoj de fremda registaro estis montrita dokumentojn fare de Scarlett. (Tiu estis parto de la puŝo de Blair por gajni subtenon por milita agado, kaj la dokumentojn oni intencis por subteni la septembran dosieron.) La fremdaj spionoj, kies naciecon Jones ne malkaŝis, vizaĝ-al-vizaĝe al Scarlett rubigis la spion-informojn. Jones ne estis rajtigita diri pli, sed dum ni finis la konversacion kun miaj plej bonaj deziroj por lia sano, li diris, 'ili ĝis lastatempe estis niaj malamikoj'" (<http://www.guardian.co.uk/tv-and-radio/2013/feb/26/radio-4-the-iraq-dossier>). Ĉu ankaŭ d-ro Jones ellasis tro da informoj? Tiuj fremdaj spionoj estis prezentitaj en la dramdokumentaĵo kiel rusoj.

Ankaŭ la afero de Alexander Litvinenko, kiu estis venenigita per radioaktiva polonio en 2006, daŭras. The Daily Mail raportas, ke estis subskribita atestilo de publika imuneco por cenzuri iujn detalojn de la afero en la mortenketo, kaj ke la mortenketa juĝisto devas nun decidi, ĉu okazigi parton de la mortenketo sekrete (<http://www.dailymail.co.uk/news/article-2284823/Litvinenko-widow-claims-Britain-Russia-conspiring-shut-husbands-inquest-preserve-trade-interests.html>). Alexander Litvinenko laŭdire estis triobla agento por MI6, la hispana sekreta servo kaj antaŭe de KGB. En Usono, la vero-komunumo ŝokiĝis pro la morto de iama flugkompania piloto Phillip Marshall, kiu estis preparanta lanĉi novan libron 'The Big Bamboozle: 9/11 and the War on Terror' [La granda falsig-ruzo: 9-11 kaj la milito kontraŭ terorismoj]. Laŭraporte li mortpafis siajn du infanojn kaj la familian hundon, antaŭ ol pafi sin mem (<http://911blogger.com/news/2013-02-08/philip-marshall-911-author-and-two-children-found-dead-calif>). Multaj malkredas la rakonton (<http://www.presstv.ir/usdetail/291213.html>).

La Vero-Forumo 9-11 de Tony Gosling havas sekcion pri neklarigitaj mortoj (<http://www.911forum.org.uk/board/viewforum.php?f=41>). Nun mi supozas, ke tio devos esti ĝisdatigita pro la morto de Hugo Chavez. Kevin Barrett produktis interesan analizon, publikigitan de Press TV (<http://www.presstv.ir/detail/2013/03/06/292157/venezuela-accuses-us-of-killing-chavez/>).

* Kial gravas daŭrigi la paroladon

En mia januara novaĵletero mi skribis: "Ju pli ordinaruloj tutsimple daŭrigas la paroladon pri amas-trompoj kiuj plenumiĝas nianome, des pli ili donas protekton al malmaskantoj kaj aliaj, kiuj alprenas gvidajn rolojn en la malmasko de tiaj aferoj en nia socio. Do bonvolu ja daŭrigi la paroladon ". Plue, ju pli ordinaruloj daŭrigas la paroladon, kaj levas demandojn inter siaj amikoj, en blogoj, aŭ kie ajn, des pli estas protektataj kernaj malmaskantoj. Gravus ankaŭ daŭrigi la paroladon pri tiuj kiuj provas ĉesigi nian paroladon.

Do bonvolu ja daŭrigi la paroladon.

Salutas lan

ian@fantom.org.uk

<http://berkshire911truth.blogspot.com/> (novaĵleteroj: Ian Fantom)

Endre Dudich

Neebla lando

Ekkoni la pasintecon de Hungario por kompreni la nuntempajn Hungarojn

Enkonduko

La geopolitika, ekonomia kaj kultura situacio kaj la aktuala (materiala kaj spirita) stato de la hungara popolo rezultis el pli ol miljara, tre eventoplena historio. Kompreneble, ne eblas ilin pritrakti sufiĉe profunde en la limigita kadro de jena prezentado. La sole ebla procedmaniero estas skizi la ĉefajn trajtojn kaj indiki kelkajn decidajn eventojn. Tiuj estas elektitaj, evidente, laŭ miaj personaj konoj kaj konceptoj. La selekto do estas neeviteble subjektiva, kaj pro tio diskutebla.

Adaptiĝi aŭ pere. Kontraŭ, aŭ kun Eŭropo?

Fine de la 9-a jarcento la sep hungaraj triboj duon-nomadaj forlasis la vastan ebenaĵon de Orienta Eŭropo, kie, ili vivis dum longa tempo inter turkaj popoloj. Trapasinte la montoĉenon de Karpatoj ili definitive eniris la Panonian basenon de la rivero Danubo. Ilia estro estis la duko **Árpád**, filo de **Álmos**. En la jaro 1896 oni festis la 1000-an datrevenon de tiu evento, nomita „Patrujkonkero”. Tie ili trovis sin inter setlitaj, terkulturistaj popoloj, plejparte slavaj, kiuj jam estis adoptintaj la kristanismon. (kun kio cetere ankaŭ la hungaroj jam konatiĝis).

Baldaŭ evidentiĝis, ke oni devas rezigni je la nomadeca vivmaniero. Pluraj militiroj faritaj de aventuremaj tribestroj finiĝis katastrofe. La malpeza kavalerio ne estis ekipita por sieĝi fortigitajn kastelojn kaj verajn fortikaĵojn. La kirasita peza kavalerio de la feŭdismaj armeoj venkis. Iĝis tute klare, ke tiuj pred-celaj kampanjoj ne estos jam longe tolerataj. Kaj fakte, sekvis pun-celaj kontraŭ-atakoj. Post nelonga tempo eĉ la ekzisto mem de la hungara popolo iĝis minacata. Estis do absolute necese ŝanĝi la vivmanieron, radikale modifi la strukturon de la socio organizita je gentoj kaj triboj, kaj adapti ĝin al la feŭdismo de la mezepoka Eŭropo. Alikaze la hungarojn frapus la tragika sorto de la Hunoj de **Attila**, iam fortegaj kaj timataj, kiuj malaperis praktike senspore, kiel ankaŭ multaj aliaj popoloj vivintaj en la Danuba baseno, ekzemple la Avaŭroj.

Inter du imperioj ĉi-mondaj – kun tiu ĉiela

Okcidente la Rom-Germana Imperio, kaj oriente la Bizanca Imperio prezentis tre realan danĝeron. Ili povintus senskrupule engluti aŭ neniigi Hungaron. **Jen la unua krizo je vivo aŭ morto.**

Duko **Géza** bonege komprenis, ke estas simple neeviteble adopti la kristanismon. Estis ja evidente, ke la kristanaj ŝtatoj ne tolerus la daŭran ekziston de pagana lando en la centro de Eŭropo. Li do invitis (Sanktan) **Adalberton**, episkopon de Prago, por bapti **Vajk-on**, la filon kaj sekvonton. Tiamaniere tiu iĝis **István (Stefano)**. **Géza** mem, kvankam ne tro bonvole, konsentis iĝi baptita.

Estis **Stefano** kiu trovis la genian solvon. Anstataŭ elekti inter du eblecoj egale malbonaj de feŭdisma submetiĝo, li decidis por la tria, ŝajne pli spirita ol politika: li petis la papon sendi al li kronon. La papo **Silvestro la II-a (Gerbert d'Aurillac)**, eksa abato kaj ĉefepiskopo de Reimso en Francio, poste de Raveno en Italio plenumis lian peton. La solena kronigo okazis je Kristnasko-festo de la jaro 1.000. Per tiu akto de investituro, Hungario iĝis membro-ŝtato de la kristana komunumo de Okcidenta Eŭropo.

Tiamaniere la unua, pereiga kaptilo estis evitata.

Monto de Sankta Martino. Mil kaj unu jaroj por la eterneco.

Sankta Martino, romia eks-oficiro, ĉefepiskopo de Tours en Galio, naskiĝis en la provinco Malsupra Panonio. En Transdanubio monteto portis lian nomon ĝis 1823, kiam ĝi estis rebaptita „Pannonhalma” (Panonia monteto).

Sur tiu monteto estis konstruata la unua benediktana abatejo de Hungario en la jaro 996. La monakoj de la ordeno de Sankta **Benedikto** havis eminentan rolon en la kristanigo kaj edukado de la hungara popolo. Ankaŭ la unua ĉefepiskopo de Hungario, la veneciano **Gellért (Gerardo)** estis benediktano. La fonda ĉarto de la dua benediktana abatejo, tiu de Tihany (1055) enhavas la unuan frazon skribitan hungarlingve. Dum mil jaroj la monaĥejo de **Pannonhalma** estis la spirita centro de la hungara kulturo, la hungara Montserrat. Okaze de ĝia miljara jubileo, lia Papa Moŝto **Johano Paŭlo la II-a** honoris ĝin per sia vizito.

La vera „Maryland”: la Regno de Maria (Regnum Marianum)

La ĉefepiskopo **Gellért**, organizante la hierarĥion de la hungaria eklezio, fervore enkondukis en Hungarion la kulton de la Sankta Virgulino. La reĝo **Stefano** komisiis lin eduki sian filon **Imre (Emeriko)** laŭ la spirito de katolikismo. **Gellért** plenumis tiun taskon bonege, eble eĉ iomete tro bone. Nome la juna princo, kvankam li formale estis edziĝinta pro obeemo al la volo de sia patro, votis ĉastecon. Per tiu li malebligis la direktan patralinian daŭrigon de la dinastio de la Arpadoj. Ĉar post la frua morto de sia pli aĝa frato Otto, Imre iĝis la kronprinco. Malbonŝance, **Imre** eĉ ne sekvis **Stefanon** sur la trono: en la aĝo de nur tridek jaroj ankaŭ li mortis, viktimo de stulta ĉas-akcidento – iomete suspektinda.

La reĝo **Stefano** vidis sian regnon minacata el-ekstere de la germana ekspansio al oriento (la misfama „Drang nach Osten”), la intrigoj de Bizanco, kaj la ambicioj de Venecio, kaj el-interne de la sangaj ribeloj de iuj grupoj de Hungaroj kiuj persistis en la paganismo, kaj obeis al siaj ŝamanoj persekutataj fare de l’Eklezio. Sentante sin malfortiĝi, sur la sojlo de la morto, en ŝajne senespera situacio, la reĝo ofertis sian popolon kaj sian landon al la **Virgulino Maria**, petegante ŝian bonvolan protekton. Per tiu akto la Sankta Virgulino iĝis la **Patronino de Hungario**, laŭ la popoleska lingvaĵo „la Granda Damo de la Hungaroj” (Magyarok Nagyasszonya) kaj „Nia Patrino la beata Damo” (Boldogasszony Anyánk).

Stefano mortis en la jaro 1038, sen postlasi idon, heredanton. Sekvis plurjara, sanga konflikto de pretendantoj al la trono. La paganaj hungaroj, gvidataj de **Vata**, profitis de la situacio. En 1046 la ribelo baldaŭ eksplodis furorege. La ribeluloj masakris la pastrojn, mortigis ankaŭ la episkopon **Gellért**, ĵetante lin suben de la supro de iu danub-borda montoklifo. Nuntempe la sama monto portas lian nomon (la Gellért-monto), kaj lia bronza statuo levas la triumfintan krucon al Budapeŝto.

Jen la dua krizo je vivo aŭ morto. La kristana Hungario preskaŭ malaperis. Tamen, post malfacila periodo de interna militado, kiu portis la landon al la sojlo de totala anarĥio, la reĝo **László (Ladislao) la I-a** kaptis la povon en la jaro 1077. Pia kristano kaj perfekta kavaliro, li restaŭris la ordon, apogis la Eklezion, kaj rebatis la atakon de Kumanoj venintaj el oriento. (Tiu estis turka tribo vivinta en la suda parto de la Orient-eŭropa Ebenaĵo.) Li atingis, ke la papo kanonizis la regon **Stefanon**, la princon **Imre** kaj la episkopon-martiron **Gellért**. Ili do iĝis akceptitaj inter la sanktulojn de la Eklezio. **László** mem sekvis ilin unu jarcenton poste, dank’ al la klopodoj de reĝo **Béla (Adalberto) la III-a**, edukita en la bizanca kortego. La mumiiĝinta dekstra mano de **Sankta Stefano** estas altvalora relikvo, gardata en la katedralo de Budapeŝto, kiu portas la nomon de la sankta reĝo.

La tempesto frapanta el Oriento. La invado de la Tataroj

La reĝo **Kálmán (Kolomano)**, nomita „la Librohavena” pro lia granda erudicio, fortigis la landon. Li estis elektita reĝo de la Kroatoj en la jaro 1102. La preskaŭ senriproĉa kunekzistado de la Kroatoj kaj de la Hungaroj en la sama regno daŭris 818 jarojn, ĝis la fino de la unua mondmilito.

Sed la milita enfalo de la Kumanoj estis malbona signo. La granda migrado de la nomadaj popoloj ankoraŭ tute ne estis finita.

Reĝo **András (Andreo)** la **II-a** invitis en sian regnon la Teŭtonajn Kruckavalirojn, donacante al ili teritorion en Transilvanio. Tie ili setlis kun konsiderinda amaso da Saksoj. Ilia rezidejurbo estis Hermannstadt (laŭ la nomo de la Granda Majstro de la Ordeno; hungare Nagyszében, nun Sibiu en Rumanio). Sed li baldaŭ devis perforte elpeli ilin, pro neobeemo. Al la postrestintaj Saksoj **Andreo** la **II-a** en 1222 donis specialan Privilegion – fakte la unuan teritorian aŭtonomion en Eŭropo.

Ĥano Ĝingis kreis grandegan imperion Mongol-tataran tra la tuta nordo de Eŭrazio. Liaj taĉmentoj definitive venkis kaj dispersis la Kumanojn, kies parto serĉis rifuĝejon en Hungario. Poste la sovaĝa sed tre disciplinita armeo de unu de liaj nepoj, ĥano **Batu**, mas-atakis Hungarion.

La Okcidento vivis en la febro de la krucmilitoj: do la reĝo **Béla (Adalberto) la IV-a** ne ricevis iun ajn militan helpon. La decida batalo okazis ĉe la vilaĝo Muhi (en nord-orienta Hungario, proksime al urbo Miskolc) en 1241.

Tio estis vera katastrofo. La mongolaj hordoj neniigis la hungaran armeon. La reĝo, malfacile eskapinta, fuĝis en Dalmation, al Trogiro. La lando iĝis totale detruita. Ĉio estis prirabita, bruligita, la loĝantaro masakrita, deportita en sklavecon.

Sed la Tataroj baldaŭ haste retiriĝis, por elekti la sekvontan Grandan Ĥanon. De la okupita teritorio ili retenis nur la parton situantan oriente de la malfacile trapaseblaj Karpatoj. Tie ili establis la regadon de la „Ora Hordo”, al kiu la Rusoj dum longa tempo pagis imposton.

Tiamaniere Hungario supervivis la trian katastrofon, kaj la reĝo **Béla la IV-a** iĝis la „dua fondinto” de la lando.

Karisma kaj tragika dinastio: la Arpadoj

La hungaran ŝtaton kreis kaj stabiligis la dukoj kaj reĝoj devenintaj el la gento de la **Arpadoj**. Tiu dinastio produktis tutan vicon da escepte talentaj, grandstilaj personaĵoj. Karakterizis ilin speciala sinteno: starante firme, dupiede sur la tero, ili rigardis al la ĉielo por esplori la estontecon. Ili estis bonegaj organizantoj, diplomatoj, militestroj, sanktuloj...

Cetere, la sankta karismo de la dinastio origininte el la fora pasinteco, longe antaŭ la adopto de la kristanismo, ne estis privilegio de la viraj anoj. Unu de la filinoj de la reĝo **Béla la IV-a**, kiel dominikana monaĥino pentofaranta pro la pekoj de la popolo, iĝis **Sankta Margareta**. (La insulo de Danubo en Budapeŝto, kie staris ŝia monaĥinejo, kaj la fera ponto tien kondukanta, portas ŝian nomon.) Kvar pliaj reĝidinoj de la Arpadoj, edizinigitaj al estroj de aliaj landoj, estis ankaŭ kanonizitaj: **Kinga (Kunigunda)** en Krakovo, Pollando, **Elizabeta** en Vartburgo, Saksio, kaj alia **Margareta** en Edinburgo, Skotlando; **Piroŝka**, filino de reĝo **Ladislao**, iĝinta imperiestrino de Bizanco, estis kanonizita de la ortodoksa greka eklezio sub la nomo **Irene**. Do: 5 virinoj kompare al 3 viroj!

La malhela flanko de la karaktero de la Arpadoj estis ties impulsiveco, la senbrida rivalado inter fratoj kaj kuzoj, kiu ofte iĝis mortiga.

La lasta reĝo de la dinastio de la Arpadoj, **Endre (Andreo) la III-a** mortis en la jaro 1301. Prezintis sin pluraj tronpretendantoj, kaj denove civitana milito minacis la landon.

Ĉu, jam la kvaran fojon, fino de Hungario?

Inter tri maroj. La anĝevina florado

Finfine venkis **Karlo Roberto**, el la napola branĉo de la anĝevina (**Anjou**) familio. Tiamaniere la 14-a jarcento en Hungario iĝis la bela anĝevina epoko.

Menciindas la kunveno de tri reĝoj (tiuj de Hungario, Bohemio kaj Pollando) en la ĉe-danuba fortikaĵo Visegrád en 1335: vera mezepoka regiona renkontiĝo de ŝtatestroj. Kvin jarojn pli poste la filo kaj posteulo de Karlo Roberto, **Lajos (Ludoviko)** iĝis elektita reĝo de Pollando. Li meritis la epiteton **la granda**: lia unuigita regno etendiĝis de la Adriatiko norden ĝis la Balta Maro (escepte la regionon okupitan de la teŭtona kruckavalir-ordeno direktata el Malbork) kaj sud-orienten ĝis la Nigra Maro. Li fondis la unuan universitaton de Hungario en la urbo Pécs (Quinque ecclesiae), sed tiu ne transvivis la sortoturnojn de la historio.

La tronon de Pollando heredis lia filino **Hedvig (Jadwiga)**. Edziniĝinte kun **Jagelono**, la granda duko de Litovio, ŝi sukcesis definitive kristanigi la litovan popolon kaj establi „person-unian” regadon de la du landoj. El tiu edz(in)iĝo fontis la Jagelona dinastio.

Kolektanto de kronoj: Sigmundo de Luksemburgo

Sigmundo estis filo de imperiestro **Karlo la IV-a** kaj de la pola (pomerania) princino **Elisabeta**. Naskiĝinta en 1368, li iĝis reĝo de Hungario en 1387, de Germanio en 1400 (kronita nur en 1414), de Ĉeĥio en 1420, de Lombardio en 1431. Fine papo **Eŭgeno la V-a** kronis lin romia-germana imperiestro en 1433.

Sigmundo estis ege malsukcesa militestro. Preskaŭ ĉiuj militoj fiaskis, kontraŭ diversaj malamikoj: la Turkoj (Nikopolo 1396, Galambóc 1428), Venecio (1413-1433), la Husitoj (1420-1427). Tio instigis lin konstruigi imponan defendlinion de fortikaĵoj en la sudo de sia regno. Tiatempe de la decida ofensivo de la Otomana Imperio savis Hungarion tio, ke **TimurLenk** en batalo ĉe Ankara venkis, eĉ kaptis sultanon **Bajazidon la I-an**.

Li estis multe pli sukcesa kiel eŭrop-skala diplomato. Li provis pacigi la anglojn kun la francoj, lerte profitis el la konflikto de Pollando kun la Teŭtona kavalirordeno (Grunewald 1410). Ĉefrolis en la gravega Koncilio de Konstanco. Li ne sukcesis savi **J. Huson**, sed sukcesis finiĝi la katastrofan epokon de tri samtempaj papoj.

Sigmundo rezidis ĉefe en Buda, kies kastelon li impone plukonstruigis kaj fortikigis, poste ankaŭ en Pozsony / Presburgo / Bratislavo. Nenia mono suficis al li. Li eĉ lombardis 13 urbojn de norda Hungario al **Vladislavo la II-a**, reĝo de Pollando. Li forpasis en 1437, ne postlasante filon.

La Lunarko kontraŭ la Kruco. La otomana minaco.

Alproksimiĝis nova danĝero, ĉi-foje el sud-oriento. Temas pri la Otomana Imperio, kiu paŝo post paŝo gajnis terenon sur la Balkana duoninsulo. Dum la 15-a jarcento okazis pluraj militaj konfliktoj kun la Turkoj ĉe la suda landlimo de Hungario, ĉiam pli kaj pli gravaj. La plej fama estro de la hungara armeo estis **János Hunyadi**, (edukita de **Sigmundo**), fidela alianculo de **Skanderbego**, la nacia heroo de la albana popolo. Tamen eĉ li suferis du katastrofajn malvenkojn. En la batalo ĉe Varno, borde de la Nigra Maro, en la jaro 1444, la juna kaj tro impeta **Ulászló (Vladislavo) la II-a**, reĝo de Hungario kaj Pollando, trovis la morton. La alian fojon, ĉe Rigómező (Kosovo polje) post la perdita batalo **Hunyadi** estis tenata en kaptiteco de **G. Brankoviĉ** serba despoto. Liberiĝinta (fakte, re-aĉetita) li returnis al Hungario kaj rekomencis organizi la defendon de la lando, kiel Ĝeneralo Gubernatoro de Hungario.

En la jaro 1453 la otomana armeo prenis Kostantinoplon, la „duan Romon”. Tio signifis la finon de la Bizanca Imperio, kies spirito survivis en Moskvo konsideranta sin „la tria Romo”.

Tri jarojn pli poste, la turkoj ekŝieĝis Belgradon. **Hunyadi**, forte apogata de la entuziasmiga elokvento de la itala kapuceno **Johano de Kapistrano**, sukcesis defendi la fortikaĵon: la turkoj retiriĝis. La papo **Kaliksto la III-a** (la hispano **Alonso de Borja**), senŝarĝiĝinte, tuj ordonis, ke ĉiuj sonorilegoj de ĉiuj preĝejoj en la kristana mondo sonu ĉiutage je tagmezo, memore al tiu venko. Bedaŭrinde ambaŭ **Hunyadi** kaj **Kapistrano** iĝis viktimoj de la post-sieĝa epidemio.

Italio transplantita al la Danubo. La renesanco en Panonio

En la jaro 1458 **Mátyás Hunyadi** (Matiaso Korvino), la pli juna filo de **János Hunyadi**, iĝis unuvoĉe elektita reĝo de Hungario. Li estis la unua „plebana” reĝo de la lando. Personaĵo tre talenta, firma kaj multflanka, li iĝis bonega suvereno (nomita **la justa**), efika militestro (li kreis la profesion nigran armeon bone pagatan kaj okupis eĉ Vienon), kaj krome li estis ankaŭ donacema patrono de la literaturo kaj belartoj. Lia kortego rapide iĝis fama centro de humanistoj venintaj ĉefe el Italio. Sekvinte la ekzemplon de **Ludoviko la Granda**, ankaŭ **Mátyás** fondis universitaton, en la urbo Pozsony (Bratislavo). Bedaŭrinde tiu Istropolis Akademio havis la saman faton kiel la antaŭa universitato en Pécs.

Reĝo **Mátyás** mortis (probable venenigite) en Vieno (1490), sen lasi legitiman posteulon. La monarkoj lin sekvintaj estis malfortaj, facile manipuleblaj fare de la variaj klikoj de la aristokratio. La servutuloj estis brutale ekspluatataj. Ne estas do mirinde, ke la krucmilito deklarita en 1514 rapide transformiĝis je ribelo, poste vera milito de kamparanoj, estrata de **György Dózsa**. La armeo de la nobeluloj, estrata de **János Zápolya**, triumfis, kaj la venĝpunoj estis ege kruelaj, eĉ laŭ la kutimoj de la epoko.

Tranĉite je tri partoj. Du jarcentoj de kontraŭ-turkaj militoj

En la jaro 1526, la timegata sultano **Sulejmano la II-a (la Granda)** lanĉis imponan milit-kampanjon kontraŭ Hungario. La hungara armeo de reĝo **Lajos (Ludoviko) la II-a** nombris nur dekonon de la turka. En la batalkampo de Mohács ĝi suferis totalan neniigon. Eĉ la reĝo ne eskapis la morton.

La vojo estis malfermita al Buda kaj Vieno. Tamen la turkoj ekposedis Buda-n, la ĉefurbon de Hungario, nur dekkvin jarojn pli poste, en 1541.

Tiun kvinan katastrofon eĉ pligravigis tio, ke la hungaroj, kiel kutime, estis dividitaj. La mortintan reĝon sekvis tuj du novaj: **Ferdinando de Habsburgo** en *okcidento* kaj *nordo*, kaj **János Zápolya**, vojevodo de Transilvanio, en *oriento*. (Ĉi-lastaj, la venkinto kaj ekzekutinto de kamparanoj, alvenis „prudente” tro malfrue al la batalkampo de Mohács).

La *centra parto* de la lando estis okupita de la turkoj. La preĝejoj iĝis transformitaj je moskeoj. Ĝis la fino de la 17-a jarcento tiu regiono estis la sombra scenejo de alvenoj kaj foriroj de taĉmentoj, de sinsekvo de sieĝoj de fortikaĵoj, de kontraŭ-atakoj, ktp. La sekvoj de tiu senĉesa militado estis katastrofaj. Hungario iĝis dua-ranga provinco de la forta imperio de la Habsburgoj. Ĝia loĝantaro stagnis, eĉ malkreskis. La lumo de la kulturo ŝajne estingiĝis.

La fortikaĵo de Buda iĝis liberigita nur en 1686, t.e. 160 jarojn post la malvenko ĉe Mohács, kaj tri jarojn post la sieĝo de Vieno (kiun savis la ĝustatempa alveno de la armeo de la pola reĝo **Jan Sobieski**), fare de la unuiĝintaj armeoj aŭstria kaj hungaraj, estrataj de princo **Eŭgeno de Savojo**.

Miraklo de akrobata diplomatio: la feĝardeno Transilvanio

Malgraŭ ĉio, la kulturo kaj la tradicioj de la Hungaroj ne nur restis vivantaj, sed ili eĉ sen-precedence ekfloris. Tio okazis en regiono relative bone ŝirmata, Transilvanio („Trans-arbarujo”). Tiu regiono ĉiu-aspekte tre varia iĝis pli-malpli sendependa princlando, foje pagante imposton al la Sultano, foje koketanta kun la Habsburgoj.

En Transilvanio oni rekonis tri naciojn: la **Hungarojn**, la (same hungarlingvajn) **Sikulojn**, kaj la germane parolantajn **Saksojn**. (La Sikuloj, laŭ sia propra tradicio, estas idoj de la Hunojde **Attila**. Laŭ iuj fakuloj – tiuj de la Avaŭroj, laŭ aliaj – simple unu el la hungaraj triboj. Ili gardadis diversajn sektorojn – ne nur la orientan – de la landlimo.). La Rumanoj estis lasitaj ekster konsidero.

Oni toleris kvar religiajn konfesiojn: la katolikan, la kalvinanan, la luteranan kaj la unitaran (kontraŭ-triunuan), kies egalajn rajtojn deklaris la **Nacia Asembleo de Tordaen 1568** – la unuan fojon en Eŭropo! – kaj konfirmis la pactraktato de Vieno en 1608.

Ne temis pri la ortodoksa eklezio, nek pri la judoj. Jen bedaŭrindaj mankoj, kiuj – kvankam ili estis konformaj al la spirito de la epoko – en historia perspektivo havis katastrofajn sekvojn.

Oni konstruis lernejojn kaj kolegiojn, establis presejojn. La sciencoj kaj artoj floradis. Kompare al la priplorinda stato de la du aliaj pecoj de Hungario, Transilvanio sendube estis feĝardeno, nomo donita al ĝi de la verkisto **ZsigmondMóricz**, titole de lia historia romano.

Post la fino de la turkaj militoj, Transilvanio iĝis aparta „grandprinclando” de la aŭstria imperio. Sed ĝi gardis sian rolon kiel **hejmo kaj rifuĝejo de la hungara kulturo**.

Protestantismo kaj nacia identeco. Reformacio kaj kontraŭ-reformacio laŭ hungara maniero

Jam reĝo **Mátyás** batalis kontraŭ la husismo, kvankam pro kialoj pure politikaj. Sed post la reformacio fare de **Martino Luther** (1517), ekestis grava malakordo de spiritoj en Hungario. La Habsburgoj estis fervore katolikaj, kaj preskaŭ senescepte netoleremaj, do la protestantismo rapide fariĝis esprimilo de la nacia rezisto de la Hungaroj. Antaŭ ĉio la rigora kaj puritana kalvinismo pretendis esti ”la vera hungara religio”. Ties centro en Hungario, la urbo **Debrecen**, ĝis hodiaŭ fieras esti la kalvinista Romo. La loĝantaro de la lando iĝis preskaŭ tute protestanta. (Cetere, tio estis ekzakte la malo de tio, kio okazis en Pollando, kie la katolikismo protektis la nacian identecon de la Poloj kontraŭ la protestantaj Prusoj kaj la ortodoksaj Rusoj.) En Transilvanio, **Ferenc Dávid** (Franz Hertel) fondis Unitaran Eklezion, kies doktrino ne akceptas la dogmon pri la Sankta Triunuo.

En tiu kriza momento sursceniĝis la Societo de Jesuo. Ankaŭ en Hungario estis la jezuitaj patroj la direktantoj kaj kunordigantoj de la kontraŭ-reformacio. Bonŝance ilia ĉefrolulo, la kardinalo **Péter Pázmány**, ĉefepiskopo de **Esztergom** kaj la primaso de Hungario, estis ankaŭ patrioto kaj unu de la unuaj elstaraj majstroj de la hungara literatura lingvo. Li avertis siajn kontraŭulojn, la protestantajn pastorojn, ke „**ni troviĝas inter du paganismoj, batalante por la sama patrujo**”. En la jaro 1635 li fondis la trian universitaton de Hungario, en la urbeto **Nagyszombat** (nun **Trnava** en Slovakio), la unuan kiu sukcesis transvivi kaj ekzistas eĉ nun. Translokigita al **Buda** en 1776, kaj poste al **Pest**. Ĝi funkcias nun kiel la budapeŝta Universitato de Sciencoj (ELTE), dum la nomon de la granda kardinalo portas la tute novtempe (en 1992) establita Katolika Universitato (en **Piliscsaba**).

Multi-etna reloĝantigo post la detruigo

Fuĝinte antaŭ la Turkoj, konsiderinda nombro de sudaj slavo, precipe Serboj, rifuĝis en Hungarion, gardante ankaŭ tie sian lingvon kaj sian nacian kulturon. La Serboj ricevis eĉ la privilegion de la surdanuba komerco. La urbeto **Szentendre**, situanta 20 kilometrojn norde de **Buda**, iĝis ilia religia, kultura kaj komerca centro.

Post la definitiva liberiĝo de la lando desub la otomana regado, la imperiestra kaj reĝa kortego en **Vieno** komencis reloĝantigi la preskaŭ senhomigitajn teritoriojn. **La plejmulto de la tien senditaj koloniistoj estis etne germanaj, kaj parte slovakaj**. La sekvoj de tiu intenca etna diversiĝo estas eĉ nun observeblaj sur la etna kaj lingva kartoj de Hungario, eĉ post la perforta elpelo de la germane parolantaj Ŝvaboj kaj la „interŝanĝo de loĝantaro” kun Ĉeĥoslovakio, altruditaj al Hungario post la dua mondmilito.

Kun lingvo morta kontraŭ lingvo tro forta. Rezisto, reviviĝo, revolucio

Komence de la 18-a jarcento, la „maldankemaj” Hungaroj ribelis kontraŭ la aŭstria regado, personigita de la habsburga Imperiestro kaj Reĝo. La ĉefo de la ribelo (1703-1711) estis **Ferenc (Francisko) Rákóczi la II-a**, princo de Transilvanio, edukita en Vieno.

Jen unu hungara paradokso pli: sur la flagoj flirtantaj super la taĉmentoj marŝantaj kontraŭ tre katolika reĝo, estis videbla meze la Virgulino Maria, kaj malsupre latina surskribo:

Maria adjuvante cum Deo pro patria et libertate

Tio signifas:

„Sub la patronaĵo de Maria, kun Dio por la patrujo kaj la libereco”.

La ribelo, ricevinta nenian helpon el eksterlando, malvenkis. **Jen la sesa krizo! Rákóczi** rifuĝis Turkion, kaj mortis tie en ekzilo. (Ankoraŭ alia paradokso, kiu cetere estis ripetiga unu kaj duonon da jarcento pli poste.)

La longa regado (1740-1780) de **Maria Teresa** (reĝo, kaj ne reĝino de Hungario!) estis finfine periodo relative paca. La lando povis iomete resaniĝi. La leĝo **Ratio Educationis** metis la fundamentojn de la moderna sistemo de edukado. Eĉ la ideoj de la francaj enciklopediistoj kaj de la framasonoj enfiltriĝis.

Imperiestro **Jozefo la II-a**, filo kaj senpera posteulo de **Maria Teresa** – li mem framasono – ricevis de la hungaroj la moknomon „ĉapel-portanta reĝo”. Nome li rifuzis esti kronita per la krono de Sankta Stefano, por ke li ne estu devigita respekti la elmodiĝintajn privilegiojn de la hungara nobelularo, kies plimulto estis tre konservativa, kontraŭ ĉiu reformo.

Jozefo la II-a forpelis la jezuitojn el la lando, dissolvis la monaĥajn ordenojn, kaj deklaris la germanan lingvon la sola oficiala lingvo de la imperio. Sed li renkontis obstinan reziston, kiun li ne kapablis fleksi. Li mortis elreviĝinte, nuliginte preskaŭ ĉiujn siajn reformojn.

Tiel okazis, ke la latina lingvo, heredita de la Mezepoko, restis la oficiala lingvo en Hungario ĝis la jaro 1844 (kaj en Kroatio eĉ ĝis 1847!). En 1844, ĝi iĝis anstataŭigita per la hungara.

Reĝo **Francisko la I-a** decidis preventi eventualan revolucion similan al la franca: li ordonis ekzekuti la kvin gvidantojn de la Klubo de hungaraj jakobenoj en 1795.

Tamen eĉ la imperiestra teroro ne povis haltigi la marŝon de la **historio**. La unua duono de la 19^a jarcento estis la epoko de reformoj en Hungario. La ekonomia kaj kultura progreso – inkluzive la adapton de la hungara lingvo al la bezonoj de la moderna vivo – akceliĝis, stimulita kaj direktata ĉefe de grafo **István Széchenyi**. Li, estinte interalie la fondinto de la Hungara Akademio de Sciencoj, plene meritis la epiteton „**la plej granda hungaro**.”

La 15-an de marto 1848 – la fama tago de la „paca revolucio” de junaj intelektuloj, inter ili la poeto **Sándor Petőfi** – ŝajnis, ke la kompleta sendependeco kaj la daŭra prosperado de Hungario estas ĉe-mane. Sed tio estis nur danĝera iluzio. Eĉ pli malbone: fatala eraro, kiu havis altegan prezon. Tamen oni firme kredis je ĝi, kontraŭ ĉiu politika logiko, ĉar oni volis kredi.

Dudek jaroj perditaj. La milita interveno de Rusio

La febra aktivado de la Nacia Registaro de Hungario, prezidata de grafo **Lajos Batthyány**, estis tre pozitiva. Sed ĝi ne sukcesis gajni la masan apogon de la ne-hungaraj etnoj de la lando. La alloga ideo de iu **Danuba Konfederacio de liberaj popoloj**, proponita de grafo **László Teleki**, ministro de la eksteraj aferoj, kaj reprenita poste – tro malfrue – de **Lajos Kossuth**, restis nur bela revo.

En aprilo 1849, kiam la milito por la sendependeco de Hungario, komencita en septembro 1848, daŭris jam duonjaron, la Hungara Nacia Asembleo havanta sesion en Debreceno, prezidata de **LajosKossuth**, adoptis la fatalan decidon detronigi la dinastion de Habsburgoj. La imperiestro tuj petis la intervenon de Rusio. La caro plenumis sian promeson, kaj fortega rusa armeo invadis Hungarion. En Transilvanio unu de la komandantoj de la hungara armeo estis la pola **Jozefo Bem**. Post la batalo de Segesvár (Șighișoara), kie interalie malaperis ankaŭ la poeto **Sándor Petőfi**, la milita situacio estis jam netenebla. La ĉefkomandanto de la hungara armeo, generalo **ArturGörgey**, kapitulacis antaŭ la rusa marŝalo **Paskieviĉ**, la „heroo de Jerevano” kaj „ekzekutisto de Varsovio”. La triumfintaj kaj venk-ebriaj Austrianoj ekzekutis, en la urbo Arad, la 6^{an} de oktobro 1849, dek tri generalojn de la „ribela” hungara armeo. (**Görgey** ne estis inter ili, ĉar **Paskieviĉ** ne permesis ekzekuti tiun, kiu al li transdonis sian glavon.) La ĉefministro **Batthyány** iĝis mortpafita en Pešt.

Lajos **Kossuth**, la nekontestita gvidanto de la revolucio kaj Gubernatoro de Hungario, forlasis la landon, fuĝante en Turkion, akompanata de kelkaj siaj fideluloj. Li kunportis la kronon atribuitan al Sankta Stefano. Poste li faris propagando-celajn rondvojaĝojn en okcidenta Eŭropo kaj eĉ en Usono, defendante brile sed sensukcese la aferon de la sendependiĝo de Hungario. Neniu interesiĝis serioze pri tio. Jen grava leciono por la Hungaroj, lerninda unufoje por ĉiam.

Ankaŭ **Jozef Bem** fuĝis en Turkion, kaj finfine, konvertinte al la Islamo, iĝis „paŝa”, ĉefkomandanto de la fajrobrigado de Istambulo.

Hungarion paralizis la (sepa) katastrofo sekvita de severa milita diktaturo aŭstria, poste de subprema reĝimo karakterizata per la decida rolo de la sekreta polico. La pasiva rezisto de la Hungaroj daŭris ĝis la jaro 1867. Tiam, post la malvenko de la aŭstria armeo fare de la Prusoj ĉe Königgrätz / Sadowa, estis subskribata historia kompromiso inter la Imperia kortego kaj la Hungara nacio. Tion lerte preparis kaj negociis advokato **FerencDeák**, la „**saĝulo de la patrujo**”. **Francisko Jozefo la I-a** iĝis kronita per la Sankta Krono de Hungario.

Tio signifis la naskiĝon (sufiĉe malfruan) de la dualisma Aŭstri-Hungara Monarkio.

La industriigo kaj modernigo povis rekomenciĝi. Sed la jaroj 1848-1867 kaj la plimulto de la politikaj elmigrintoj estis definitive perditaj. Grafo **István Széchenyi**, malesperinte, mortpafis sin en la jaro 1860.

Grandeco kaj mizero de la (nur) dualisma Monarkio

La Aŭstri-Hungara Monarkio estis relative granda potenco en Mezeŭropo. Grandpaŝe progresis la industriigo kaj konstruado. Oni intencis krei el Budapeŝto duan Vienon.

La plej grava, kun-naskiĝinta problemoj estis, ke konsiderinda parto de ĝia loĝantaro konsistis el slavaj popoloj: Ĉeĥoj, Poloj, Slovakoj, Ukrainanoj kaj Rutenoj, Slovenoj, Kroatoj, Serboj ktp., kaj el Rumanoj. Do indintus transformi ĝin je federacia ŝtato, almenaŭ tripartisma. Tion urĝis precipe la Ĉeĥoj kaj la Kroatoj. Bedaŭrinde la neflekseblaj hungaraj naciistoj obstine kontraŭis tion. **Ektiktakis la eksplodigilo de la etnaj konfliktoj.**

La malboniĝon de interetnaj rilatoj pli akcelis la pompa celebrado de la miljariĝo de Hungario en 1896, kiu iritis la naciajn minoritatojn, incitatajn ankaŭ per la panslavisma movado apogita de Moskvo.

Milito kaj paco – dufoje perditaj

Francisko Jozefo la I-a forpasis en 1916. Du sinsekvaj kronprincoj mortis jam pli frue (**Rudolfo** kaj **FranciskoFerdinando**). Do sekvis lin sur la trono **Karlo la IV-a**.

La unua modmilito finiĝis per kolapso de la Aŭstri-Hungara Monarkio en 1918. La (burĝa) Hungara popolrespubliko proklamita de grafo **Mihály Károlyi** ekzistis nur kvin monatojn. Ĝin sekvis la (komunisma) Konsilia Respubliko de **Béla Kun** en marto 1919, kiu daŭris nur 133 tagojn.

La Hungara Regno estis restituita, sed sen reĝo: **Karlo la IV-a**, la lasta Imperiestro, estis forpelita per milita forto el Hungario, Li baldaŭ mortis sur lainsulo Madeira. (Poste papo **Johano Paŭlo la II-a** deklaris lin „beato“.) Regis la landon (jam sen-maran) admiralo **Miklós Horthy**, kiel gubernatoro.

Per la packontrakto subskribita en la palaco **Trianon** de Versailles la 4-an de junio 1920, Hungario perdis du trionojn de sia teritorio favore al Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio (ambaŭ freŝe kreitaj), al la pligrandigita Rumanio, kaj eĉ al la Aŭstria Respubliko. **El la 325 mil kilometroj kvadrataj restis nur 94 mil.** Hungario perdis ankaŭ grandan parton de sia loĝantaro, la eliron al Adriatiko, kaj preskaŭ ĉiujn mineralajn riĉaĵojn. Tre konsiderinda parto, **unu triono de la Hungaroj ek troviĝis ekster sia patrujo, iĝinte etnaj minoritatoj en la najbaraj ŝtatoj supre elnombritaj.**

Tiu ĉi (oka) katastrofo produktis totalan frustriĝon. Ne estas do mirinde, ke disvolviĝis forta movado de iredentismo en la landeto restinta Hungario. La itala faŝismo de **Benito Mussolini** kaj la germana naziismo de **Adolf Hitler** lerte profitis el tio. Per la t.n. **Vienaj Arbitraĵoj** (1938, 1940) Hungario re-ricevis parton de la iama Norda Hungario de Ĉeĥoslovakio kaj la nordan parton de Transilvanio kun Sikullando de Rumanio. La hungara armeo en 1939 marŝis antaŭen al la Karpatoj kaj re-establis la Hungaran-Polan landlimon. Tio ebligis al multe da Poloj eskapi la kunordigitan germanan-sovetan ofenzivon.

En 1941 Hungario milite reokupis de la (unua) Jugoslavio parton de la iama Suda Hungario, malgraŭ la persona opozicio de la ĉefministro, grafo **Pál Teleki**. Vidante, ke sia kontraŭstaro estas senrezulta, li mortpafis sin. **Hungario eniris la duan mondmiliton ĉe la flanko de la aksopotencoj. Tio puŝis la landon al plua katastrofo.**

La armeo preskaŭ neniigita, la ĉefurbo duone detruita, la okupintaj Germanoj forpelitaj, sed la liberigintaj Rusoj restantaj por nedeterminita tempo, la nova, demokratia Hungara Respubliko devis rekomenci ĉion el nulo.

Jen la naŭa krizo: la packontrakto de Parizo (februaro 1947) restituis la landlimojn difinitajn en Trianon. Rezultis grava perdo de loĝantaro per elmigrado (parte devigita). Tio aldoniĝis al la jam sen tio terura nombro de viktimoj de la milito mem kaj de tiuj (ne nur Judoj) mortintaj en la naziaj koncentrejoj.

Sub la ruĝa stelo, en la ombro de la fera kurteno

En 1948, sub la protekto de la Soveta Armeo, la Hungara Komunista Partio kaptis la povon. Naskiĝis la Hungara Popolrespubliko, estrata de **Mátyás Rákosi**. Ĉiu opozicio al la komunisma reĝimo iĝis subpremita kaj likvidita, unu post la alia. **La fifama fera kurteno hermetike fermis la landlimojn kun Aŭstrio kaj Jugoslavio.** La persekuton de la eklezioj karakterizis falsaj, konceptitaj procesoj: tiu de kardinalo **József Mindszenty** en 1948-49, tiuj de la ĉefepiskopo de Kalocsa, **József Grósz** kaj de laluterana episkopo **Lajos Ordas** en 1951, kaj multaj aliaj ĝis 1965 (kontraŭ la jezuitoj). Jen simbole tre signifa ago: **en Budapeŝto la preĝejo Regnum Marianum iĝis simple eksplodigita.**

Oni eĉ projektis, ke Hungario fariĝu unu de la respublikoj de Sovetunio. Bonŝance tiu ideo estis forlasita post la morto de **Stalino** la 5^{an} de marto 1953. Hungario ja estis membro-ŝtato de KEI (Konsilio de Ekonomia Interhelpo) kaj de la Varsovia Pakto de la soveta bloko.

La teroro ĉiam pli netolerebla de la ŝtata sekureco (internejoj kaj koncentrejoj, misteraj malaperoj de uloj), la totala subpremo de ĉiu ne-komunista kultura manifestado, la perforta disvastigo de la stalina dialektika materialismo kaj de la tiel-nomata proletara internaciismo, la ĉeesto de multenombraj sovetaj soldatoj en la lando, la neebleco de vojaĝi al kaj komuniki kun la Okcidento ktp. paŝo post paŝo estigis pasivan reziston. Tio iĝis publika kaj aktiva en 1956 (laŭ la ekzemplo de la Poloj), ĉefe inter la universitataj gejunuloj.

La revolucion de la 23^a de oktobro 1956 brutale subpremis la freŝaj taĉmentoj de la soveta Ruĝa Armeo (kiuj cetere originale estis destinitaj por interveni ĉe la kanalo de Suez) la 4^{an} de novembro. Pli ol 200 mil homoj, plejparte junaj, instruitaj kaj aktivaj, fuĝis el la lando. Notindas, ke la perdo estis multe pli granda, kaj absolute, kaj relative, ol tiu okazinta post 1849.

Jen la deka krizo de Hungario je vivo aŭ morto.

La reprezalioj ordonitaj kaj ekzekutitaj de la pro-soveta registaro de **János Kádár** estis tre severaj. Eĉ la ĉefministro de la revolucio, **Imre Nagy**, iĝis ekzekutita, kvankam li estis fidela komunisto kaj serĉis azilon en la budapeŝta Ambasadejo de Jugoslavio.

Tamen la subpremo paŝo post paŝo malfortiĝis (amnestio en 1963). Ekde 1968 (endonduko de la „nova ekonomia mekanismo”), post la „Praga printempo” (brutale subpremita en aŭgusto), la reĝimo de **Kádár** entreprenis vicon da paŝoj sur la vojo de politika liberaligo. Kardinalo **Mindszenty** pasinta dek kvin jarojn (!) en la budapeŝta ambasadejo de Usono, ricevis permeson forlasi la landon (direkte al Vieno). Tiutempe Hungario sendube estis „la plej gaja barako de la kampo” (soveta). Tiu procezo finfine produktis politikajn ŝanĝiĝojn pli radikalajn en 1989, inkluzive la forigon de la fera kurteno.

Printempe de 1991 la libera voĉdonado rezultis je venko de la opozicio, nome de la Hungara Demokratia Forumo (MDF). **József Antall** iĝis la ĉefministro de koalicia registaro de pluraj ne-komunistaj partioj.

La dato de tiu elekto estis la 25^a de marto 1990: **la festo de la Anonco/Anunco**.

La sovetaĵoj forlasis Hungarion en junio de la sekvinta jaro, post 46 jaroj kaj 2 monatoj. Ĉiuj sonorilegoj de la lando sonis dum unu horo.

Tiujare Sovetunio iĝis deklarita dissolvita. Tio okazis la 8^{an} de decembro 1991: **la festo de la Senmakula Koncipiĝo**.

La Granda Damo do finfine ne forgesis pri siaj „povraj Hungaroj”.

(Re)aliĝi al Eŭropo intertempe sekularizita. Esperoj kaj dilemoj de la estonto

Unuflanke: demokratio, parlamentismo, pluralismo, privatigo, redono de la konfiskitaj havaĵoj, respektive sendamaĝigo, restituo de la rajtoj de la homo kaj de la eklezioj.

Aliflanke: akcelita inflacio, penetro de mult-naciaj entreprenoj, malaltiĝo de la vivo-nivelo, kresko de la senlaboreco, de la deficito en la ŝtata buĝeto, kaj de la ĉiaspecaj impostoj, malboniĝo de la sekureco, plifortiĝo de krimagado (bone organizita kaj internaciiginta), komerco kaj konsumo de drogoj (narkotiloj), seninteresiĝo pri la tradiciaj religioj, plinombriĝo de sektoj, malkresko de la financado de la edukado, de la scienca esplorado kaj de la publika sano.

Tiuj estas la ĉefaj problemoj kaj defioj, pri kiuj devas okupiĝi dum siaj kvar jaroj ĉiu registaro, ĉu „dekstra” (nacia-konservativa, 1990, 1998), ĉu „maldekstra” (socialista-liberala, 1994, 2002, 2006).

Hungario klopodis reguligi siajn rilatojn kun la najbaraj landoj, kiel eble plej amike, por forigi la enradikiĝintajn rankorojn. Tri bazaj traktatoj estas jam subskribitaj: kun Ukrainio, Slovakio kaj Ru-manio.

Hungario festis sian mil-cent-jaran jubileon en 1996, iĝis NATO-lando en marto de 1999, kaj iĝis membroŝtato de la Eŭropa Unio en majo de 2004.

Jen kial Hungario estas neebla lando. Laŭ ĉiu rezonado pure homa, ĝi devintus esti jam delonge malaperinta. Tamen, malgraŭ ĉiuj peripetioj, ĝi ankoraŭ ekzistas, akceptante kun kuraĝo kaj konfido la defiojn de la estonto.

Anoncoj

АКАДЕМИО ИНТЕРНАЦИА ДЕ LA SCIENCOJ/AIS/-SAN MARINO

ВСЕМИРНАЯ АКАДЕМИЯ НАУК- САН МАРИНО/AIS/

СВЕТОВНА АКАДЕМИЯ НА НАУКИТЕ/ AIS/-САН МАРИНО

ФИЛИАЛ- БЪЛГАРИЯ /AIS-БЪЛГАРИЯ/

Bulgario 4300 Karlovo p.k.44 Mobil 0885056469 E-mail:leonov@rozabg.com



D-ro Emil Kabaivanov

Urbestro de komunumo Karlovo

Honora Protektanto de Simpozio "АЕРА-2012"

Al

Aktivuloj de Internacia E-movado

Universitataj profesoroj

Fakuloj pri interlingvistiko

Membroj de AIS

Fakuloj pri diversaj fakoj kaj sciencoj

Fakdeligitoj de UEA

LA de UEA

Internaciaj fakaj E-organizaĵoj

Estimata kaj karaj Geamikoj,

Daŭre de kelkjarojn en Karlovo sukcese estis organizitaj Internaciaj Simpozioj "Apliko de Esperanto en la profesia agado"/AEPA/ kies ĉefaj organizantoj estis AIS- Bulgario, Bulgara E- Asocio, Internacia Universitato -Karlovo kaj la Regiona Estraro de la nesesperantista organizo "Scienc-teknika Asocio" en Bulgario. La Simpozioj estis E-Simpozioj, organizitaj ĉefe de la esperantistoj, sed ilin partoprenis ankaŭ scienculoj kaj fakuloj, kiuj ne estas esperantistoj, kiuj prelegis kaj partoprenis la diskutojn ĉar estis rekta traduko esperante-nacilingve-esperante.

La Simpoziojn partoprenis famaj bulgaraj kaj eksterlandaj fakuloj. La Simpozioj ekludis sian rolon por propagando de Esperanto kaj ĝia apliko en la profesiaj kontaktoj. Tiamaniere ili sukcese plenumis sian bazan celon- prezenti antaŭ la nesesperantistaro, fakuloj tutmonde kaj la oficialuloj, ke la Internacia lingvo Esperanto ne estas nur komuna lingvo por bablado, amuzo kaj kontaktoj inter la esperantistoj, sed Esperanto povus esti kaj devas esti oficiala lingvo, por kontaktoj kaj kunlaboro en diversaj sciencaj kaj profesiaj fakaj simpozioj.

Respondante al la intereso pri la simpozioj inter bulgaraj kaj eksterlandaj fakuloj ni decidis denove organizi la V-an Simpozion -AEPA-2013 kiu okazos en Karlovo kaj Sopot /29.06-03.07.2013/ kaj kies Honoraj protektantoj estos d-ro Emil Kabaivanov- Urbestro de komunumo Karlovo kaj Veselin Liĉev- Urbestro de komunumo Sopot, kiuj havas pozitivan rilaton al la internacia E-movado kaj morale subtenas nian agadon. En la programo de la Simpozio ni antaŭvidas ankaŭ apartajn fakkunvenojn pri interlingvistiko, eurologio, ekonomio, ekologio, esperantologio, informadiko, komerco, medicino, turismo, kulturo, juro, tekniko, ĵurnalistiko k. a. fakoj kies reprezentantoj partoprenos la simpozion.

Havante antaŭvide Vian aktivan fakan agadon kaj sperton mi, nome de la organiza Komitato plej afable invitas Vin kaj Viajn gekolegojn partopreni la Simpozion. Partoprenonte la Simpozion Vi ne estos devigota prelegi-Vi povus partopreni nur la diskutojn

Oficiala lingvo denove estos Esperanto, sed laborlingvoj ankaŭ estos bulgara kaj la lingvoj de la scienculoj kaj fakuloj el diversaj landoj, kiuj ne estas esperantistoj sed partoprenos la seminarion kaj dezirus per Esperanto fari kontaktojn kun gekolegoj-fakuloj. Jam aliĝis famaj bulgaraj fakuloj, scienculoj, universitataj profesoroj, reprezentantoj de nesesperantistaj organizaĵoj, kiuj ne parolas esperante kaj kies prelegoj ni tradukos. Ili dezirus konatiĝi kaj kunlabori kun gekolegoj en diversaj landoj uzonte Esperanton kiel kontaktlingvo. Ni same petas Vin, se eblas informi pri nia Simpozio kaj inviti Viajn gekolegojn en Via Universitato, firmaoj, institutoj, fakaj organizaĵoj, kiuj dezirus partopreni kaj prelegi nacilingve. Vi povus koncize traduki esperante iliajn prelegojn kaj ankaŭ la diskutojn. Tiamaniere ili ankaŭ povus persone konatiĝi kun bulgaraj kaj eksterlandaj scienculoj kaj samfakuloj.

Temoj de la prelegoj-diversaj sciencaj kaj fakaj prelegoj kunligitaj kun profesia agado de la prelegonto. La prelegonto povos prezenti koncize sian prelegon/ĝis 30min/ kaj poste estos diskutoj pri la temo. La plenan tekston de la prelego ni publikigos post la simpozio en prelegaro. Ni petas la prelegontojn ĝis 22.06 sendi al ni resumojn de la prelegoj, ĉar ni dezirus disdoni ilin al la partoprenantoj en la komenco de la Simpozio. Post la Simpozio okazos la Seminario "La religio kaj homaro" 02.07-05.07.2013-Karlovo/.

Simpozejo-Internacia Universitato Karlovo. La solena Inaŭguro estos en la urbodomo

Situo de Karlovo- Karlovo estas situanta en la centro de Bulgario kaj estas facile atingebla de Plovdivo/60 km/, Sofio/150 km/Burgas, Varna, Ruse

Tranoktado- en studenta domo kaj hoteloj

Manĝado- libervole en proksimaj manĝejoj kaj restoracioj. La nutrado en Bulgario estas tro malmultekosta. En la proksimaj manĝejoj kaj familiaj restoracietoj Vi povus pagi por tag- kaj vespermanĝo entute ĝis 10-12 euroj.

Antaŭ- aŭ postsimpoziaripozo- PorladezirontojnipovusorganizilatanoktadonenKarlovokaj
ĉelamarotremalmultekoste.Por tiujkiujdezirusripozienKarlovo/ĉarkielmijammenciis
ĝiestassituantaenlacentrodelalando/ nipovusorganizidiversajnekskursojn- alPlovdivo, Baĉkovamonakejo,
Gabrovo, Trojan, StaraZagorak.a.Portiuj ,kiuj ŝatasekskursiallamonto,povustionfari ĉiutage,
ĉarKarlovoestassituantaenlacentrodela famekonataRozavalokaj ĉelapiedodelamontoStaraPlanina.

Adreso por aliĝo kaj informoj-

E-mail:leonov@rozabg.com aŭ :Bulgario 4300 Karlovo p.k.44 Internacia Simpozio /sendu la leterojn
preferinde rete/

GSM :+359 885056469

Kun estimo, plej koraj salutoj,atendante Vian pozitivan respondon kaj kun
espero renkonti Vin en Karlovo

Restas nome de la Organiza komitato

amike Via

Prof. Bojidar Leonov

PREZIDANTO de AIS-Bulgario

REKTORO de IUK

PREZIDANTO de BEA

PREZIDANTO DE TOLE

INTERNACIA SIMPOZIO

“ Apliko de Esperanto en la faka kaj profesia agado “AEPA-2013

29.06-03.07.2013 Karlovo- Sopot

**ORGANIZANTOJ- B E A, AIS- Bulgario,Internacia Universitato Karlovo, kaj la Regiona Estraro de la
neespertantista organizo “Scienc-teknika Asocio en Bulgario »**

**HONORAJ PROTEKTANTOJ: D-ro Emil Kabaivanov-Urbestro de komunumo Karlovo kaj Veselin Liĉev-
Urbestro de komunumo Sopot**

OFICIALA LINGVO: Esperanto

LABORLINGVOJ: naciaj lingvoj de la partoprenontoj neesperantistoj

**TEMOJ DE LA PRELEGOJ-diversaj sciencaj kaj fakaj prelegoj kunligitaj kun la profesia agado de la
partoprenonto..**

**RIMARKO: Tiuj ,kiuj ne havas eblecon partopreni la tutan Simpozion, povus partopreni nur parte dum
preferindaj tagoj**

La partoprenontoj ne estos devigotaj prelegi.Povus partopreni nur la diskutojn

ALIĜO-Aliĝkotizo-30 euroj

20 euroj por eksaj socialismaj landoj, Afriko

AIS-studentoj ne pagas aliĝkotizojn

RIMARKO :Aliĝkotizo por dezirontoj partopreni ambaŭ seminariojn-AEPA kaj la religian dum la tuta tempo de la restado en Karlovo/29.06--05.07.2013/-estas nur 20 euroj

LIMDATO POR ALIĜO - 22.06.2013

La aliĝkotizo estas pagebla per nia bankokonto aŭ surloke. La aliĝontoj estas petataj nur sendi la aliĝilojn ĝis la menciita limdato.

Numero de la bankokonto : /en euroj/

UNICREDIT BULBANK

7 Sv. Nedelia Sq.

1000 Sofia , Bulgaria

SWIFT BIC CODE UNCRBGSF

IBAN BG 12 UNCR 9660 4422 0221 08

Prof. Bojidar Stefanov Leonov

/por la Seminario/ -

KOTIZOJ POR UNU TRANOKTO :-7 euroj/en komuna loĝejo /

20-40 euroj /en hoteloj/

RIMARKO :Dezirontoj partopreni ambaŭ seminariojn/AEPA kaj la religian/ uzas rabaton pagonte 30 eurojn por sia tranoktado en Karlovo/29.06-05.07.2013/ , se dezirus tranokti en komuna loĝejo /6 tranoktoj/

MANĜADO- libervole en la universitata bufedo kaj proksimaj manĝejoj.

LIMDATO POR SENDITAJ RESUMOJ :22.06.2013

ANTAŬ KAJ POSTSEMINARIA RIPOZO :en Karlovo kaj ĉe la Nigra maro-dezirontoj povus ripozi pagonte surloke malmultekostan tranoktadon.

VIZOJ- post la aliĝpeto ni sendos al la dezirontoj invitilojn por la bulgara vizo.

ADRESO POR ALIĜO KAJ INFORMOJ :Bulgario 4300 Karlovo p.k.44 ESPERINFORM

Retadreso :leonov@rozabg.com /preferinde skribu rete /

Telefonoj : +359 885056469 /tage kaj nokte/ +359 335 5 50 50/nur vespere/

A E P A- 2 0 1 3

A L I Ĝ I L O

Nomo.....

Adreso.....tel.....

E-mail.....

Mi prelegos JES NE

Temo de la prelego.....

.....

Mi deziras tranokti en :studenta domo ; hotelo

Mi dezirus ripozi antaŭ /post la seminario JES NE

.....2013

INTERNACIA SEMINARIO "LA RELIGIO KAJ LA HOMARO »

03-05.07.2013 Karlovo

ORGANIZANTOJ- B E A, AIS- Bulgario, Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista /TOLE/, Internacia Universitato Karlovo, kaj la Regiona Estraro de la neesperantista organizo "Scienc-teknika Asocio en Bulgario »

HONORA PROTEKTANTO: D-ro Emil Kabaivanov-Urbestro de komunumo Karlovo

OFICIALA LINGVO: Esperanto

LABORLINGVOJ: naciaj lingvoj de la partoprenantoj neesperantistoj

RIMARKO: Tiuj, kiuj ne havas eblecon partopreni la tutan Simpozion, povus partopreni nur parte dum preferindaj tagoj

La partoprenantoj ne estos devigotaj prelegi. Povus partopreni nur la diskutojn

ALIĜO-Aliĝkoto-20 euroj

10 euroj por eksaj socialismaj landoj, Afriko

AIS-studentoj ne pagas aliĝkotojn

RIMARKO :Aliĝkoto por dezirantoj partopreni ambaŭ seminariojn-AEPA kaj la religian dum la tuta tempo de la restado en Karlovo/29.06-05.07.2013/-estas nur 20 euroj

LIMDATO POR ALIĜO - 25.06.2013

La aliĝkoto estas pagebla per nia bankokonto aŭ surloke. La aliĝontoj estas petataj nur sendi la aliĝilojn ĝis la menciita limdato.

Numero de la bankokonto : /en euroj/

UNICREDIT BULBANK

7 Sv. Nedelia Sq.

1000 Sofia , Bulgaria

SWIFT BIC CODE UNCRBGSF

IBAN BG 12 UNCR 9660 4422 0221 08

Prof. Bojidar Stefanov Leonov

/por la Seminario/

Helpu trovi junulojn, kiuj okupiĝas pri filmado!

De Kirill Ŝvedov, Moskvo el [Libera Folio](#)

"UNUA VORTO" – INTERNACIA FESTIVALO DE INFANA KINOKREADO -

Moskvo, majo 2013 - komunikado de la organizantoj

Inter 24-26 de majo 2013 en Moskvo, Rusio, okazos la unua internacia festivalo de infana kinokreado "Unua Vorto".

Partoprenantoj de la festivalo estos geknaboj en aĝo de 7 ĝis 18 jaroj el diversaj landoj de la mondo. Por partopreni necesas krei mallongan filmon (de 5 ĝis 20 minutoj), kiu temu pri familio kaj rilatoj inter gepatroj kaj gefiloj, kaj plenigi aliĝpeton en la retejo <http://1slovo.com/eng/>

Partopreno en la Festivalo estas unika eblo demonstri sin, aŭdi opinion de ekspertoj pri sia laboro, partopreni modellecionojn kaj gajni valorajn premiojn. La ĉefpremio por la plej bona filmo estas 2000 USD.

Aliĝpetoj estas akceptataj ĝis la 15-a de marto en 2013.

Mi kunlaboras kun la organizantoj de la festivalo kaj serĉas esperantistojn, kiuj pretas helpi en la serĉado de potencialaj partoprenantoj – studioj, rondetoj kaj aliaj infanaj organizoj, kiuj okupiĝas pri filma kreado.

Necesas trovi tiaspecajn organizojn, komuniki al ili informon pri la festivalo kaj, okaze de ilia intereso, helpi en partopreno; ekzemple, traduki prezentitajn filmojn uzante Esperanton kiel pontolingvon. La festivalo promesas esti sufiĉe rimarkinda aranĝo; oni jam planas lokan reklaman kampanjon por ĝi. Okaze de sukceso de la proponata iniciato eblos listigi esperantistojn (precipe UEA, kies reprezentanto jam promesis helpon) kiel informajn partnerojn de la festivalo. La organizantoj volonte faros tion. Se vi volas partopreni ĉi tiun iniciaton, bv. kontakti min laŭ la adreso "kirill.shvedov@gmail.com" por interkonsenti detalojn de la laboro.

Kirill Ŝvedov

Ilona Koutny [<koutny.ilona@gmail.com>](mailto:koutny.ilona@gmail.com)

Interlingvistiko kaj esperantologio daŭre ĉeestas en la paletro de UAM

Jam de 15 jaroj fino de septembro kaj komenco de februaro estas dediĉita al la intensaj sesioj de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz. Ili havas firman lokon en la universitata paletro kaj proponas universitatnivelan studadon kun fina atestilo al ambiciaj esperantistoj. Ili entreprenas ankaŭ la formadon de esperanto-instruistoj. En la tria jaro de la Studoj okazas instruista

specialiĝo. Kunlabore kun ILEI tio kiel instruista trejnado estas ofertata ankaŭ al pli vasta publiko, kiu volas instruistan spertiĝon dum unu jaro. Aliĝantoj estas atendataj por la septembra sesio (14-20). Informoj: en la retpaĝo de la Studoj kaj interlin@amu.edu.pl.

La 5-a grupo de la Interlingvistikaj Studoj travivis sian 4-an sesion inter la 2-8-a de februaro en Poznano. Kvankam la nombro de studentoj iom malpliiĝis, la persistuloj aktive partoprenis la sesion. Stipendioj de ESF kaj ILEI-UEA daŭre helpas al kelkaj.

Aleksander Korĵenkov, ruslanda eldonisto kaj esploranto lekciis pri la historio de esperanto-movado: skizis la ĉefajn eventojn, konfliktojn kaj tendencojn en Esperantujo, kiuj fojfoje surprizis la studentojn, kaj montris la kaŭzojn de tiuj ŝajnaj neklarigeblaĵoj.

La lingvistikajn kursojn gvidis Ilona Koutny multe diskutante kun la gestudentoj. Ŝi prezentis la semantikan sistemon de esperanto, kun ĝiaj fontoj kaj memstara evoluo, analizis la semantikajn rilatojn inter la elementoj de la vortoprovizo kaj la frazeologizaĵojn, tuŝis la problemon de lingvotavoloj kaj provis trovi la lokon de esperanto inter la etnaj lingvoj perhelpe de lingvotipologio kadre de gramatika kurso. Ŝi esploris la specifaĵojn de la esperanta lingvouzo en diversaj eventoj kaj ĝentilecformoj kadre de pragmatiko. Kurso pri aplikata lingvistiko enkondukis i.a. al lingvoplanado, tradukado, leksikografio, terminologio kaj komputa lingvistiko.

Al la programo kontribuis Zbigniew Galor, profesoro pri sociologio, per prelego pri socio kaj lingvo. Gastprelegis Christoph Goro Kimura, profesoro pri lingvistiko el Tokio, pri la interlingva komunikado, pri la interna ideo kaj la neeŭropa aliro al esperanto. Li revenos en aprilo por prelegi en la Lingvistika Instituto pri siaj esploroj - laŭ la invito de la institutestro.

La bonetosan kaj riĉan kursaron kompletigis la komuna vespero en la fervojista domo, kie la partoprenantoj prezentis poemojn kaj Mirejo Grosjean parolis pri afrikaj etosoj. Post la kurso okazis ekskurso al Vroclavo, kie la lokaj esperantistoj gvidis nin tra la urbo.

Prof. Ilona Koutny

Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

ĈU VI ANKORAŬ NE ALIĜIS AL ITALA KONGRESO?

Ni atendas vin! Se

vi legas ĉi tiun tekston kaj sendas vian intencon aliĝi al laura.brazzabeni@alice.it vipagos la kotizon de la unua periodo ĝis la 28a de februaro..

Kial veni?

Multaj el vi

jam konas la etoson de nia kongreso plenplena je seminarioj, prelegoj, kursoj, ekskursoj. Nia kongreso estosferi o en belega loko apud la maro kaj la montaro kun ebleco resti en la kogresejo por la programo kaj bani en la naĝejoaŭ ĉe la maro. La suno kaj la maro estas senpagaj ĉeestantoj en tiu periodo en tiu parto de Italio, la tiel nomata "lazurmarbordo" inter Ĝenovo kaj Francio. Vi devas nur kunporti vian naĝkostumon.

KIE?

En Castellaro apud San Remo de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2013 por la 80-a Itala Esperanto-Kongreso.

Humphrey Tonkin kaj Paul Gubbins kaj multaj aliaj prelegantoj kaj instruistoj venos ĝuste por vi.

Vi rajtas, kiel en ĉiuj kongresoj leviĝi matene kaj sekvi la programon dum la tago. Sed vi ankaŭ rajtasdormi dum la tago kaj sekvi la programon dum la nokto. Nokte vi unuavice rajtas festi kun ni. Junuloj laŭaĝo kaj koro rajtos partopreni la noktan programon: n i kune ludos, malkovros la trinkomanĝajn kulturojninternaciae kaj loke, ni spertos la belecon de la lazura marbordo inter Italujo kaj Francujo dum la somerajnoktoj... kaj kunumos por iom da sana diboĉado internacia je la nomo de la zamenhofa interna ideo.

Por la tuta programo, aliĝilo, loĝado, ktp. vidu ĉe : kongreso.esperanto.it

Ankoraŭ kelkaj eblecoj estas loĝi en malmultekosta loĝejo; kaj en la luksa, sed ankaŭ malmultekosta kongresejo laĉambroj estos por ĉiuj.

Kontaktu tuj:

- Laura Brazzabeni, laura.brazzabeni@alice.it

Beletraĵoj

Shefki Ollomani

Albana poeto el Makedonio (Svedio)

Poeziaĵoj

Mia belulino

Dolĉa, kanaria.

Edzino mia- hirunda,

Laborema kaj fidela,

Ne ekzistas alia tia.

Montarana kaj bravema.

Estas elkora, grandanima,

Sune varmas, lune brilas,

Malhelon, nokton..ŝi lumigas.

Cervine rapida, Feine belas.

Estas ŝi perle ĉasta,

Kore blanka, kastelprincino,

Kaj ambre pura.

Himalaja neĝosimilo.

Neniam rideton ŝi ĉesigas,

Kapreoline peza,

Tagnokte, kristale brilas.

Papilio surpaŝteja .

Ŝia voĉo- aglina,

Estas mia amikino, mia edzino,
De fontano al fontano feino.

Bela estas, dorlotema.

Mona Liza surfenestra.

Kolombino en sennuba ĉielo,

Fluganta en gajeco.

Kiel cigno sur la ondoj,

Lerta kiel la angilo.

Dukapa aglino,

Neniam forlasas sian neston.

La formoj de la perfideco

Iu perfidas pro devigo,

Alia pro mono,

Tria pro malhontemo!

Kelkaj perfidas pro kolero,

Aliaj pro seniluziigo,

Tria pro avideco!

Kelkiu perfidas pro tristiĝo,

Alia pro timiĝo,

Tria pro teruriĝo!

Kelkaj perfidas pro ĵaluzo,

Aliaj pro stulteco,

Triaj pro ignoreco!

Kelkiu perfidas pro karierismo,

Alia pro egoismo,

Tria pro nervozismo!

Kelkaj perfidas pro turmentado,

Aliaj pro perfortado,

Triaj pro maltolerado!

Kelkiu perfidas pro malkuraĝeco,

Alia pro maldigneco,

Alia pro skizofreneco!

Kelkaj perfidas pro disfalismo,

Aliaj pro histerismo,

Triaj pro iluzionismo!

Kelkiu perfidas pro avideco,
Alia pro debuleco,
Tria pro malfideco!

Kelkaj perfidas pro disfalo,
Aliaj pro malespero,
Tria pro trompeco.

Kelkiu perfidas pro barbareco,
Alia pro timegeco,
Tria pro krueleco!

Kelkaj perfidas pro penteco,
Aliaj pro transviveco,
Aliaj pro malekspekto!

Kelkiu perfidas pro zorgeco,
Alia pro naiveco,
Tria pro malpieco!

(Enesperantigis: **Bardhyl Selimi**, januare 2013)

Noveleto

Ylljet Alickaj

Kelkaj perfidas pro hipnoziĝo,
Aliaj pro kondamniĝo,
Tria pro maloferiĝo!

Kelkiu perfidas en nigra prizono,
Alia en nova fotelo,
Tria ligita per kateno,
Kvara senkatene, en libero!

Kelkaj timas morton, inferon,
Aliaj havas porkan avidon,
Tria rompiĝas pro malamika
krueleco,
Kvaraj ricevas dekoraĵojn!

Tiel la perfido dancludas,
Tiel ĝi zorgojn kreas,
Tiel ĝi masbuĉas,
Tial ni Albanion ne unuigas!

Adonis

Mia patro mortis laŭ tute ordinara maniero. En lia aĝo, kaj li havis pli ol okdek jarojn, ĉiam estosiabanala kaŭzo, por forlasi ĉi mondon. Koncerne mian patron, tio okazis pro varmego en tiu jaro. Ĝi forpasigis ankaŭ la aliajn homojn, pli junajn ol li.

Pro la varmego tiuj, kiuj venis adiaŭi la mortinton, konsilis al mi, kaj tre prave, ke la korpon de la patro mi ne tenu hejme dum la nokto antaŭ la entombigo. „Oni devas kuŝigi lin en iu malvarma loko, ĉar alie...” – ne finis sian averton malproksima kuzino. Sed tiu escepte logika konsilo tre mirigis min.

- Sed kien mi transportu lin? – mi demandis

- Nu, kien? – daŭrigis la kuzino. – Tien, kien oni transportas mortintojn, en kadavrejon.

- Bone, mia kara – alparolis ŝin mia duonpatrino – sed kiel oni povas eniri tien, kiel kuŝigi la kadavron, se ni konas nek regulojn, nek homojn.

La diskuto ne daŭris longe. Ĉar iu doktoro, kiu venis kun kondolenco, konsilis, ke mi interparolu kun la estro de la hospitala kadavrejo, Adonis.

- Kompreneble – mi respiris trankviliĝante.

Vespere ni enŝovis la ĉerkon en la aŭtomobilon, kiun mia entrepreno disponigis al mi kaj mi ekveturis. Sola.

La kadavrejo estis teretaĝa konstruaĵo, en ioma distanco al la hospitalo kaj ĉirkaŭita per herbo forbruligita de la suno, kun flavaj, makulitaj muroj kaj stukaĵo defalanta kelkloke. La fenestrojn defendis rustiĝintaj kradoj. En tiu morta pejzaĝo la sola vivanto estis Adonis.

Facile mi trovis lin. Li promenadis, tenante cigaredon per dikaj fingroj, kiujn flavigis nikotino aŭ desinfektiloj. Mi ekmiris, kiel bonege Adonis taŭgis por sia laborloko. Kun distaŭzitaj haroj, enkaviĝintaj okuloj, krispaj brovoj, dika trunko, blanka ĉemizo plena je flavaj makuloj, disbutonita kolumeto, kunbutonoj de la kacujo, malrekte enŝovitaj en la truetojn.

Mi prezentis min kaj klarigis, kion mi volas. Li rigardis strabe:

- Malgraŭ la tuta estimo, kian mi havas al la doktoro, estos tre malfacile trovi lokon por la mortinto. Kio li estas?

- Mia patro.

- Mi kondolencas.

Kaj li klarigis decide:

- Do, kiel mi jam diris, ne estas facile. Dum la lastaj tagoj venis eksterordinare multaj kompatinduloj, ne nur el la hospitalo, sed ankaŭ el strato (kiel – pardonu la komparon! – via patro).

Mi rememoris la konsilon de la doktoro kaj tuj elpoŝigis kvin milojn da lekoj. Adonis okulkaptis mian geston kaj mildiĝis:

- Nu, bone, ni vidos, kio estas farebla.

- Dankon – mi respondis.

Adonis pravis. Vere estis malfacile trovi liberan lokon. Li komencis malfermi fridujojn, elprenante kaj traŝovante mortontojn de loko al loko. Li laboris en silento, precize, kaj samtempe li parolis kviete:

- Mi estas tia, ke monon mi ne prenos sen fari ion. En alia loko homoj pagas kaj estas trompataj: oni kvazaŭ frostigas la kadavrojn, sed antaŭ ol mortinto revenos hejmen, li fandiĝas kiel glaciaĵo. Kaj mi laboras honeste. Mallonge dirite, mi frostigas la kadavrojn, kiel decas. Jen tiel!

Kaj dezirante pruvi la verecon de siaj vortoj, li malfermis la apudan fridujon kaj elŝovis tabulon kun la korpo de juna knabino – ŝi havis kretblankan vizaĝon (oni ne scias, ĉu pro la morto aŭ frosto). Li ektiris la brakon de la kadavro kaj subite, kvazaŭ li kontrolus akvomelonon, ĉu ĝi estas matura, li frapis tre forte ŝian frunton per la dikfingro. La sono estis terura.

Mi ekstrepegis. Adonis proponis, ke ankaŭ mi frapu.

- Ŝi ja ne mordos vin!

- Ne estas necese, dankon – mi elflustris per la febla voĉo. – Sed kial ĉi tiu knabino mortis?

- Mi ne scias, verŝajne ŝi mortigis sin.

- Kial?

- De kie mi sciu? – Adonis skuis la ŝultrojn kaj reparolis pri sia plej ŝatata temo:

- Tio signifas, ni jam scias, sur kio ni staras: morgaŭ vi havos la paĉjon frostrigidan je amen, same kiel ĉi tiu knabino.

- Mi estas certa – mi volis fini la interparolon kiel eble plej rapide.

Finfine Adonis trovis liberan lokon. La rustiĝintan fridujon, kiu – estis flava - oni ne scias, ĉu nature aŭ pro malnoveco. Interne estis tri lokoj.

Ĉi tien mi metos vian paĉjon. En la fridujo kuŝas pensiulo, kiun oni lasis antaŭ semajno kaj ankoraŭ ne forprenis, kaj virino, kiun oni veturigis hodiaŭ matene.

- Bone – mi diris. Ni kuŝigis la patron. Fermante la fridujon, mi rigardis lian polmon. Kiomfoje mi kroĉis miajn okulojn al ĉi tiu polmo, kiam mi petis monon. Kaj la patro neniam rifuzis. Dum la tuta vivo li bedaŭris, ke mi kreskas sen patrino.

Surprizita per la afableco de Adonis, mi elpoŝigis la sekvajn kvin milojn da lekoj kaj donis al li senvorte.

Li rigardis min per la okuloj de iu, kiu faris historian decidon, kaj ekparolis amike:

- Knabo, ĉu vi scias, kio afliktas min? Ni ŝanĝu lokon por via paĉjo, mi kuŝigos lin en la specfridujon. Ĝi estas plena, sed ni trovos solvon. Nu?

- Kion mi diru?! Bonege.

Nur tio estas certa – diris Adonis – via paĉjo frostiĝos tiel, ke vi ne rekonos lin.

Mi dankis, kvankam mi ne estis kontenta pri tio, kion li diris.

Li malfermis la specfridujon. Ĝi estis plene ŝtopita.

- Tiun ĉi mi metos sur la malsupran breton – Adonis komencis eltiri iun mortinton. – Li fariĝis tia glacipecgo, ke en neniu forno li fandiĝos – li alparolis ĝuste sin ol min. – La alian mi kuŝigos plej malsupren - li metis la mortinton sur la plankon, respiris profunde kaj rigardis min – aŭ ne, tien mi metu agronomon, kiun oni veturigis hieraŭ, ĉar estos pli facile al mi, kiam morgaŭ ili forprenos lin. Venu tien kaj iom helpu! Aŭ ne, pli bone mi eltiru la pensiulon: li kuŝas semajnon ĉi tie kaj neniu venis al li.

Kvin minutojn poste, sur la planko kuŝis diŝjetite la kadavroj de kvar personoj. Por momento Adonis perdis orientiĝon.

- Kien ni metu lin? – li ekpensis pri la pensiulo.

- Mi ne scias – mi respondis kun ia kulposento.

- Bone, bone – li decidiĝis. – Tiun ĉi mi kuŝigos kun iu. Pli bone mi enpremu lin en fridujon ol lasu ekstere.

Tiel li faris. Ni kaptis la pensiulon kaj kuŝigos lin sur alian kadavron en la fridujo, kiu ne frostigas tro bone, kiel ŝajnis al mi.

- Aŭskultu – li decidis finfine – mi pensas, ke plej bone estos, se ni metos vian paĉjon malsupre, ĉar morgaŭ matene vi ja forprenos lin, kaj por la agronomo ili povas veni posttagmeze.

- Konsentite – mi ne protestis.

Do, ni kaptis denove la agronomon: mi – la kapon, kaj li – la piedojn, sed la kapo frostiĝis tiel, ke kiam ni levis supren la mortinton, ĝi elglitis el miaj manoj kaj malgraŭ la senespera fortostreĉo de Adonis li falegis sur betonon kun terura krakego.

Li falegis sur la vizaĝon. Unu brako elsaltis el la artikolo.

- Mi pardonpetas – mi volis senkulpigi min.

- Kial vi paliĝis tiel? – ekmiris Adonis. – Ne timu, estas nenio, ho, kiomfoje tio okazas al mi! Ĉu vi scias, kial li falis? Ĉar li glaciĝis.

- Sed lia brako...? – mi eksentis naŭzon.

- La brako estas bagatelo! Dum minuto mi fiksos ĝin, kaj la rompon, kiu vidos de interne?

Adonis tuj okupiĝis pri tio, sed ne estis facile. Dum momento plenforte li apogis sian piedon sur la bruston de la agronomo, por ektiri la brakon antaŭen. Aŭdiĝis krako de ostoj de la mortinto kaj penspirado de Adonis.

- Ĉu mi helpu? – mi demandis necerte.

- Ne, vi ne devas, nur starigu vian piedon, ke li ne moviĝu. Estas nenio, okazas tiel. Ĉu vi scias kial? – denove li demandis.

- Ĉar ili glaciĝis – mi konis la respondon.

- Brave! – Adonis penspiradis. – Finite! – li diris post momento kaj komencis viŝi la manojn. Por suprenlevi la atronomon, ĉi-foje li kaptis la kapon.

Ŝajnis al mi subite, ke la agronomo havas kurbigitan nazon. Adonis divenis el mia rigardo kaj kvazaŭ nenio estus okazinta, li demandis:

- Kio afliktas vin?

- Lia nazo... - mi diris hezite.

- Kiu nazo?! Li povis denaske havi ĝin tia! Ĉu estas malmulte da homoj kun kurba nazo?.

Por diri la veron, mi ne memoris, ke la nazo de la agronomo estu tiel kurbigita

Finfine ni atente kuŝigis la agronomon en la fridujon.

Mi eksentis teruran malplenon. Mi proksimiĝis al la korpo de mia patro. Sed okulangule mi vidis, ke Adonis fingrumas sur la vizaĝo de la agronomo. Ŝajne en sekreto li provis rektigi al tiu la nazon, sed kiam li rimarkis, ke mi observas, li frapetis la vizaĝon de la mortinto, kvazaŭ li volus diri: „Kiel vi fartas, dikuleto?“, kaj li kunfrotis siajn manojn.

- Nu, en ordo.

Finfine ni kuŝigis la patron sur la unuan breton de la specfridujo. Antaŭ ol brufermiĝis la pordo, mi rigardis lin ankoraŭfoje. Mi lasis la patron sola, en mallumop kaj en malvarmego, inter fremduloj, sed kiam mi ekpensis, ke ni jam disiĝas, Adonis, ne tute fermante la pordon kaj rigardante min kiel esploroficiro, trafis min per la demando:

- Kiu faris vian paĉjon?

- Nu? Mi ne komprenas

- Vian paĉjon kiu faris? – li provis klarigi ion.

Tute surprizita mi elbalbutis:

- Mia avinjo, ŝi naskis lin

- Kial vi parolas pri la avinjo? Mi demandis, kiu preparis la mortinton.

- Ha! Virinoj... Cetere mi ne scias – mi komprenis finfine.

Dum longa momento Adonis rigardis min exploreme kaj taksis per la voĉo de la fakulo:

- Ili ne faris bone. Eĉ ŝajnas al mi, ke ili tute ne faris... Nu, estas via patro, faru, kiel vi volas, mi ne devigas vin, vi donas la lastan servon al li, sed vidu, ke vi lasas vian patron nefarita.

Mi divenis, kion li intencas kaj elpoŝigis denove kvin milojn da .lekoj.

- Faru tion, sinjoro.

- Nu – li respiris kun plifaciliĝo. – Iru trinki kafon, kaj mi dume finos tion, poste revenu al mi kaj vi veturigis min hejmen per via aŭtomobilo.

Mi revenis post horo. Li pretigis mian patron kaj enfermis lkin en la fridujo.

Adonis loĝis antaŭ la urbo. Sur la unua etaĝo de la malpura kaj malzorgita domo, kiun propramane starigis loĝantoj. Li obstiniĝis, ke mi veturigu lin antaŭ la enirejon, sed li ne tuj forlasis la aŭtomobilon. Nur certiginte sin, ke la najbaroj lin vidas, li brufermis la pordeton kaj kriis laŭte: „Morgaŭ venu al mi je la sepa”. Li iris sur la ŝtuparon, akompanata per iliaj rigardoj plenaj de estimo kaj enviado.

Hejmen mi revenis malgaja. Mi ne dormis bone. Kiomfoje mi vekigis, mi pensis pri la patro, kiu iom post iom fariĝas glacipecego.

Kiam matene mi veturis al Adonis, mi devis kelkfoje hupi, antaŭ ol li vidiĝis en la fenestro, vestita per subĉemizo. Ĵetinte rigardon sur la tutan straton li kriis: „Ĉu vi jam estas? Atendu kelkajn minutojn, ĝis mi fortrinkos kafon”.

Malsupren li venis kun la demando: „Kiel vi dormis?” Ĝis la kadavrejo ni interŝanĝis eĉ ne vorton. Elirante el la aŭtomobilo, li atenteme kroĉis siajn okulojn al la domo de la hospitalo. „Certe li serĉas iun mortinton” – mi ekpensis. Li alparolis pasanton apude:

- Ĉu al mi?

- Kaj kiu vi estas? – demandis la pasanto.

- El la kadavrejo – respondis Adonis.

- Ne. Mi venis ripari muron.

- Mi pardonpetas – li malantaŭeniĝis kaj diris al mi: - Ni iru al via paĉjo.

Li malfermis la fridujon kun mieno de la homo, kiu scias, kion li parolas. La patro estis frostrigida.

Vidante mian silenton, Adonis demandis:

- Nu, kion vi diros?

- Kaj kion mi diru? – mi ekmiris.

- Nun tuŝu lin.

Mi tuŝis. Li estis malvarmega. Adonis atendis.

- Frostrigida kiel osto – mi diris.

Mi petis, ke li helpu al mi porti la patron en la aŭtomobilon. Sed tiumomente oni veturigis novan kadavron, do mi devis peti helpon de la masonisto.

Kiam ni iris kun la ĉerko sur la ŝultroj, ankoraŭfoje mi dankis al Adonis. Li respondis mallonge: „Prosperon, mia ora!”, kaj li plu klarigis al iuj venintoj sian vivo-kredon:

- Ĉiam mi perlaboras monon ŝvitante, sen trompado.

Dirinte tion, li turniĝis al la fridujo, kie kuŝis la korpo de la knabino, kiun li fingrofrapis pli frue sur la frunton.

(Enesperantigis **Tomasz Chmielik**, 2012)



Tomasz Chmielik, meze dum la promogiga sesio de la romano Hunda hauto, aprilo 2012

Ismail Kadare

Generalo de la mortinta armeo

Ĉapitro IV

Oni diris bonan nokton unu al la alia kaj la generalo fermis la pordon de sia ĉambro kaj eksidis ĉe la lamposfirmilo. Ne dormemis, kvankam estis malfrue. Sur la tablo estis la teko. Li etendis la manon kaj malfermis ĝin. Eltiris la listojn kun la nomoj de la soldatoj kaj estis trafolumante ilin. Estis multaj folioj, tegitaj po kvar, po kvin aŭ dek folioj kune. Li estis trafolumante ilin, preterlegante, je la centan fojon, la titolojn per grandaj literoj ĉekape de la listoj: “La Regimento Gloro”, “La Dua Divizio”, “La Fera Divizio”, “La Alpina Bataliono”, “La Kvara Regimento de la Gardistaro”, “La Tria Alpina Bataliono”, “La Divizio Venko”, “La Sepa Divizio de la Infanterio”, “la Blua Bataliono” (punanta)...La generalo haltis dummomente ĉe la lasta. Ĉekape de la listo estis la kolonelo Z. Poste la nomoj

de la soldatoj, envicigitaj laŭ la alfabeto, dividitaj laŭ kompanioj kaj plotonoj. Blua bataliono, bela nomo, pensis li.

La listojn oni komencis printi printempe. En la longaj oficejoj de la ministrejo, ĉe grandaj fenestroj, la junaj tajpistinoj frapetis per la maldikaj fingroj sur la skribmaŝinoj. Trak-trak, trak-trak-trak. Estis preskaŭ ia mitralado sub iliaj malobservemaj okuloj, ŝmiritaj per rimelo..

Li flankenlasis la fundamentajn listojn kaj eltiris aliajn listojn tute plenigitaj per notaĵoj kaj krucetoj margine. Ĉi tiuj estis la listoj pri la stato de la ostoj. La soldatoj dividiĝis ne laŭ la militistaj unuoj, sed laŭ la lokoj kie estis mortigitaj kaj preter ĉiu nomo estis notita la kvoto korespondanta al la topografiaj mapoj, samkiel ankaŭ la alteco de la soldato kaj notaĵoj pri la dentoj. La trovitaj ĝis nun, estis notitaj per kruceto. Sed la krucetoj estis ankoraŭ raraj.

Li rememoris ke devis surmeti la krucetojn en la fundamentaj listoj. Sed estis malfrue.

Ne sciante kion fari, komencis denove legi. En la ĉiutagaj listoj, la grundoj havis tradukaĵojn en krampoj kaj ĉiuj tiuj nomoj de la valoj, botelkoloj, ebenaĵoj, riveroj, urboj, aspektis eksterordinaraj kaj timigaj. La Mutula Ravino, La Novedzina Torento, La Kvin Potoj, La Preĝejo de Psalmo, La Tombo de la Patrino de Shero, La Perditejo de Gufo, La Ŝtonaj Montetoj de Nase Gjika, La Trogo de Kukolo. Ŝajnis al li kvazaŭ ĉi tiuj estis dividinta la soldatojn inter ili, jen unu pli multe, jen alia malpli multe. Nun li estis alveninta por elpreni ilin denove.

Ree la okuloj haltiĝis ĉe la “Listo de la perditoj”, ĉe ties kapo estis la nomo de la kolonelo Z. La kolonelo Z, unu metro kaj okdek du centimetroj, la unua dekstra dento estas oraĵa, legis la generalo kaj poste vidis la tutan liston. Unu kaj sepdekkvar, mankas du flankaj dentoj, unu kaj sesdek kvin, eltiritaj la supraj mueldentoj; unu kaj naŭdek, metala ponto sur la unuaj dentoj; unu kaj sepdek unu, kompleta dentaro; du kaj dek. Ĉi tiu estas, je certeco, la plej alta en ĉi tiu listo, pensis. Kioma estos la plej alta en la ĉiuj listoj? Dum la plej maltalta jam estis sciite: laŭ la regularo - unu kaj kvindek unu. La plej altaj, ĝenerale, estis tiuj el la Kvara Regimento de Gardistaro, dum plej malaltaj tiuj alpinoj. Kiel li okupiĝas per bagateloj!

Malŝaltis la lumon kaj ekkuŝis. La domo ne okupis lin. Pli bone mi ne estus eltrinkinta tiun kafodiablon, diris al si.

Rigardis la ĉeffrontan muron, kie de fojo al fojo, glitis la lumo de kelkiu aŭto preterpasanta en la bulvaro. La lumo enfalis striostrie, de malantaŭ portoklapoj duonfermitaj, kaj al la generalo ŝajnis kvazaŭ staris antaŭ rentgenaparato, kie nekonataj homoj radiografiigis kaj poste foriris, lasante la lokon al la aliuloj.

La listoj estas tie sur la tablo, duonmalfermite, ekpensis li kaj eksentis malvarmtremon. Kiom bone estus se ankaŭ la edzino estus kun li. Kuŝadus tie en la mallumo, babilus mallaŭtvoĉe kaj li rakontus ĉion. Nur ke ŝi timus samkiel dum tiuj lastaj tagoj, antaŭ ol li ekveturi Albanion.

Estis kelkaj tagoj malsamaj al la ceteraj, plenigitaj per io nova kaj nekonata, eniranta unuafoje en sia vivo. Ĝus estis komenciĝintaj la malhelaĵoj kaj li estis reveninta el la plaĝo, kiam ekaperintis la unua homo. La generalo estis laborante en sia studio, kiam la servistino anoncis ke kelkiu atendis en la koridoro.

La nekonato staris surpiede apud la fenestro. Ekstere estis krepuskiĝante. Ombroj, je kiu ajn formoj, rondiradis konfuzite en la vento. Li turniĝis kiam knaris la pordo kaj, per surdigita voĉo, diris “bonan vesperon”.

- Pardonu pro la ĝeno,- parolis nekonato per raŭka kaj profunda voĉo.- Mi eksciis ke vi ekveturos baldaŭ al Albanio por repatriigi la ostojn de niaj soldatoj.
- Jes, ja, - diris la generalo. – Mi ekveturos post du semajnoj.
- Mi havas peton por vi, - daŭrigis la nekonato kaj eljakigis malpuriĝintan mapon de Albanio. – Mi estis soldato kaj militis tie du sinsekvajn jarojn.
- En kiu regimento? – demandis la generalo.
- En la Fera Divizio, la kvina bataliono, la plotono de mitralistoj.
- Kaj poste? – diris la generalo

La nekonato kliniĝis sur la malnova mapo kaj fingromontris la lokon.

- Jen, ĉi tie, dum granda operaco, meze de la vintro, nia bataliono frakasiĝis kaj ni, sukcesintaj savixgi, disdividiĝis dumnokte en diversajn direktojn. Mi kunhavis vunditan kamaradon kiu mortis dum tagiĝo, kiam mi trenadis lin en la enirejon de iu forlasita vilaĝo. Mi mem entombigis lin, kiom mi povis, malantaŭ eta preĝejo de la vilaĝo kaj foriris. Tiel okazis. Lian tombon neniu scias, tial mi alvenis ĉe vi, por ke, se vi veturus tien, provu eltombigi ankaŭ lin kune kun la aliaj.
- Certe, lia nomo devas troviĝi en la listo de la perditoj, - diris la generalo. – La listoj estas tre aŭtentaj, sed vi, tamen, agis bone, ĉar por trovi la “perditojn”, estas malmulte da eblecoj, kaj ĉi tie helpas nur la hazardo.
- Mi estas desegninta ankaŭ simplan skizon, tiel kiel mi povis, - diris la nekonato kaj eligis paperpecon kie estis desegnita io simila al preĝejo, kaj malantaŭ ĝi, du strekoj, sub kiuj estis notite per ruĝa koloro la “tombo”. – Tie, apude, estas akvofonto, - daŭrigis li, - kaj pli fore, dekstre, du cipresoj, jen ĉi tie, - kaj li notis ion alian apud la preĝejo.
- Bone – diris la generalo –Dankon!
- Mi devas danki vin, - diris la alia. – Estis mia plej bona amiko. – Li volis diri ankaŭ ion alian, eble, iun detalon, eble, iun etan okazintaĵon, sed la severa kaj oficiala mieno de la generalo igis lin duonlasi la frazon.

Poste la nekonato estis foririnte kaj la generalo apenaŭ estis sciinta kian laboron faris kaj kian nomon havis. Sed tio estis nur la komenco. Ĉiun posttagmezon, reveninta hejme, en la salono atendis aliaj nekonatoj. Estis diversaj homoj, virinoj, gepatroj, maljunuloj, veteranoj kaj ĉiuj staris timetaj kaj kun la sama aspekto sur la vizaĝo. Poste ekvenadis ankaŭ homoj el la aliaj urboj kaj regionoj kaj ĉi lastaj sidadis eĉ pli timetaj en la salono, eksplikante malfacile, ĉar ĉion tion sciita pri siaj hejmuloj mortigitaj en Albanio estis ĉiam pli nepreciza.

La generalo notis pri ĉio, ripetante kontinue:

- Ne timetu, la listoj kompilitaj de la Militministrejo estas aŭtentaj. Tamen mi notas vian klarigon, eble tio helpas nin.

Ili foriris dankante kaj la morgaŭon alvenis aliaj, kun malsekiĝintaj vestoj, piedpaŝante sur la dika tapiŝo, kie postlasis spurojn iliaj ŝuoj. Apartenis al tiuj timantaj ke oni estis forgesintaj la nomojn de siaj homoj; estis aliaj montrintaj la ricevitaĵajn telegramojn el la militista komandejo kaj sur la telegramoj oni estas notintaj la daton kaj la lokon kie la soldato “estis falinta por la patrio”; dum alia parto apenaŭ kredis ke la mortigitoj troviĝus laŭ la listoj kaj foriris tutvenene.

Ĉiuj havis po unu historio kaj li estis devigita aŭskulti ilin unu po unu, komencante de la virinoj, kiuj nun estis edziniĝintaj al la aliaj kaj kaŝe demandis pri siaj unuaj edzoj, ĝis la junaj knaboj dudekjaraj, vestite laŭmode, kiuj neniam estis konintaj iliajn militistajn patrojn.

Lastan semajnon, la vizitintoj pliiĝis. Nun, reveninte de la ministrejo, li trovis la salonon plenplena. Ĝi similis al atendejo de kliniko, kie atendis la malsanuloj, krom ke ĉi tie estis pli da silento. La homoj staris silente, rigardante longajn horojn la tapiŝajn ornamaĵojn.

Kelkaj vilaĝanoj alvenintaj defore, portis tornistran, kiun metis ĉe siaj piedoj, dum ĉe la pordo ekstere, la unua kozo okulfrapanta al la generalo, kiam li haltigis sian aŭton, estis la bicikloj apogitaj al la ferkrado, kaj fojfoje, iu aŭto, rande de la trotuaro. Poste li eniris rekte al la salono, kie sentiĝis la pezaodoro de la malsekiĝintaj vestoj, miksitaj per la parfumo de iu eleganta virino, kaj ĉiuj ekstariĝis honorige, silentaj kiel antaŭe, ne dirante komence ion, ĉar neniu sciis kiel oni parolas en ĉi tiu kazo.

Poste, tagmanĝinte, li iris al la salono kaj la homoj parolis laŭvice. Kiom similaj estis iliaj paroloj. Kaj tio, okazinta al siaj hejmuloj, estis tiom simila, kiom al li ŝajnis ke ĉiu tago estis la hieraŭo, kiun li estis songante. La virinoj alvenintaj por siaj edzoj, aŭ la filoj, apenaŭ eltenis la ploreton. La generalo iĝis ĉiam pli nervoza.

- Ne ploru, - alkriis iutage li al iu virino, - ĉi tiu ne estas plorejo. Sufiĉas. Via filo falis sur la batalejo, tie kien sendis lin la patrio.

Kaj alian tagon, alstatura viro, ĵus enirinte, diris laŭtvoĉe ekde la pordo:

- Via misio estas duvizaĝeco.

La generalo flaviĝis.

- Tiel parolas nur la perfiduloj. Marŝu, for de ĉi tie!

Semajnomeze, inter la atendantoj, estis ankaŭ maljuna virino, akompanata de eta knabino. La maljunulino estis tre kadukiĝinta.

- Mi havas mian filon tie, - eldiris ŝi per malforta voĉo, - la solan filon, - kaj elpoŝigis mantukon kiun komencis elvolvi per la tremantaj manoj. El tie eligis flaviĝintan, pro la tempopaso, telegramon kaj etendis ĝin al la generalo. Li legis la ordinaran esprimaĵon de la militista komandejo, anoncinta la morton kaj la okuloj restis ĉe la la lastaj vortoj "falas por la patrio, en Stalingrado".
- Sinjorino, - malrapide ekeksplikis li, - mi iros al Albanio, ne al Rusio.

La maljunulino rigardis iomtempe per siaj estingitaj okuloj, sed verŝajne nenion komprenis.

- Mi petegas vin pri io, - diris ŝi, - eksciu kiel li mortiĝis, kiu troviĝis ĉe lia kapo kiam li fordonis sian animon, kiu donis akvon kaj kiun lastan vorton eldiris.

La generalo klopodis ekspliki al ŝi ankoraŭfoje, sed la maljunulino nenion komprenis kaj ripetis la unuajn vortojn. La aliaj rigardadis unu la alian silente.

- Iru patrino, - diris iu viro fine, - per dolĉa voĉo, - sinjoro generalo agos tiel kiel vi volas. – Kaj la maljunulino dankis kaj foriris, apogite sur la bastono kaj eta knabino.

La morgaŭon, morna homo atendis ĝis foriris ĉiuj.

- Mi estis generalo, - diris li leze, - kaj estas militinta en Albanio.

Ambaŭ rigardis unu la alian malestime. Unu, ĉar estis vidante eksan venkitan generalon, la alia ĉar havis ĉefronte generalon en paca tempo.

- Kion vi postulas? – demandis malvarme la generalo.
- Fakte, nenion, - diris la alia. – Fakte mi ne ekspektas ion grandan de vi. La veron dirante, mi ne kredas. Finfine, ĉio ĉi tio aspektas tre ridinda. Tamen, ĉar vi komencis ĉi aferon, ĝisfinu tion, je diablo.

- Ĉu vi povas paroli pli klare, - diris la generalo.
- Mi ne havas ion alian por diri. Mi nur volis averti vin por ke estu atentema. Estu fiera. Ne kapklinu antaŭ ili. Ili provokos, eble, mokos, sed vi devas scii kiel respondi. Vi devas esti malfermokula. Ili klopodos ofendi la ostojn de la niaj soldatoj. Mi bone konas ilin. Ili ofte ŝokadis kaj mokadis tiam nin. Pensu kion ili faros nin!
- Mi ne permesos ke tio okazu, iam ajn, - diris la generalo.

La alia rigardis lin bedaŭrinde, kvazaŭ aldirus “povra vi” kaj foriris ne salutante.

La aliajn tri tagojn, la salono plenplenis. La generalo laciĝis kaj volis ekveturi kiom eble plej frue. La edzino apenaŭ eltenis sin.

- Se vi rezignus de ĉi tiu tasko, - diris ŝi, iun nokton, kiam ili kuŝis vekite sur la lito, - ŝajnas al mi kvazaŭ enhejme enirintis la morto.

Li trankviligis ŝin kiom li povis kaj, tiun nokton, dormis pli malbone ol en aliaj fojoj. Ŝajnis al li, kvazaŭ morgaŭon ekirus al la milito.

La lastan vizitinton li akceptis la matenon de tiu tago kiam ekveturus aeroflugile. Li devis iri al la aeroporto tre frue kaj, elirinte en la ĝardenon por malfermi la pordon de la aŭtejo, ekvidis du homojn dormintaj, kaŭre, ĉe la pordo, envolvite per lita supertuto. Estis maljuna viro kun sia nepo, alvenintaj el la plej malproksima ekstremo de la lando. Estis ili vojaĝinte plurajn tagojn, ĝis finfine, estis alvenintaj per la lasta trajno post la noktomezo, kaj, ne kuraĝinte frapi al la pordo tiun horon, ekkuŝintis dormi sur la trotuaro, atendente la matenon.

- Lastafoje, la generalo ripetis la parolojn “la listoj estas aŭtentaj, ne timetu, ni trovos” kaj la maljuna vilaĝano kapdankis, dum la lita supertuto daŭre estis ĉe la sojlo, ĉar ili estis vekiĝintaj timigite, kiam estis frapintaj al la pordo.
- Tio estis ĉio kaj tiel estis finiĝintaj tiuj du lastaj semajnoj antaŭ la ekiro al Albanio.

(Enesperantigis Bardhyl Selimi- marto 2013)